

Bulgara Esperantisto

Aŭgusto / Septembro 1989



ENHAVO

- 1 Cent jarojn esperantista gazetaro en Bulgario (Nikola Aleksiev)
- 3 Sekcio de esperantistoj ĉe Bulgara Parlamento
- 4 Laŭ komuna vojo (Libertaria Mladenova)
- 6 Diskuto (Olga Cankova, Kremona Bâceva)
- 12 Eble venis tempo por ŝanĝoj (Maria Jankova)
- 15 Dum la streĉaj jaroj (Ivan Keremidĉiev-Esperov)
- 17 Omaĝe al granda aktoro (Lidia Raeva)
- 20 Originala verkaro (Nikola Pilev, Penka Papazova, Nikola Stranĝanski, Ljubomir Trifonĉovski)
- 24 Beletro: Falĉistoj (Elin Pelin)
- 32 Verda objektivo
- 36 Irako (Georgi M. Miĥajlov)
- 42 Esperanto en Afriko (Hans Bakker)
- 45 Rido en Gabrovo (Donĉo Ĥitrov)
- 50 Enlanda movado
- 54 Distroj
- 60 Bulgaraj fontanoj (Lilia Koleva)
- 62 Tra la mondo
- 64 Deziras korespondi

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia konsilantaro: Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Kunĉo VĂLEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: „Ĥristo Botev“ 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ — bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio

Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla per la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egelvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por la ceteraj landoj — 7.80 lv. Prezo de unuopa ekzemplero — 0.50 lv. aŭ 3 ned. gld.

„Bulgara Esperantisto“ havas abonantojn en 47 landoj.

Estas organizita regula surbendigo de „Bulgara Esperantisto“ por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Vidaĵo de Veliko Târnovo — loko de la tradicia Internacia Somera Esperanto-Universitato, kiu okazis por sepa fojo inter la 15-a kaj 21-a de julio 1989

*Kiel forĝi
esperantistojn?*

NI PRIPENSU KUNE...

Kiel leganto de „BE“ mi deziras partopreni la diskutemon „Kiel forĝi esperantistojn?“.

La redakcia intenco estas klara: disvastigi la Internacian Lingvon, plimulti la nombron de la esperantistoj, plibonigi ilian lingvan scipovon kaj reteni ilin en la E-movado.

Kia estas la nuna situacio? Mi ĝuste ne scias.

TEMO
DE LA NUMERO

Mi interesiĝas pri la nombro de esperantistoj, kiuj uzas Esperanton tiel bone, ke ili povas diri, ke ĝi estas ilia dua lingvo. Tiu ĉi estas la ĉasata celo, al kiu ni devas trovi la plej fruktodonan vojon — al la dua lingvo!

„Kiel forĝi esperantistojn?“ — Kiu starigas demandon — la majstroj aŭ dezirantoj? La temo, tiel formulita, ne trafas bone la celon. La vorto „forĝi“ supozas partoprenon de la majstro forĝisto; ankaŭ ĝi supozas objekton por prilaboro. La temo estas tiel formulita, ke la objekto — la vorto staras en akuzativo; ĝi atendas kaj ricevas batojn de la martelo. Certe, la Redakcio adresas

(Daŭrigo sur paĝo 10)



Jaro 58

N-ro 8 / 9

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO "KIRIL I METODIJ" — I GRADO**

CENT JAROJN ESPERANTISTA GAZETARO EN BULGARIO

Nikola ALEKSIEV

Dum tiu ĉi jaro la Esperanta gazeta-ro en Bulgario notas sian centjariĝon. Bulgario estas inter la unuaj landoj, en kiuj komencis tre frue aperadi periodaĵoj en Esperanto aŭ nacilingve, tamen subtene al Esperanto. Ili estis eldonataj kaj redaktataj de la pioniroj de la E-movado en nia lando, ĵus liberigita (1878) el kvinjarcenta fremda jugo. Inter la bulgaraj intelektuloj troviĝis personoj ege interesiĝantaj pri la problemoj de internacia komunikado kaj ties solvo pere de Volapuko kaj Esperanto. Mi citos nur la nomon de la konata en nia nova historio verkisto Vasil Drumev, famiĝinta kiel mitropolit Kliment, aŭtoro de patriota dramo „Ivanko“, ĉiam ankoraŭ surscenigata en la bulgaraj teatroj.

Sen pretendo pri fundeco mi mencias nur kelkajn el la tipe pioniraj Esperantaj periodaĵoj aperintaj en Bulgario ĉu en Esperanto, ĉu en la nacia lingvo depende de sia ĉefa direkto — por esperantistoj aŭ por neesperantista publiko.

Pluraj periodaĵoj ekzistis dum relative mallonga periodo. Tio estas memkomprenebla: ja la esperantista-

ro estis malmultnombra, la movado troviĝis en sia embria stato, Esperanto ne estis populara inter la vastaj rondoj de la socio. Tial oni povas nur miri pri la kuraĝo kaj sindonemo de la tiamaj pioniroj. Eĉ en la mondo ekzistis nur unu Esperanta gazeto „La Esperantisto“, aperanta en Nurnbergo (Germanio), kiam en nia lando aperis en oktobro de 1889 gazeto „Mondlingvisto“. Ties redaktoro kaj eldonanto estis la unua bulgara esperantisto Miloslav Bogdanov, publicisto, doktoro pri juro, fondinto de la dua en la mondo esperantista klubo en la ĉefurbo Sofio (post tiu en Nurnbergo).

Komence de la XX jarcento en Plovdiv aperis nova gazeto — „Rondiranto“, jam kiel organo de la juna bulgara E-movado. Ĝin eldonadis la loka esperantista klubo „Stelo“. Poste la literatura klubo en Sofio decidis subteni Esperanton kaj iniciatis la gazeton „Unua paŝo“ en Esperanto. Eĉ en la malgranda urbeto Gara Levski aŭdiĝis kuraĝa voĉo de gazeto „Trumpetisto“, eldonata de vere kuraĝa redaktoro kaj senpage disvastigata propagandcele...

En oktobro 1906 la Sofia esperantista klubo „Aŭroro“, helpata de la studenta literatura grupo „Unua Paŝo“, kunvokis en la ĉefurbo esperantistan kongreson por fondi landan E-organizaĵon. Estis decidite eldonadi komence de 1907 propran organon „Bulgara Esperantisto“. Sed „post la tria numero ĝi mortis“, kiel konstataĵo nia fama pioniro-samtempulo Atanas D. Atanasov — ADA.

La jaro 1907 estis jubilea por la internacia esperantistaro: pleniĝis 20 jaroj de post la apero de la unua lernolibro de Esperanto en la rusa (en julio 1887). Post la fiasko de sofiaj esperantistoj fondi landan organizaĵon, la esperantista klubo en u. Târnovo okupiĝis pri tiu tasko kaj realigis ĝin. Estis fondita Bulgara Esperantista Ligo (BEL) kaj la eldonata de la klubo revuo „Lumo“ fariĝis organo de BEL. Tiel oni metis la fundamenton de lande gvidata E-movado el unu centro (Târnovo). En 1910 „Lumo“ kaj „Rumana Esperantisto“ kuniĝis en unu komunan revuon „Danubo“ — tre solida eĉ de nuntempa vidpunkto Esperanta eldonaĵo, redaktata de miksita komitato kaj presata en Bukareŝto.

Tamen venis nigra tumulto periodo: eksplodis du balkanlandaj militoj (1912—1913) sekvitaj de la Unua Mondmilito (1914—1918). Ĉiuj ideoj movadoj, inkluzive la Esperantan, ĉesis funkcii. La diverslandaj esperantistoj estis ĵetitaj unuj kontraŭ aliajn. Nur post la finiĝo de la mondmilito BEL restariĝis jam sub la nomo Bulgara Esperantista Societo (BES). Ties organo, aperanta en Sofio, estas la reviviĝinta revuo „Bulgara Esperantisto“. Oficiale la fondiĝo de la revuo estas kalkulata de 1919. (Mi rapidas informi la legantojn, ke en 1969 kiam „BE“ notis sian 50-jariĝon, la Bulgara Parlamento distingis ĝin per la plej alta ŝtatordeno por kultura agado „Kiril i Metodij“ — unua grado (en oro). Tio estis granda honoro por la tuta esperantista movado en nia lando).

Post du jaroj estis fondita Geleranta Esperantista Asocio (1921) kaj

ĝi komencis eldonadi propran gazeton „Esperantista Gejunularo“. Tamen la faŝisma reakcio sufokis ĝin en 1926 malpermesante kiel la asocion, tiel ankaŭ ties organon. Tiu militiro de la faŝisma teroro kontraŭ la progresema organizaĵoj kaj ties organoj tuŝis en 1924 la fonditan en 1921 Komunistan E-Grupon en Sofio „Balkana Liberiga Stelo“ (BLS). Ĝi utilis por siaj celoj la ĉiutagan organon de BKP „Rabotniĉeski Vestnik“ kaj sukcesis publikigi valoran broŝuron propagandcele „La internacia lingvo kaj la laborista klaso“. Ties aŭtoro estas Panajot Kolev, gvida figuro de BLS, poste en BEA.

Post la terura frakaso de la ĝenerala laborista movado en nia lando (1923—1925) la malpermesitaj proletaj organizaĵoj komencis iom post iom reviviĝi sub novaj nomoj. La nova impeto en la batalo de proletaj amasoj kreis dum la periodo de 1927—28 inter la ceteraj ankaŭ laboristajn E-grupojn en Sofio kaj en provincaj urboj, eĉ en vilaĝoj. Iniciatita de Sofia E-Societo unua en Bulgario laborista E-revuo „Blakana Laboristo“ fariĝis organizanto de la laborista E-movado. Ne post longe en la mezo de 1930 estis sekrete fondita en Sofio Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA). „Balkana Laboristo“ tuj fariĝis ĝia organo. BuLEA aperigis ankaŭ du propagandajn periodaĵojn — „Mejdunaroden Ezik“ kaj „Mejdunaroden Rabselkor“, akirintaj grandan popularecon, precipe la lasta („MR“). Tamen somere de 1934 la okazinta nova faŝisma puĉo malpermesis ĉiujn proletajn organizaĵojn kaj ties organojn... De la fondita ĉe la redakcio de „MR“ biblioteko aperis nur unu numero en 1934 „La laborista klaso kaj la internacia lingvo Esperanto“ de Nikola Aleksiev.

Post la frakaso de la faŝisma reĝimo (9.09.1944) ĉiuj bulgaraj esperantistoj unuiĝis en la novkarakteran BEA kaj komencis aperigi novan grandformatan revuon „Internacia Kulturo“ (1945). Jam je la sekva jaro ĝi transformiĝis en komunan organon de balkanlandaj E-movadoj (Bulgario, Ju-

goslavio, Rumanio). Ĝi akiris bonan reputacion. La komunan redakcion partoprenis ankaŭ la juna kaj tre aktiva jugoslava esperantisto Ivo Lapenna, famiĝinta poste kiel gvidanto de UEA.

„Bulgara Esperantisto“ restis kiel organo de BEA. Krome la Komitato por Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando eldonadis en Esperanto belan luksan ilustritan revuon „Nuntempa Bulgario“, kaj la turista firmao „Balkanturist“ eldonadis same luksan ilustritan revuon „Ripozoj en Bulgario“. Depost 1973 en Bulgario ekaperis la organoj de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) — „Paco“ kaj „Pacaktivulo“. Dum 24 jaroj TEJA eldonadis en Sofio sian organon „Internacia Ĵurnalistoj“. Aperadas dum longaj jaroj ankaŭ la „Interligilo“, organo

de Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista E-Asocio (IPTEA).

Aktuale la bulgara Esperanta gazeto estas reprezentata far „Bulgara Esperantisto“ kaj la propaganda eldonaĵo „Panorama Esperanto“ (ĝis nun „Informacia Esperanto“).

Kiel konstateble, la bulgara esperantistaro oferis multon por ekiniciati kaj eldonadi diversajn esperantajn periodaĵojn dum longa kaj grava epoko en la vivo de la landa kaj internacia E-movado.

Ni ŝuldas honoron al la konataj kaj nekonataj redaktoroj, eldonantoj, disvastigantoj kaj legantoj de la E-eldonaĵoj de landaj kaj internaciaj periodaĵoj, aperantaj en Bulgario. Ni klinas kapojn antaŭ la heroaĵo de la veteranoj-pioniroj kaj sekvos ties noblan ekzemplon!

SEKCIO DE ESPERANTISTOJ ĈE BULGARA PARLAMENTO

Dum la kunsido de la Buroo de Interparlamentara Grupo ĉe Bulgara Parlamento la 17-an de majo k. j. estis fondita Sekcio de la Parlamentanoj-Esperantistoj. En ĝi partoprenas gravaj personoj el politika, ekonomia kaj kultura vivo en Bulgario. Ili estas:

SAVA DÂLBOKOV — prezidanto

ĴIVKO ĴIVKOV — vicprezidanto

D-ro **VLADIMIR KALAJĜIEV** — sekretario

JORDAN JOTOV

IVAN PRÂMOV

ĴELJAZKO KOLEV

VERA NAĈEVA

MARGARITA DUPARINOVA

IVAN VRAĈEV

TRIFON BALKANSKI

La prezidanto de BEA kaj prezidanto de novefondita parlamenta sekcio Sava Dâlbokov dividis antaŭ reprezentanto de la Redakcio:

— *La Interparlamentara Grupo reprezentas la tutan Parlamenton kaj kunlaboras kun parlamentoj de aliaj landoj serve al paco kaj amikeco inter la popoloj. Ties estraro, ĉekape kun d-ro Petâr Vutov, kunordigas la agadon de diversaj sekcioj ĉe la grupo, por ke ili helpu por disvolvo de la kunlaboro en humanitara, turisma kaj aliaj sferoj.*

Dum lasta kunsido de la estraro de Interparlamentara Grupo oni traktis la proponon de BEA pri fondo de esperantista sekcio ĉe Bulgara Parlamento.

Konsiderante la fruktodon

nan agadon de bulgaraj esperantistoj kaj nuntempa situacio por kreskigo de bonaj rilatoj inter la popoloj, la estraro de la Interparlamentara Grupo akceptis la fondon de la Sekcio de Parlamentanoj-Esperantistoj, konsistanta el 10 personoj. Tiu sekcio kontaktos kun ekzistantaj similaj sekcioj ĉe parlamentoj en Britio, Italio, Hungario kaj aliaj landoj. Ĝi kunlaboras al tuta parlamento por malmaligado, disvastigo de politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj rilatoj inter apartaj landoj kaj popoloj.

La parlamentanoj-esperantistoj kunhelpas la pacan politikon de Bulgario per disvolvo de interparlamentaj rilatoj, uzante la Internacian Lingvon.

„BE“

En la Buroo de CE de BEA

En sia kunsido la 31-an de majo k. j. la Buroo de CE de BEA prenis decidon pri konkretaj paŝoj rilate la plivastigon de la kunlaboro de Bulgara Esperantista Asocio kun Sovetrespublikara Esperanto-Unio (SEU) sur diversaj kampoj, aparte en turismo.

En la sama kunsido la Buroo pozitive pritaksis la laboron de Centra E-Kulturdomo — Sofio, dum la periodo 1988—1989. La instrulaboron en la ĉefurbo devas transpreni estonte la ĉefurbaj E-societoj ĉe la metodika helpo de la organizanto de BEA pri Sofio. Oni organizos seminarion por la estraranoj de la E-kulturdomoj en la lando, en kiu oni traktos diversajn aktualajn demandojn pri plibonigo de ties agado. Es-

tos organizita reto de bone preparitaj prelegantoj enkadre de la E-kulturdomoj. Oni decidis, ke la Junulara Sekcio ĉe BEA aktivigu la laboron de la junaj esperantistoj en la E-kulturdomoj. Por plibonigi la materialan bazon de la E-kulturdomoj oni devas ekuzi klubejojn de Patrolanda Fronto kaj aliaj sociaj organizaĵoj pro okazigo de E-kunvenoj kaj aranĝoj.

Oni akceptis Eldonplanon de BEA por 1990.

Estos fondita Scienca E-Societo — memstara jura personeco, kaj la aniĝo al ĝi okazos kun rekomendo de la E-societoj. Oni aprobos ties statuton kaj elektos estraron.

Evgeni GEORGIEV

KOMENCE DE LA NOVA LERNOJARO **LAŬ KOMUNA VOJO**

Por ke estu forta la E-movado necesas unue — ekzisto de esperantistoj, lerte parolantaj Esperanton kaj due — ke ili estu bone organizitaj. Ne gravas tiom la kvanto de la esperantistoj. Manko de unu el tiuj kondiĉoj kondukas al malfortiĝo de la movado. Kompreneble, ekzistas ankaŭ pliaj kondiĉoj, kiuj povas influi diversdirekte al ĝi, sed nun ni volus trakti la instrulaboron. Kio estas necesa por plenumi la unuan kondiĉon — por ekzisto de homoj bone komprenantaj kaj flue, korekte parolantaj la lingvon?

Unue — certigi bonan instruiston. Por ke tiu instruisto kapablu instrui la lingvon, gravas lia prepariteco. Ne povas bone instrui persono, konanta Esperanton je nivelo de I kaj II gradoj. Nuntempe la kursanoj plej ofte estas homoj kleraj, scipovantaj multajn lingvojn aŭ kun filologia klereco kaj kiam ili starigas prilingvajn demandojn, la instruanto ne konanta profunde Esperanton, kvankam instruito, eĉ filologo, certe ne kapablos respondi serioze. Instruante, tia persono nur povos citi gramatikajn regulojn,

ofte kun eraroj — jen de kie en la lastaj jaroj venas opinio, ke oni multe instruas gramatikon. Kvankam la gramatiko estas neignorebla ĉe la lingvoinstruado, la instruisto, kiu perfekte parolas la lingvon, konas ĝin profunde, estas metodike instruita kaj bone konas la E-movadon kaj literaturon ĉiam kapablos klarigi, ĉiam trovos novan manieron instrui apartajn gramatikaĵojn, instrui tiel, ke la homoj ne pensu pri la regulo, kiun ili aŭdas, sed pri ĝia apliko. Kaj la instruanto nepreparita — ĉu li helpas al la movado? Ŝajne li nur povas mallogi la kursanojn de la movado aŭ, en plej bona okazo, logi t. n. „amikojn de Esperanto“. Sed paroligi la kursanojn, instrui al ili ĝustan prononcadon, montri la riĉecon de la lingvo, prezenti al ili la historion kaj la literaturon — alivorte eduki esperantistojn — tia instruanto ne povas tion fari.

Due — same gravaj, por ke la kursanoj bone posedu la lingvon, estas la egalaj kriterioj de ilia pritakso. Tial la Instrua Komisiono komencas enkonduki kriteriojn, kiuj kompare kun la

kriterioj ĉe la fremdlingva instruado en nia lando, estas multe pli malaltaj. Tamen la enkonduko de la kriterioj estis delonge necesa, ĉar la pritakso de niaj kursanoj dependis nur de la kompreno de la instruanto. La kriterioj, kiuj aperis en aparta broŝuro (Regularo por eksterlernaj kursoj), celas nuligi tiun mankon kaj egaligi la pritaksojn, respektive — la postulojn ĉe la lernado de Esperanto en la tuta lando.

La strebo de ĉiu societo estas organizi kurson de Esperanto — ja de la kursoj venas novaj societanoj. Do, estas trovita ejo, estas elektita bona instruisto, estas farita vasta propagando. Ofte en la pli grandaj urboj oni organizas po kelkajn kursojn. Sed se estas du unuagradaj grupoj po 8—9 personoj, pli bone unuigu ilin, ĉar la kurso devas memfinanciĝi. Tial oni ne devas organizi kursojn kun nesufiĉa nombro de kursanoj. Ĉe la fino devas esti almenaŭ 10—12 personoj.

Alia problemo ĉe la organizo de kursoj — ĉu nur kursojn por komencantoj devas organizi la societoj? La ordinara praktiko nun estas tia. Tamen oni nepre devas strebi al organizo ankaŭ de kursoj por dua kaj tria gradoj. Por organizo speciale de triagradaj kursoj kelkaj teritorie proksimaj societoj povas unuigi siajn penojn, serĉante helpon de la Instrua Komisiono por elekto de taŭga instruisto. Tiumaniere la societoj mem zorgos plialtigi la nivelon de lingvoscioj de siaj membroj. Multaj pro diversaj kaŭzoj ne povas viziti Internacian Esperanto-Kursejon kaj

partopreni tie en la kursoj. Tial organizo de kursoj por progresintoj en ilia loĝloko estas necesa kaj utila. Ni ne forgesu ankaŭ pri la lernejaj kursoj, ĉar ilia organizo same estas devo de la societoj. La societaj estraroj laŭ la direktivoj certe jam en junio-julio akceptis planojn por la organizo de la instrulaboro dum la sekva lernojaro. Nun ni devas aktive propagandi per ĉiuj eblaj rimedoj. En la lernejoj oni devas preparoli la demandon pri la fakultativa instruado kun la direktoro. Sed ankaŭ tie estas necesa propagando kaj agitado — kolektiva kaj individua. Se necese, oni povas organizi por civitanoj kaj lernantoj prelegojn bulgarlingve — pri la E-movado, pri apliko de Esperanto en la vivo k. s. Gravas certigo de konvenaj ejoj, de lernolibroj, instruhelpiloj ktp.

Kaj jen, la kursoj funkcias, ilin gvidas bonaj instruistoj — sed pri tio scias nur la societoj mem. Malgraŭ la oftaj leteroj, senditaj de la Instrua Komisiono kaj postulantaj plenan informon pri la kursoj (nombro de kursanoj, horoj, tagoj kaj loko de okazigo) kaj iliaj gvidantoj (nomoj, adreso, klereco, profesio, E-diplomo...) daŭre respondas al tiuj leteroj nur triono, eĉ kvarono de la societoj. Ĉu malfacile estas sendi respondon — ankaŭ en okazo, kiam kurso ne estas organizita. Memoru, ke manko de informo malhelpas klare vidi la situacion en la lando kaj ŝanĝi ĝin en pli bona direkto.

Libertaria MLADENOVA,
metodikisto ĉe Instrua Komisiono

PEDAGOGIA KONFERENCO

La 25-an de junio 1989 en Sofio estis okazigita pedagogia konferenco, kiun partoprenis Esperanto-instruistoj el la lando.

En la raporto de la Instrukomisiono pri la lernojaro 1988/1989 estis montritaj ĉiuj faroj de la Komisiono lige kun la organizo de la Naciaj kaj la Internaciaj feriaj kursoj kaj la mankoj en la kunlaboro kun la apartaj societoj. En la fino de la raporto estis analizitaj ĉiuj ricevitaj informoj pri organizitaj de la societoj kursoj (informoj venis de 58 societoj, kvankam registritaj estas pli ol 180). Post tre viglaj kritikoj kaj diskutado estis akceptitaj jenaj

1. La lerno en la tuta lando komenciĝu ĉirkaŭ la 2-a de oktobro.

2. En la komenco de septembro oni fiksas la lokojn kaj la gvidantojn de la kursoj kaj komencu regulan propagandon per la lokaj amaskomunikiloj, afiŝoj, agitvitrinoj kaj parolo (prelegoj, disputoj ĉirkaŭ la ronda tablo, amuzvesperoj, artaj programoj k. a.).

3. De la 20-a ĝis la 30-a de septembro oni organizu verdan dekadon realigante ĉiutage prelegojn en kultursocietoj kaj — domoj, klubejoj de Patrolanda Fronto, fabrikoj, lernejoj, en la nomo de organizaĵo „Georgi Kirkov“ kaj ĉie, kie tio estus ebla kaj utila. Se eble invitu eksterlandajn esperantistojn por demonstri la komunikajn kvalitojn de Esperanto. Al tiu ĉi kampanjo aliĝu

ankaŭ plej aktive la Esperanto-instruistoj.

4. Ĝis la 15-a de oktobro la societaj estraroj (ankaŭ tiuj, kiuj ne organizis kursojn) sendu al la Instrua Komisiono informojn pri la komencitaj kursoj kun ĉiuj necesaj elementoj (ĝenerala nombro de la kursanoj, nombro laŭ aĝo, adreso de la kurso, nomo kaj adreso de la instruisto).

5. Almenaŭ 80% de la esperantistoj devas partopreni en kursoj aŭ aliaj formoj por progresintoj. (Por gvidantoj de konversaciaj rondoj oni povus utiligi bonajn esperantistojn sen diplomo por instrurajto.)

6. Ĝis la fino de septembro la societoj sendu al IK proponojn por aljuĝo de honortitoloj al plej bonaj kursgvidantoj, observante la Regularon por aljuĝo de titoloj...

7. Dum decembro kaj

januaro organizi departamentajn seminariojn por interŝanĝo de sperto pri la organizo kaj metodiko de Esperanto-instruado.

8. La societaj estraroj ĝis la 6-a de februaro (por unua semestro kaj ĝis la 15-a de junio por la dua semestro) sendu al IK informojn pri la rezultoj de la instruado: kiaj kursoj realiĝis, nombro de la instruistoj, nombro de la kursanoj en la fino kaj kiom el ili faris sukcese la ekzamenon.

9. Ĉar la kursoj ordinare estas memfinancantaj, la grupoj ne devas esti malgrandaj. La optimuma nombro estas ĉ. 20. Ĉiukaze ne devas esti malpli ol 7 personoj.

10. La societaj estraroj observu la Regularon pri Eksterlernejaj kursoj. IK kritiku ties rompintoj en konferencoj kaj per „Bulgara Esperantisto“.

RAKONTAS LA INSTRUISTO

MIA PUBLIKA LECIONO

La 30-an de marto 1989 mi organizis publikan lecionon de Esperanto en Meza Faklernejo pri Konstruado „Georgi Dimitrov“ — Stara Zagora. Jam tri jarojn mi laboras en tiu lernejo kiel instruistino de franca lingvo kaj Esperanto. En la lernejo funkcias E-klubo. Gastoj al la leciono estis M. Băcev el Sofio, E. Zločevska — sekretario de urba E-societo kaj multaj instruistoj de la lernejo. La leciono estis pri aku-

zativo de direkto.

Unue ni ripetis la sufiksojn -ist, -il, -ej. La gelernantoj parolis pri sia estonta profesio. Ili deziras esti konstruistoj, maŝinistoj, kantistoj, instruistoj. Per multaj ekzemploj ili pruvis la komprenon de la nova gramatika materialo. Fine de la leciono unu lernanto ludis per ĝitaro kaj ĉiuj kantis „La adiaŭa-n kanto-n“.

Por la unua fojo mi laboras per „Ekzercaro por ele-

menta kurso de Esperanto“ de Neno Janev. Mia opinio estas, ke ĝi tre koncize klarigas la gramatikon, sed bedaŭrinde mankas ekzercoj. Tio estas grava problemo por la instruistoj. Ĉiam mi skribas strukturajn ekzercojn sur folioj, kaj poste mi disdonas ilin al la gelernantoj. Necesas eldoni lernolibrojn kun leksikaj kaj gramatikaj ekzercoj.

Stefka PETROVA
Stara Zagora

Estimataj legantoj,

Vian grandan intereson vokis la malfermita sur niaj paĝoj diskutado pri la instrulaboro de BEA (n-roj 11/1988 kaj 4/1989).

En la redakcion daŭre venas viaj opinioj tiurilate. La revuo estas libera tribuno de diversflankaj ideoj, ĉar nur — laŭ tiu vojo, dum prudenta diskutado, naskiĝas la vero.

Nun ni disponigas lokon al la opinio de Olga Cankova el Veliko Târnovo kaj al la artikolo de Kremona Bâceva el Sofio.

„BE”

KIUJ PRAVAS?

Mi ne intencas arbitri. Pri la artikolo de P. Stojanov (n-ro 4/89 de „BE”) mi preta esprimi opinion des pli, ke mi profesie instruas fremdan lingvon.

La tuja reago post aperigo de KISA-dokumento en „Bulgara Esperantisto” estigis disduigon de pritaksoj. Laŭ mia opinio la du flankoj malpravas kaj pravas. Kial?

Punkto 4 (n-ro 11/1988), per kiu KISA pledas por la gramatika instruado de Esperanto malkonformas al la moderna tendenco de fremdlingva instruado. Mi estis ŝokita de tia prijuĝo, ĉar ĉiuj nunaj metodoj estas negramatikaj. Instruado de Esperanto per gramatiko povas esti bona, sed — eksmoda. Per tiu aserto KISA neas la pedagogian heredaĵojn de la fama Ĉe-metodo. Ni memoru, ke en siaj „EKZERKARO” kaj „LINGVAJ RESPONDOJ” Zamenhof ne uzis gramatikajn klarigojn. Gramatikajn nociojn ne bezonas kursanoj, sed instruisto. Sed li devas praktike instrui ĝin. Ĉefa laboro estas trejnado, aŭtomatigo de strukturaj modeloj kun ŝlosilvortoj, sintagmoj.

Mi dezirus tuŝi ankaŭ problemon, pri kiu ni malsamopiniis. Ni forgesas, ke Esperanto estas lingvo UNUE. Pli ol lingvo — E-movado — POSTE. Estas publika sekreto, ke la plimulto de bulgara esperantistaro estas nesufiĉe klera. Tion ja konstatas P. Stojanov mem. La enketo (1985) iniciatita de C. Ignev oficiale konstatas tion. Pri tiu bedaŭrinda stato kulpas kaj E-instruistoj, kiuj ne regas la lingvon, kaj la kursanoj, kiuj ne lernas la lingvon diligente. Kial? Mi opinias, ke la esperantistoj ne flegas sian lingvan nivelon, konsideras ĝin negrava. „Ĉiuj eraras en Esperanto”, „Mi komprenis la sencon” — tiaĵoj ofte aŭdeblas.

La instrurajto povas esti ekstera flanko laŭ D. Mutuŝev (n-ro 4/89), sed la lingva nivelo de E-parolanto ankaŭ estas ekstera flanko, sed reprezentiga. La intelektaj kapabloj de E-instruanto gravas kiel por la E-kurso, same tiel por la aŭtoritato de la Esperanto-movado. Okazas, ke estas kandidatoj gvidi kursojn, estri societojn, sed kandidatoj ekzameniĝi forestas.

Miaopinie la stranguloj, t. e. ambiciuloj ofte malutilas al la E-movado. La E-veteranismo, kies fuŝa propagando pri 16 gramatikaj reguloj kaj verdismaj sloganoj rezultigis la falsan statistikon rilate la ĝustan nombron de la esperantistoj.

Nun, pri la peto de P. Stojanov: mi samopiniis kiel D. Mutuŝev, kiam ne estas rajtigataj E-lektoroj. Do, P. Stojanov povas gvidi kurson nur por komencantoj. En lernejo nediplomitaj instruistoj ricevas malpli da mono. Tio devas validi same por E-lektoroj. Sed KISA-anoj devas helpi al P. Stojanov: montri kiamaniere instrui la lingvon. En la pasinteco Simeon Ĥesapĉiev faradis perlecionajn vizitojn en diversaj bulgaraj lernejoj. Daŭriginda tradicio! La instrukomisiono ĉe BEA per „Metodika gvidlibro” de M. Bâcev kaj M. Elenov (1983) kontribuis al la moderna E-instruado. En la antaŭparolo de tiu metodikilo, la redaktoro Ĥ. Haĉikjan pravas, ke Esperanto kiel lingvo havas sian specifon, kiu postulas specialajn pril-

mojn. KISA devas labori tiu-
cele.

Ni dezirus, ke KISA
(Instrua Komisiono) denove
prilabori sian strategion, ak-
tualigi ĝin. KISA ne devas
ordoni, sed rekomendi. La E-
lektoro laŭ sia sperto elektos
modelon (varianton). El ĉiuj,

KISA povus diskonigi
la plej bonajn modelojn dum
metodikaj seminarioj. Sed
ankaŭ KISA-anoj devas pre-
zenti modelajn lecionojn.
Dum la 5-a Internacia Meto-
dika Seminario en Pisanica
(1987) neniu IK-ano faris
lecionon. La samo validas
por la rekonitaj lektoroj.

En oficialaj dokumentoj
KISA devas apliki la deci-
dojn de la Akademio de Es-
peranto: uzi nur FARE DE.

Laste, estus utile organizi
lingvo-konkursojn dum E-
aranĝoj. Tiurilate mi certas,
ke ne mankos ideoj.

Olga CANKOVA

Instrui Esperanton estas respondeco

*„En la kurso plej grava estas la personeco de la instruisto. Li
povas sukcesigi la plej malbonan metodon kaj povas detrui la
plej bonan.”*

Andreo Cseh, El „Kelkaj konsiloj al la instruistoj”

1. EMI INSTRUI NE SIGNIFAS KA- PABLI INSTRUI

Preskaŭ ĉiu esperantisto volas instrui la
lingvon kaj estas neeble malpermesi al iu
ajn fari tion. Pli gravas klarigi kial li prefere-
tion ne faru.

**1.1. La instruisto estas la sola lingva
aŭtoritato** (se mankas bonaj instruhel-
poj, kio ĉe ni estas la kazo).

Komence la instruisto estas la sola paro-
lanto de la lingvo, kiun la kursanoj konas
kaj certgrade reprezentas la lingvon. Nur
damaĝas al Esperanto instruistoj balbutan-
taj ĝin aŭ eĉ nur fuŝe prononcantaj, ĉar pro
tio oni taksas la lingvon mem malbelsona
kaj kaosa. Homoj, kiuj ne posedas la ling-
von, ne estas maturaj por instrui ĝin, kaj mi
dubas, ke instruistoj, kiuj mem faras erarojn
atingas bonajn rezultojn. Mi havis foje kur-
saninon en elementa kurso, kiu diplomiĝin-
te kun noto „kontentiga”, aŭdacis instrui
Esperanton la saman jaron!

**1.2. Instruistoj devas kapabli ne nur
kompreni, sed ankaŭ klarigi la
strukturon de la lingvo.**

Posedi la lingvon estas ĉefa antaŭkondi-
ĉo, sed ne nepre certigo, ke oni povas an-
kaŭ instrui ĝin. INSTRUI ESTAS METIO,
KIES SUBTILAĴOJN ONI DEVAS ELLER-
NI KIEL TIUJN DE LA LINGVO MEM. Oni
jam ekde jarcentoj cerbumas kiel plej efike
instrui kaj kial nun iuj eltrovu la „kuren-
ton”? (cetere Cseh nek inventis la metodi-
kon de fremdlingva instruado, nek diris en
ĝi la lastan vorton). Pri tio oni okupiĝas kaj
teorie, kaj praktike en la kursoj por instru-

rajto. Mi ne komprenas tiun dilemon —
instrui aŭ ne post finita supera kurso. Mi
nur miras, ke ili ne aliĝas al kurso por
instrurajto! Aŭ ili timas la rezultojn?!

1.3. Ni ne surtretu la animojn de la kursanoj

Dum kurso oni plene fidus je la kursgvi-
danto kaj liaj pritaksoj. Multege da
instruistoj esperas restigi en la movado la
kursanojn „donacante” al ili altajn notojn.
Tiun tradicion kelkiuj daŭrigas ankaŭ en la
meza kaj supera kursoj. Tial pri la objekti-
veco de la pritakso de iuj kolegoj mi jam
efektive dubas. (Mi instruis en ĉiuj specoj
de kursoj escepte de la tradukista kaj en ĉiu
instrugrado gvidis almenaŭ kvar kursojn —
entute pli ol 20.) La postsekvoj estas fata-
laj — ni aŭ malhelpas la laboron de niaj
kolegoj, aŭ dolorigas la kursanojn mem pro
la granda diferenco en la rezultoj. Ni ne
agu infanece — la kursanoj ne ofendiĝus,
se ni komprenigis al ili kie ili eraris. Tiel ni
kaj forpelas la homojn — per nia subjekti-
veco kaj ĉar ni misfamigas ilin — kaj malal-
tigas daŭre la nivelon de nia esperantistaro.
Ja niaj eksaj kursanoj estiĝas instruistoj!
Foje kolego volis starigi dum ekzameno pri
instrurajto noton „bona” al kursanoj, kiuj
faris pli ol 50 eraroj. Vi mem prijuĝu, ĉu mi
estis arbitro severa insistante, ke ili ankoraŭ
ne maturas por estiĝi instruistoj. Diplomiĝu
nur tiuj, kiuj povas daŭrigi la lernadon en
pli alta kurso. Instrui Esperanton kun noto
kontentiga estas hontige. Ni finfine ĉesu
paŝi en la animoj de la kursanoj kaj estimu
ilin!

2. ĈIU SOCIETO ORGANIZU KURSOJN (ĈU?! FLORU LA AMATORECO!)

Jen nova temo, ne malpli diskutiga. Mi kuraĝe asertas, ke ne ĉiu societo maturas por organizi kursojn altnivelajn. (Ja fine ni komprenu, ke gravas la kvalito de nia esperantistaro, kaj ne ĝia nombro!) Mi eĉ ne opinias, ke ĉiu societo nepre devas fari tion. Oni organizu kursojn, nur se oni disponas pri bonaj instruistoj. Mallerta kursgvidanto produktas homojn, kiuj forfuĝinte de la kurso trumpetas, ke Esperanto estas aĉa lingvo — ja ili jam okupiĝis pri ĝi. Kaj cetere kiu kaj kial asertas, ke diplomo pri instrurajto atestas mankon de bonkoreco aŭ eĉ de animo?!

Se oni ne disponas pri bonaj instruistoj, prefere organizu bonan kurson en najbara urbo. Tiel ni tuŝas la sekvan problemon.

3. TRIMONATA ENURBA KURSO Aŭ TRISEMAJNA FERIA?

Ŝajne preferindas enurba kurso — oni laboras kaj digestas la novaĵojn trankville, prepariĝas en la plej oportuna tempo. Sed niaj kursanoj aktivas ankaŭ profesie, socie, havas familiojn. Ofte ili ne povas ĉeesti kaj kiam ili ĉeestas — lacaj, maltrankvilaj — ili pensas pri la ankoraŭ farendaj taskoj. Male — la feria kurso forigas dumtempe tiujn zorgojn kaj ebligas restadon en esperantista medio, kie ĉiuj strebas alproprigi la lingvon. Kaj krome en feriaj kursoj instruas nur la plej bonaj instruistoj...

4. FOR LA GRAMATIKON! (VIVU LA LINGVA KAOSO!)

Fine mi tuŝu la doloran punkton en la disputoj inter la du ĉefaj grupoj de instruistoj en Bulgario — la instruadon de gramatiko. Ĉu vi, estimata leganto, komprenas tiun frazon: al mi oft pri interes vesper en vi park la pens leter kie renkont unu iĝ am pri foj ni promen? Mi dubas, kion vi komprenis. Vi divenu, kiom da sencohavaj frazoj oni povus fari uzante nur tiujn (sed ĉiujn!, se vi faros la ekzercon) radikojn. En Pisanica foje mi instruis al ekskursanoj de kolego, kiu instruis nur vortojn. Tial la kursanoj ne povis diri: „Mi preferas trinki kafon“, kvankam ili konis parkere la radikojn.

LA INSTRUADO DE GRAMATIKO ESTAS NEPRE NEĈESA — la problemoj nur estas kiel instrui ĝin. Mia sperto pravas, ke gramatikece instruas precipe homoj, kiuj ne

komprenas la gramatikon kaj malbone regas ĝin. Tial ili postulas parkerigon de reguloj, recito de ekzemploj ktp. — tio ja estas pli facila ol instrui pensi memstare. Ankaŭ la memstarajn pensojn oni devas poste kontroli...

Kutime oni damnas la instruadon de gramatiko sin apogante al Cseh. Nenio pli ridiga. Ĝi pravas, ke oni aŭ ne scias, kio estas gramatiko, aŭ ne komprenas la metodon de Cseh.

Mi ne komprenas ankaŭ kial Olga Cankova, kiun mi tre estimas, miskomprenis la tiom klaran starpunkton de KISA pri tio. Fakte ŝi defendas la saman pozicion! (la redakcio de „BE“ ebligis al mi legi la artikolon anticipe).

Mi volas fini per prezento de kelkaj proponoj, kiuj laŭ mi helpas al la altigo de la lingva nivelo de nia kursano kaj sekve ankaŭ de nia estonta instruistaro. La unuaj tri punktoj estas alternativaj. Nu, ek al la disputo!

1. Antaŭ ĉiu kurso (escepte de la komenca) okazu testo pri la lingva nivelo de la estontaj kursanoj (Tio nepras almenaŭ antaŭ la kurso por instrurajto!)
2. Aliĝi al pli alta kurso rajtu nur kursano fininta la antaŭan kun noto almenaŭ tre bona 4.50 (se pri instrurajto — 5.00), sed oni konsideru p. 4.
3. Se p. 1 aŭ 2. ĝenas vin, forigu la notojn! Diplomojn ricevu nur la plej bonaj, kiuj rajtas daŭrigi la lernadon. Partopreno en supera kurso estu distingo! Tiel oni mem strebos al tio.
4. Oni nepre kontrolu, ĉu oni ĉie aplikas la novan pritakso-sistemon proponitan de KISA, kiu malhelpas la subjektivecon.
5. Oni instigu la instruistojn partopreni metodikan kurson.
6. Oni organizu fakajn renkontiĝojn de instruistoj, kie oni pridiskutu anticipe fiksitajn metodikajn problemojn.
7. Oni dividu la kurson por instrurajto en du partojn — metodikan kaj historian. Lerni instrui la lingvon estas tro serioza tasko, kiun oni ne povas solvi en 10 tagoj...

Kolegoj, ni laboru obstine kaj altnivele. For la amatorecon! Ni ne forgesu, ke instrui Esperanton estas respondeco — ja ĉiun nian eraron oni atribuas al la lingvo mem aŭ al la movado.

Kremona BACEVA

Kiel forĝi esperantistojn?



demandon al pedagogoj, al pedagogia sistemo, kiel forĝejo de la esperantistoj. Ni scias, ke la instruistoj finis perfekte sian devon, la lernantoj scias bone materialon. Tamen, la turmentigo venas poste...

Antaŭ 63 jaroj la respondo al la sama demando donis Asen Grigorov. Li ankaŭ uzis vorton „forĝi”, kaj ankaŭ metis en akuzativon „esperantistojn”, skribante „... ni streĉu niajn fortojn dum libertempa somero por forĝi el ni esperantistojn!” Li ankaŭ klarigis kiel, do, ni faru tion: „Ni freŝigu kaj riĉigu niajn lingvokonojn, ni havigu al ni Esperantan legaĵon — librojn kaj gazetojn”. Bona rekomendo, sed ĉu la simila rekomendo estas sufiĉa hodiaŭ por atingi la ĉelon?

Kompreneble, la problemoj estas malsimpla, komplikita.

Mi prenis la parolon partopreni la diskuton, sed mi ne pretendas, ke mia opinio estas bonega. Mi nur dezirus provoki pli bonan, pli konvenan proponon. La demando „Kiel forĝi esperantistojn?” (aŭ „Kiel la esperantistaro ne forlasu E-movadon, kiel oni daŭrigu uzadi lingvon senĉese, kiel oni ligu homojn kun Esperanto?”), meritas seriozan konversacion ĉe la ronda tablo — buŝe kaj skribe.

Jen, sekvas mia propono.

La ĉefa motivo, kiu retenas min (mi pensas pri aliajloj!) en la E-movado estas:

intereso, utilo, kiu ajn subteno de la fajro de la deziro, atendo ricevadi iun plezuron, iun emocion kaj kontentigon de miaj stimuloj al sciencaj konoj, aŭskulti ĉiutagajn radioelsendojn kaj televidon kun E-programeroj, ekscii iun freŝan novaĵon venantan el malproksimaj anguloj de la terglobo, tralegi novajn E-gazetojn, librojn k. m. s.

Tiel ni, konsumante, subtenos apetiton, ripetante —

perfektigos la lingvajn sciojn. Ordinaraĵoj pensoj, konataj rimedoj, kiujn la pedagogoj bone scias.

Fakte, ni apartigas multe da fortoj al la E-movado nur kiel lingva movado. Esence, la lingvo estas nur rimedo (Oni ja scias: pri la rimedo sendube oni devas zorgi, sed plena enradikigo de la I. L. troviĝas en la „ekstermovada agado”). La artikolo de Nikola Nikolov („BE”, n-ro 3/89) plaĉas al mi. La pozicio montras konvenan uzadon de la lingvo.

Oni devas serĉi diversajn kampojn por semi grajnoj.

Verŝajne ni ĉiuj scias kion devas fari, sed baza demando estas kiel ni faros ĝin?

Mi pensas, ke la organiza laboro estas grava faktoro, sed la organiza proceso estas peza tasko. Iufoje la organizanto faras pli multe ol laboranto.

Nun mi utiligos okazon aldoni kelkajn rimarkojn, kiuj kunligas kun la sama temo.

Dum la kunvenoj oni povas komuniki informojn pri la enhavo de E-eldonaĵoj: pri revuoj „BE”, „Heroldo de Esperanto”, „Esperanto”, „Paco” k. a. kaj pri la novaj libroj el la tuta mondo. Ne ĉiu ricevas ĉiujn esperantaĵojn.

Pri Parolanta Rondo. Ĝi estas konvena formo, kiu apogas la perfektigon en la lingvo. Oficiaj oni devas subteni ĝin.

Mi proponas fondi en la E-klubejoj angulon kun malnovaj E-libroj — brokantaĵoj.

Ĉu nun en Sofio ekzistas E-biblioteko? Kiel funkcias Bulgara E-Muzeo dum la lastaj dek jaroj? Kiom da libroj ĝi posedas kaj ĉu ĝi riĉigas sian trezorejon? Kiom da legantoj uzas bibliotekon?

Mi opinias, ke pli bone estas, se la tutan libraron ni transdonas al Sofia Urba Biblioteko kiel speciala ĝia parteto. Oni havas sufiĉe da bibliotekistoj. Ni okazigu kampanjon, dum kiu ĉiu esperantisto donacu kelkajn E-librojn.

D-ro Nikola DONEV,
1113 Sofio

ul. „Anri Barbjuŝ” 22, bl. 131

GRAVAS LA INDIVIDUA LABORO

Tre aktuala temo por diskutado inter ĉiuj jam forĝitaj esperantistoj, profunde konvinkitaj en la praveco de E-ideo kaj kiuj, plenumante sian devon al la movado kaj Internacia Lingvo, devas eduki sian posteularon je la Zamenhofa ideo.

Eble unue, ĉiu jam forĝita esperantisto devas respondi kiamaniere trafis en lin la E-sono, kiamaniere ĝi elkreskis kaj certe tiam ni trovos la veran respondon de la problemo kiel ni forĝas esperantistojn.

Oni forĝis min tiel: dum la somero de 1943, mi feriante kiel gimnaziano, senpage laboris laŭ mia deziro en kooperativo en vilaĝo Maraŝ, Ŝumen-regiono. Mia granda deziro estis eklerni la tajpadon, kia tiutempe oni povos trovi nur en tiaj oficejoj. Tie laboris ankaŭ mia „forĝinto“ Panajot Ĥristov Kalkov — konata kontraŭfaŝisto, kiu loĝis en vilaĝo najbara Divdjadovo, sed laboris en Maraŝ. Post la fino de labortago nia vojo hejmen koincidis ĝis kantondomo, en kiu mi loĝis, situanta meze de la vojo al Divdjadovo. Dumvoje ni interparolis pri diversaj temoj. Kaj subite inter tiu abundo de temoj aperis la temo pri Esperanto. Komenciĝis la lernoĵaro kaj mi forĝis pri Esperanto. Foje, traserĉante la bibliotekon de mia pli aĝa amiko, hazarde mi trovis libreton „Ŝlosilo de Esperanto“.

Tio sufiĉis. Ekde tiu momento mi jam estis kaj por ĉiam restis konvinkita kaj fervora esperantisto.

Do, mia forĝado rezultis dank' al la individua laboro de mia amiko Kalkov kun mi. Li ĵetis la grajnon, kiu ĝermis, elkreskis kaj ĝis nun vivas en mi. Mi estas profunde konvinkita, ke la kreado de esperantistoj devas okazi principe pere de individua varbado. Tio donas plej bonajn rezultojn.

La E-kursoj rapide kaj amase allogas partoprenantojn influate de la troigita tezo pri la facileco de la lingvo. Tiuj gekursanoj restas sub la impreso, ke vizitante unu-du aŭ tri lecionojn kaj „tradormante unu-du-tri noktojn kun la lernolibro subkusene, ili posedos la lingvor. Sed konstatinte, ke tio ne okazis, ili rifuzas. Kompreneble al tio kontribuas la rolo de instruistoj, ankaŭ aliaj faktoroj eksteraj, sed finrezulto estas malmultaj sukcesintoj, kaj ankoraŭ pli malmultaj el ili fariĝas

dumvivaj esperantistoj — kio estas la celo.

Evidente ni ne ĉesos organizi kursojn kaj instrui la dezirantojn. Sed, almenaŭ mia sperto tion pruvas, ke se tiuj gekursanoj ne estas varbatataj por organiza laboro en la societo ankoraŭ dum la unuaj lecionoj de Esperanto, la celon oni ne atingos.

Mi eksperimentis dum la lernoĵaro 1987—88 (kun risko fiaskigi la kurson post pli ol 20-jara kursgvidado) aktivan aligon de la kursanoj al organiza vivo. Preskaŭ ĉiuj vizitis diversajn Esperantajn aranĝojn en aliaj urboj kaj ekkontaktis kun esperantistoj el la tuta lando. Tiumaniere ili plialtigis la memsenton, komencis plenumi kantojn ellernitajn dum tiuj aranĝoj. Kelkaj el ili poste partoprenis E-kursojn en Pisanica kaj jam estas aktivaj esperantistoj. Ĉi-jare junulo el tia kurso gajnis la unuan premion en la Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Stara Zagora. Preskaŭ duono de tiuj kursanoj nun aktivas en nia societo. Tri personoj jam estas pretaj gvidi la kursojn, kaj tiamaniere transdonos la stafetbastonon en la semado de Esperanto. Unu el tiuj kursanoj nun estas departementa organizanto de BEA.

Sed mi devas kategorie emfazi, ke tiu allogo fariĝis realeco pere de celdirektita individua laboro kun la gekursanoj.

Ĥristo TONEV

Eble venis tempo por ŝanĝoj

● Kelkaj impresoj pri IX Internacia Konkurso-Recitalo de Boteva kaj Bulgara Revolucia Poezio en Esperanto



(26—28.05.1989 — Vraca)

RAPORTAJAJ EROJ

La ĉi-jaran aranĝon partoprenis 34 individuaj plenumantoj kaj la ensembloj el 17 loĝlokoj. La internacia partopreno estis certigita flanke de la lernantino el Hungario Timea Dobrocsik. Ŝi gajnis la unuan premion en la Nacia Deklamkonkurso en Szombatheli.

Havinte jam sufiĉe da sperto, la organizantoj — Komitato pri Kulturo, CK de la Komsomolo, Supera Teatra Instituto „Kr. - Sarafov“, Bulgara Esperantista Asocio, Boteva Organiza Komitato kaj E-societo „Sukceso“ en Vraca kaj la dommastro — urba Kemia Entrepreno, en kies Kulturdomo pasis la Konkurso-Recitalo, bone sin prezentis. Krom la perfektaj kondiĉoj, ili certigis al la partoprenantoj kaj gastoj tre bonan organizadon kaj riĉan kulturen programon. Ni ĝuis la ekspozicion „Ikonoj kaj preĝeja ritvazaro el Vraca-regiono“ aranĝitan en preĝejo „Sankta Sofronij Vraĉanski“ kaj etnografian renesancan komplekson ĝuste malfermitan okaze de solene celebrata 250-jara datreveno de la naskiĝo de fama bulgara renesanculo Stojko Vladislavov — episkopo Sofronij Vraĉanski. La konkurso-Recitalo okazis en kadre de la tradiciaj Naciaj Kulturaj Festoj de la 25-a de majo ĝis la 3-a de junio dediĉitaj ĉi-jare al la 113-jariĝo de la heroo

pereo de Ĥristo Botev kaj lia taĉmento, oferintaj sian vivon por la nacia libero de Bulgario, tiam ĝemanta sub kvinjarcenta osmana jugo. Al la sekvaj generacioj Botev testamentis ne nur sian heroan ekzemplon, sed ankaŭ sian genian poezion:

***Vespero venas, luno ekbrilas,
surŝutas steloj foron ĉielan,
arbar' susuras, vento sopiras,
Balkano kantas kanton ribelan***

La kulminon de nia kultura programo donis la spektaklo „Flugado per ganto“, de Dora Ruskova kaj Rumen Nikolov prezentita de la juna kaj tre talenta kolektivo de la urba pupteatro. Per tiu spektaklo la kolektivo gajnis la Grandan Premion en la Monda Pupteatra Festivalo en Belgio 1989. Mi nur rimarkos, ke dum la prezentado 9 aktoroj mane — per siaj fingroj, prezentis 150 pupojn. Por ni — esperantistaj spektantoj, estis agrable ekscii, ke la ĉefrolulo Emil Penjaŝki estiĝis artisto dank' al Esperanto kaj pli ĝuste dank' al Boteva Konkurso-Recitalo. En 1982 li partoprenis ĝin kaj la gajno de la granda premio donis al li rajton prezenti sin rekte al la dua etapo de la konkursekzameno en la Supera Teatra Instituto.

EL DIVERSAJ VIDPUNKTOJ...

Bedaŭrinde ĉi-jare la granda premio ne estis aljuĝita. Kompreneble el tiu fakto ni

ne povus konkludi pri la tuta arta nivelo de la Konkurso-Recitalo, sed la impresoj de la ĵurianoj, organizantoj kaj spektantoj koincidas. Por esprimi ilin mi citos la prezidanton de la ĵurio — Kunĉo Vâlev, prezidanto de la Komisiono pri Kultura Agado de BEA: „Kvanto granda, kvalito malgranda“. Ĉiuj konstatis, ke la aranĝo malsaniĝas, ne estas granda eksterlanda ĉeesto. Kial? La organizantoj estas samaj, la premioj — sufiĉe allogaj.

Laŭ mi la kialoj estas du:

● **Nesufiĉa preparo de la partoprenantoj.** La Komisiono pri Kultura Agado ĉe BEA rekomendis anticipan laboron kun profesiaj aktoroj kaj reĝisoroj, sed laŭ la organizantoj tio devas esti deviga, eĉ oni devas organizi regionajn konkursojn-recitalojn — antaŭ la Nacia, kaj nur la plej talentaj kaj kapablaj partoprenu ĝin. Laŭ mi de tiu preterlaso devenas la ceteraj malperfektaĵoj: la teksto ne ĉiam taŭgas por la plenumanto, elekto de malkvalitaj verkoj, nekono de bazaj reguloj pri la arta recitado, malkonvena sursceneja traktado de la koncerta verko. Ni ne parolu pri la lingva nivelo kaj la neceso pri partopreno en la konkurso nur de homoj posedantaj aŭ almenaŭ lernantaj Esperanton.

Nun mi tute ne dezirus ofendi la artgvidantojn — homojn sindonajn kaj fidelajn al la Internacia Lingvo kaj ĝia movado. Kompreneble de ilia flanko la afero aspektas alimaniere kaj eble ili dezirus pli da helpo flanke de la E-kulturdomoj, de la Komisiono pri Kultura Agado ĉe BEA. Eble oni devus organizadi renkontiĝojn kun ili almenaŭ foje jare pri ĉiuj konkretaj problemoj de la E-amatora arto. Tiam ili povus diri siajn „dolorojn“. Simila improvizita renkontiĝo okazis en Vraca. Ĉeestis ĝenerala sekretario de BEA Dimitâr Papazov. La artgvidantoj esprimis sian malkontenton pri la kutime malfrua ricevado de la diplomoj (tiel ili preskaŭ perdas sian signifon). Por la partoprenantoj dum simila aranĝo oni devas organizi interkonan vesperon, ĉar ili venis ne nur reciti kaj konkursi, sed ankaŭ dronigi sin en veran esperantistan medion, ekamikiĝi kun gesamideanoj. Eble ankaŭ tiu maniere (per amuza kaj neformala aranĝo) ni sukcesos pli firme ligi la junajn homojn



Tatjana Simeonova — II premio

kun la etoso kaj tradicioj de la E-movado kaj tiel forĝi novajn esperantistojn.

Laŭ la partoprenantoj ili ne havis sufiĉe da tempo por prepari sin bone, ĉar dum du monatoj estis organizitaj tri similaj aranĝoj: Nacia Revuo de la E-Parolo kaj Kanto en Stara Zagora (1—2.04.89), Konkurso-Recitalo „Penjo Penev“ en Dimitrovgrad (6—7.05.89) kaj Internacia Konkurso-Recitalo de Boteva kaj Bulgara Revolucia Poezio en Esperanto en Vraca (26—28.05.89). Rilate tion sekretario de la Organiza Komisiono ĉe BEA Radoslav Paraŝkevov esprimis opinion, ke dum la preparo de la Kalendaro de la aranĝoj de BEA por 1990 oni evitos tiun preterlasojn.

● **La aranĝo mem iusence elĉerpiĝis.** La temaro estas limigita kaj laŭ mi tiu vere originala iniciato de vracaj esperantistoj supozeble bezonas ripozon. Mi tute ne dezirus sugesti, sed eble oni taŭgas organizi tiun Konkursan-Recitalon ĉiun duan-trian jaron.

Estonte oni povus pripensi ankaŭ fondon de premio „Ivan Dobrev“. Laŭ la opinio de la specialistoj li estas versajne la plej talenta tradukinto de la poezia Botev-verkaro.

Jam kelkfoje mi ĉeestas Konkurson-Recitalon kaj laŭ miaj impresoj estonte, kiam oni invitas eksterlandajn partoprenantojn kaj gastojn, la organizantoj devas anticipe

informi ilin pri la personeco de Ĥristo Botev, pri la enhavo de lia verkaro kaj fine pri la senco de la aranĝo. Tiam la eksterlandanoj ekkonscios ne nur la deklamatajn verkojn, sed ankaŭ konatiĝos kun nia historio kaj kulturo.

Maria JANKOVA



Parto de la publiko

UNUA TEATRA RENKONTIĜO EN VRACA

Por pridiskuti la problemojn de la E-teatro la 29-an de majo k. j. en Vraca estis organizita Unua Renkontiĝo de Teatraj Agantoj kaj Gvidantoj de Profesiaj kaj Amatoraj Teatraj Kolektivoj. En saloneto de gastama Kemia Kombinato kolektiĝis teatraj fakuloj el Sofio, Vraca, Pleven kaj Smoljan — profesiaj aktoroj kaj fervoraj amatoroj de la teatra arto.

Enkonduke prelegis Ljubomir Trifonĉovski (dramaturgo en Ŝtata Pupteatro — Vraca). Okazis vigla kaj emocia diskutado. La prelego tuŝis komence la evoluon de la E-teatro en historia aspekto, sed iom post iom sin direktis al akraj nuntempaj problemoj de la profesia kaj amatora E-teatro. Baza problemoj de la amatoraj aktoroj estas la problemoj pri la artgvidado, kaj de la profesiaj — esperantigo de apartaj aktoroj aŭ teatraj trupoj. La plimulto de aliaj problemoj tamen restas komunaj: unualoke ni metu la lingvan nivelon. Sur la scenejo devas soni „brila“ Esperanto laŭ la normoj de E-fonetiko kaj gramatiko. Alia

problemo estas la aktoroj neesperantistoj, ludantaj en Esperanto (precipe enkadre de niaj aranĝoj)... Kaj kion ni diru pri la literatura bazo? La E-teatro ŝatus havi sian originalan dramaturgion kaj perfektajn tradukojn el la originala lingvo. Kriterio devas esti la supraj atingiĝoj de la monda nacilingva literaturo...

Akute elstaras alia afero. Vi nur pripensu: oni laboras tri aŭ kvar monatojn por prepari spektaklon, kiu estas prezentata foje aŭ du, maksimume tri fojojn... Ĉu jam en la epoko de video-tekniko ne eblas surbendigi ĝin kaj tiu maniere certigi pli longan vivon al la frukto de tiu ĉi longa kaj malfacila laboro?!... Kaj ankaŭ: la E-teatro bezonas siajn recenzistojn, teoriistojn kaj historiistojn. Pro manko de fakuloj ofte la materialoj en la gazetaro pri E-spektakloj estas anstataŭ profundaj analizoj nur emociaj konfesoj. Estas jam tempo prepari teatrajn specialistojn-esperantistojn... kaj neniu alia krom ni faros tion... Ne ekzistas kontaktoj inter la E-teatroj, profunde jam oni sentas la mankon de kunordiga in-

ternacia teatra E-organizaĵo! Kaj ĉu finfine ni ne forigu la limojn inter la kulturo de nia mikrosocio kaj la kulturo de monda makrosocio?... Do, restas multaj nesolvitaj problemoj...


Dum la diskutoj naskiĝis ideoj pri organizado de kursoj por artgvidantoj en nia lando (ekzemple post la Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto ĉiujare), pri fondiĝo de literatura buroo — teamo el tradukistoj, verkistoj, kritikistoj, recenzistoj ĉe Bulgara E-Teatro (BET). Estis starigita demando pri la teatraj agantoj en la provinco: ili ja restas ankoraŭ izolitaj en sia agado ekster BET. Do, nunmomente kiel solvo oni povas uzi la „malgrandan“, ĉambran teatro-formon. Kaj ankaŭ: vere necesas la aktiva partopreno de la E-aktoroj kaj reĝisoroj en la kultura aktivado de Bulgara Esperantista Asocio!

La Renkontiĝo estis ege bezonata kaj espereble ĝuos praktikajn rezultojn estonte. Do, ni danku al ties iniciatintoj, nome al la estraro de E-societo „Sukceso“ — Vraca!

Mariana ELENOVA

Dum la streĉaj jaroj

Kiel estas menciite en „Bulgara Esperantisto” 1/1989, la redaktoroj de nia organo dum la deksepa kaj parte dekoka jarkolekto estis Z. Zaĥariev, Iv. - Dobrev kaj B. Oktomvrijski, kaj speciale la unuaj duverkistoj kaj poetoj, plibonigis la enhavon kaj la aspekton de la gazeto. Aperis novaj nomoj de kunlaborantoj. Novan paŝon al plibonigo faris la sekvaj redaktoroj Asen Grigorov kaj Emil Stratev. Inicijemaj gvidantoj, ili altiris novajn kunlaborantojn inkluzive min. Grigorov sciis, ke en la pasinto mi estis redaktoro de bulgarlingva gazeto „Mejdunaroden Rabselkor” kaj la Esperanta „Bulteno de CK de BuLEA”. Krome li sciis, ke mi aperigas en bulgarlingvaj periodaĵoj rakontojn kaj raportaĵojn. Foje li skribis pri mi, ke mi estas „promesdona juna verkisto”.



Asen Grigorov komisiis al mi redakti materialojn por „BE”, ankaŭ por la semajna Esperanta paĝo de ĉiutaga ĉefurba ĵurnalo „Zarja”. Poste al mi oni komisiis redakti la ĵus starigitan Esperantan paĝon de alia ĉefurba ĉiutaga ĵurnalo „Nova Kambana”. Tiu mia aktivado ebligis al mi grupigi influan aktivaron el Sofio kaj el la provinco. Plej agemaj estis Nano Nanov, Nikola Kirilov, Angel Petkov (Anĝelo) kaj lia edzino Trajana Petkova, Violin Oljanov, Vasil Ĉoĉov, Boris Golemanov el Sofio, Ivan Bataklijev el Plovdiv, Ljuben Dunĉev el Pleven, Radoslav Triĉkov el Vraca, Georgi Pironkov el Lom k. a. La animo de tiu aktivaro estis Asen Grigorov, la koro, la motoro estis mi. En Sofio ni organizis ekskursojn al la urbaj ĉirkaŭaĵoj, al la montaroj Vitoŝa kaj Ljulin. En la propra Esperanta Domo de sofiaj esperantistoj regis vigleco.

En septembro 1939 eksplodis la Dua mondmilito. La nazioj invadis kaj okupis

Pollandon, sekvis okupon de aliaj landoj. En ili la Esperanto-movado estis frakasita. En Bulgario la movado estis forte minacita. Tio kaŭzis inertecon kaj retiron de iuj gvidantoj de BEA. Mi klopodis por ekstaro de „rezerva” Centra Komitato. Tiu grupo ekagis ankoraŭ pli streĉe. La vigliĝo en la tuta lando sentiĝis. Kun la scio de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev, membro de CK, ni organizis en 1940 dum la tagoj de tradicia foiro en Plovdiv tutlandan konferencon. Ĝi pasis tre sukcese, partoprenis pli ol 200 esperantistoj el pluraj lokoj de la lando. Fakte ĝi estis antaŭpreparo de nia landa 27-a kongreso en u. Loveĉ. Tiu kongreso estis lasta dum la militaj jaroj. La kongreso pasis sukcese, sed sufiĉe neordinare. Venis neniu el la membroj de CK de BEA. Profesoro Stojan Ĝuĝev enmanigis al mi la raporton de CK kaj komisiis al mi, ke mi voĉlegu ĝin antaŭ la kongresanoj, kion mi plenumis. La kongreso elektis la samajn estraranojn foreste, kaj ili restis kontentaj.

Centra Komitato de BEA komisiis al prof. Stojan Ĝuĝev la redaktadon de „Bulgara Esperantisto”, kiu altiris min kiel neoficialan (neanoncitan) kunredaktoron. Mi iradis al la loĝejo de la profesoro kaj tie ni cerbumadis pri ĉiu numero, kaj speciale pri la danĝeraj ĉefaj kaj publicistaj artikoloj. Ni planis la numeron, la enhavon kaj speciale ni antaŭpreparis la artikolojn, poste li tajpis kaj subskribis ilin kaj mi portis ilin rekte al la presejo.

Foje la profesoro diris al mi:

— Ivano, se la polico ekscios, ke vi ne portas anticipe al la cenzuristo tiujn niajn danĝerajn artikolojn, ankaŭ mi trafos la pizonon.

Mi ŝerce respondis al li:

— Kara profesoro, estu kuraĝa kaj trankvila. Oni ne kaptos min. Mi diros al la polico, ke mi ne intence, sed hazarde ne alportis la manuskriptojn al anticipa kontrolo. Mi diros al la polico, ke mi estas kulpa, kaj ne vi.

— Mi ne kredas al ili — li diris.

Kaj fakte ni gajnis la batalon. Oni ne komprenis pri miaj agoj. Mi alportadis la manuskriptojn al la presisto Conevski, progresema homo kaj nia samideano. Tiamaniere aperadis necenzuritaj kontraŭfaŝismaj artikoloj.

Nia organo fariĝis tre interesa. Oni laŭdis ĝin. Ekzemple Ivan Bataklijev el Plovdiv skribis: „Nia organo dum la lasta jaro aperis kvinfoje kaj per sia bela, serioza kaj esperiga enhavo lumas kiel lumturo en la malhela oceano por varmigi la korojn de niaj kaj eksterlandaj esperantistoj...” Krome li informis, ke la esperantistoj el Plovdiv abonigis por 1941 57 membrojn, dum por 1940 ili estis nur 17.

Multaj malnovaj kunlaborantoj ree aktiviĝis: V. Oljanov, D. Zlatarski, Iv. Sarafov, Ivan H. Krestanov, Geo Hârşev kaj aliaj. Vigliĝis ankaŭ pluraj gvidantoj lokaj: R. Tričkov el Vraca, Ivan kaj Sotir Vasilev el Pazarĝik, G. Dimov, Zora Hans kaj Veska Skolufanova el Varna, St. Gančev, Kiril Draĵev, Bogdana Popova el Sofio kaj aliaj. Iufoje kune kun mi gastis ĉe prof. Ĝuĝev ankaŭ la studentoj V. Oljanov, C. Murgin, V. Ĉoĉov. Tiuj vizitadoj donis bonajn rezultojn kaj precipe post la malpermeso de nia organo.

La 22-an de junio 1941 la germana nazia armeo inside atakis Sovetion. Komenciĝis la plej granda sangverŝo, terura milito. Defende al Sovetunio leviĝis la plej granda sangverŝo, terura milito. Defende al Sovetunio leviĝis ankaŭ bulgara popolo. Komenciĝis la perarmila rezistanta agado en nia lando. En tiu tutpopola batalo par-

toprenis ankaŭ la granda parto de bulgaraj esperantistoj kaj multaj el ili pereis en la batalo.

Ankaŭ en tiuj streĉaj tempoj „Bulgara Esperantisto” plu aperis. Daŭris ĝia progresema kaj batalema enhavo. En Sofia malliberejo, kie li troviĝis pro politika akuzo, Asen Grigorov verkis en Esperanto, eldonis kontraŭleĝan manskribitan gazeton. Per sekreta kanalvojo li sendis al mi sian verkojn. En „Bulgara Esperantisto” (jarkolekto XXII, kajero 9—10, nov.-dec. 1941) aperis lia inspira versaĵo „Mia kanto”, subskribita per la inicialoj M. L. de lia pseŭdonimo Marin Ljubin. Sed la granda poemo „Onklo Tom”, dediĉita al nia heroo-esperantisto Nikola Ŝopov, iama sekretario de BuLEA, pendigita en Sofia malliberejo, ni ne sukcesis aperigi en la gazeto. Mi kaŝis ĝin kaj la poemo aperis post la Naŭa de septembro sur la paĝoj de revuo „Internacia Kulturo”.

La fâisma registaro ne povis plu toleri „Bulgara-n Esperantisto-n”. En la somero de 1942 ĝia aperado estis ĉesigita sub la preteksto „manko de papero”.

Sed la esperantistaj koroj ne ĉesis bati. Kun prof. Ĝuĝev ni decidis eldoni „Bulgara-n Esperantisto-n” eksterlande. Mi kontaktiĝis kun la hungara E-gvidanto Jozef Mihalik. Per Dimităr Ivanov el u. Ruse ni aranĝis la financajn aferojn. Nia organo devis aperi nur sur du paĝoj kiel suplenento de gazeto „Hungara Heroldo”. Sed nia grupeto insistis kaj akiris konsenton pri memstara eldono. En la eldonado kaj redaktado helpis krom mi kaj prof. Ĝuĝev, ankaŭ Canko Murgin, tiam studento kaj promesanta poeto esperanta. En junio 1943 aperis la unua numero de la nova organo de BEA gazeto „Revuo-Bulteno”.

Ĉiuj esperantistoj en la lando renkontis ĝin entuziasme, escepte de iuj membroj de CK de BEA. La dua numero aperis en septembro 1943, la tria — en decembro de la sama jaro. En la gazeto aperis kontribuadoj de Esperov, Ĝuĝev, Murgin, Oljanov, V. Ĉoĉov k. a. Kial fiaskis ankaŭ tiu iniciato? La germanaj nazioj, kiuj regis tiutempe Hungarion ĉesigis la eldonon de „Hungara Heroldo” kaj kune kun ĝi ankaŭ nian organon „Revuo-Bulteno”.

Ivan KEREMIDĈIEV — ESPEROV

OMAGĖ AL GRANDA AKTORO

100 jaroj de la naskiĝo de Charles Chaplin
(16.4.1889—25.12.1977)

„Mi scias, ke la tempo kaj la cirkonstancoj estis favoraj al mi. Mi estiĝis favorato de la homoj el la tuta mondo, oni amis kaj malamis min. Jes, la mondo donis al mi ĉion plej bonan, kion ĝi havis, kaj iom el ĉio plej malbona...”

Ch. Chaplin

Ĉi-jare la homaro danke notas rimarkindan datrevenon — pasis 100 jaroj de la naskiĝo de Charles Chaplin, aŭ simple Charlie, kiel ame nomis lin dum pli ol 60 jaroj la multmilionaj admirantoj de lia unika komedia talento kaj de lia humanisma arto.

Pro lia grava kontribuo al la afero de paco kaj amikeco inter la popoloj, en 1954 la granda aktoro estis distingita per Internacia Premio por Paco.

Unu el la plej grandaj reĝisoroj kaj aktoroj, Chaplin tre forte influis la evoluon de la monda kino-arto. Li debutis en 1914 en Holivudo, en la mallonga kinokomedio „Perlaborante por vivteni sin” kaj en la plenlonga filmo „La interrompita romano de Tillie”. Lia partopreno en la mallongaj filmoj de Mack Sennett estis por li lernejo de ekrana komedia majstreco. En 1914 komenciĝis ankaŭ lia reĝisora agado. Depost tiam Chaplin ludis precipe en siaj propraj filmoj — kiel aktoro, reĝisoro, scenaristo, ofte eĉ kiel komponisto.

En siaj filmoj, el la periodo de la silenta kino, Chaplin aplikas la metodojn de grotesko kaj parodio, turnas sin al la esprimrimedoj de la pantomimo, de la popola teatro, de la varieteo kaj cirko. Li primajstradis la trajtojn de sia (poste fariĝinta fama) masko de la vagulo Charlie, iom post iom plifortigante la tragikomedian karakteron de tiu heroo. En la filmoj de 1915—



Sceno el „La bubo”

1918 („Vagulo”, „Laboro”, „Vespero en la varieteo”, „Aventuristo”, „La kvieta strato”, „Elmigrinto”, „Hunda vivo” ka.) kaj en la filmo „La bubo” (1921) li atingis altan perfektecon de la komedia formo. En liaj filmoj ĉiam pli evidente interplektiĝas komikaj kaj tragikaj momentoj el la vivo. En ili klare sonas sociaj-satiraj tendencoj. La heroo de Chaplin — la vagulo Charlie enkorpiĝas en si la mondon de malriĉuloj, de forĵetitoj de la socio.



Charles Chaplin kun sia familio

Depost 1923 Chaplin kreas plenlongajn filmojn: „La parizanino” (1923), „La ora febro” (1925), kaj „Cirko” (1928) — ĉefverkojn de la monda kinokomedio. En ili la kritiko al la tiama socio iras paralele kun profunda humanismo ĉe prezento de la simplaj, ofenditaj de la sorto homoj. En la filmoj „La lumoj de la granda urbo” (1931) kaj „Modernaj tempoj” (1936) pliprofundigas la motivoj de iluzieco de la esperoj, de tragika senutileco de la batalo de la „malgranda homo” kontraŭ la socia mal-

justeco. La realismo de tiuj filmoj kombiniĝas kun brila komedia konvencio, kortuŝa kuraĝo de la heroo, humanismo ĉe traktado de la temo pri amo kaj feliĉo. El liaj postmilitaj filmoj menciindas „Sinjoro Verdoux” (1947), verko senmaskiganta la hipokritecon en la socio, „Lumoj de la antaŭscenejo” (1953), en kiu respeguliĝas la aŭtoraj meditoj pri arto, talento kaj maljuneco kaj „Reĝo en Nov-Jorko” (1957), satiro pri la usona vivmaniero.

Unu el la plej bonaj filmoj de Chaplin, rimarkinda atingo de la kino-arto, estas „La granda diktatoro”. Kvankam la filmo havis grandan popularecon inter la usonaj spektantoj, ĝi sendube kaŭzis kaŝitan malamiĝecon al sia kreinto, ĉar „antinaciisma filmo havas potencajn malamikojn eĉ en Usono”, — laŭ la vortoj de Chaplin mem.

Rimarkinda en tiu filmo estas la fakto, ke multaj surskriboj de magazenoj en la hebrea geto estis en Esperanto.

Ĉi-sube ni proponas al la atento de niaj legantoj la plenan tekston de la konkluda parolado el „La granda diktatoro”, kiun Chaplin mem faris en la radio antaŭ 60 milionoj da aŭskultantoj, en la antaŭvespero de la eniro de Usono en la Duan Mondmiliton.

Konkluaa parolado de la granda diktatoro

(EL LA SAMTITOLA FILMO)

„Mi ege bedaŭras, sed mi ne deziras fariĝi imperiestro. Tio ne estas mia laboro. Mi ne ŝatas regi aŭ konkeri iun ajn landon. Mi volus helpi al ĉiuj, se tio eblas — al hebreoj, nehebreoj, negroj, blankuloj.

Ni ĉiuj volas helpi unu la alian. Tiel estas kreitaj la homaj estaĵoj. Ni volas vivi ne per la malfeliĉo, sed per la feliĉo de niaj proksimuloj. Ni ne volas malami aŭ malestimu unu la alian. En la mondo estas sufiĉe de loko por ĉiuj. Kaj la bona Tero estas sufiĉe riĉa por nutri nin ĉiujn.

La vivo povas esti bela kaj libera, sed ni eraris. Avico venenis la homajn animojn,

ĉirkaŭis la tutan mondon per barikadoj el malamo kaj blinde ĵetis nin en malfeliĉojn kaj masakrojn. Ni malkovris la rapideco, sed fariĝis dependaj de ĝi. La maŝinoj, kiuj kreas nian bonstaton, lasis nin malsati. La prudento faris nin maldelikataj kaj kruelaj. Ni rezonas tro multe, kaj sentas tre malmulte. Ni pli bezonas homecon, ol maŝinojn, korfavoron kaj kompatemon, ol prudenton. Sen tiuj kvalitoj nia vivo estos vico de perfortoj kaj ĉio estos perdita.

La aviadilo kaj la radio interproksimigis nin. Mem la esenco de tiuj malkovroj estas voko al la bono en la ho-

mo, voko al tutmonda frateco, al nia unueco. Jen ankaŭ nun mia voĉo atingas milionojn da homoj en la tuta mondo, milionojn da senesperaj viroj, virinoj kaj infanoj, viktimoj de sistemo, ĉe kiu senkulpaj homoj estas malliberigataj kaj torturataj. Al tiuj, kiuj povas aŭdi min, mi diras: „Ne perdu la esperon! La malfeliĉo, kiu trafis nin, estas ŝuldata sole al la provizora regpovo de avideco, al krueleco de homoj, kiuj timas la progreson. Sed la homa malamo forpasos, la diktatoroj mortos kaj la regpovo, kiun ili forrabis de la popolo, revenos al la popolo. Kaj ĝis kiam estos homoj

pretaj morti, la libero neniam pereos.

Soldatoj! Ne fordonu vin al tiuj bestoj, kiuj vin malamas, sklavigas vin, direktas vian vivon, diras al vi kion fari, kion pensi, kion senti! Ne fordonu vin al la homoj, kiuj trejnas vin, devigas vin malsati, rilatas al vi kvazaŭ al brutoj, kaj uzas vin kvazaŭ kanonkarno! Ne allasu, ke vin komandu tiuj nenormalaj homoj, homoj-maŝinoj, kun cerboj-maŝinoj kaj kun koroj-maŝinoj! Vi ne estas maŝinoj! Vi estas homoj! El viaj koroj ŝprucas amo al la homaro! Malamu nenium! Malamas nur uloj, kiujn neniu amas, uloj nenormalaj!

Soldatoj! Ne rilitu por la sklaveco! Batalu por la libero! En ĉapitro deksepa de la Evangelio laŭ Luko tekstas, ke la ĉiela regno estas en la homo mem — ne en unu homo, aŭ en grupo da homoj, sed en ĉiuj homoj! En viaj manoj, en la manoj de la popolo, estas la tuta povo — la povo krei maŝinojn, la povo krei feliĉon! Vi, la popolo, povas fari la vivon bela kaj libera, transformi ĝin en mirindan aventuron. Tial, en la nomo de demokratio, ni profitu tiun povon kaj unuigu! Ni batalu por nova, bela mondo, kiu donos al la homoj laboron, al la junularo — estonton, al maljunuloj — sekurecon.

Promesante similaĵojn, al la regpovo leviĝis tiranoj. Sed ili mensogas! Ili ne plenumas siajn promesojn. Ili neniam plenumos tiujn promesojn. La diktatoroj liberigas sin, sed ili sklavigas la popolon. Nun ni komencu batalon por liberigo de la mondo, ni forigu la barojn inter la nacioj, la avidecon



Sceno el „La granda diktatoro“

kaj maltoleremon. Ni batalu por mondo de la prudento — mondo, en kiu la scienco kaj progreso kreas feliĉon por ni ĉiuj! Soldatoj, ni unuigu en la nomo de demokratio!


Hanna, ĉu vi aŭdas min? Kie ajn vi estus, levu la okulojn! Levu la okulojn, Hanna! La nuboj dispeliĝas! Aperas la suno! Ni eliras el la mallumo kaj eniras la lumon! Ni eniras novan mon-

don — pli bonan mondon, en kiu la homoj superos la avidecon, malamon kaj kruelecon. Levu la okulojn, Hanna! La homa animo havigis al si flugilojn, kaj la homo finfine komencas flugi. Li eniras la ĉielarkon, la lumon de la espero. Levu la okulojn, Hanna! Levu la okulojn!”

Esperantigis: Lidia RAEVA



Originala verkaro



Grafikaĵo: Anton PETKOV

Nikola PILEV

Guto

<i>Falinta guto jam ne samas.</i>	<i>Falinta guto jam ne gutas.</i>	<i>Ni estu tiu, guto pura</i>
<i>Ĝi vivas dum surbranĉe flamas,</i>	<i>Ĝi rojas aŭ en lago mutas,</i>	<i>falanta al granito dura.</i>
<i>dum pendas aŭ dum flugas teren,</i>	<i>doninte sin al akva faro</i>	<i>Ni por la verdo estu suko</i>
<i>dum dancas kun petol' neĝere.</i>	<i>sen ajna plendo kaj amaro.</i>	<i>ke venu riĉa frukta pluko.</i>

SONETO

*Vi ne pensu plu pri nia amo, kara mia! Ne
sopiru nokte!*

*Super ni la luno staras vokte
sub grandega sia ora ŝamo.*

*Kie restis niaj oraj tagoj
kaj la oraj horoj de l' vesperoj.
Nur la novaj versoj en kajeroj
montras klare ĉiam la zigzagojn!*

*Ne, ne restis inter ni fajreroj,
sed malvarma cindro de l' surprizoj;
sentas mi maldolĉan artemizion
de la teraj kaj ĉielaj veroj.*

*Mia kara, mia vi ne estas
kaj honeste mia koro festas!*

Penka PAPAŜOVA

*La birdo naskita
en la nesto de mia koro
serĉas la ĉielon
por ekflugi...*

*Sen suno de la espero,
Sen brilo de la sento,
sen pureco de la penso,
ĝi pereos...*

*Ho, ordonema voko de la tero,
ne deviu min
de la vera direkto!..*

KELKAJ ETAJ RAKONTOJ

SENVORTE

Ni mortigis la arbojn.
Mortis ankaŭ la birdoj.
Nun sekvas la homoj.

* * *

Finiĝis la kariero de unu cirka klaŭno. Post la lasta spektaklo mi iris por transdoni florojn al li.

Li diris:

— Pli ol kvardek jarojn mi imitas diversajn homojn por ridigi vin per iliaj eraroj. Sed, homo, se sukcesas, povas simili nur al si mem. Al neniu alia...

LA HISTORIO DE MIA ĈEVALETO

Mi havas ĉevalon. Etan. Nigran.
Mi igis mian ĉevalon kuri sur ŝaka tabulo.

REALECO

Ekneĝis multe kaj neatendite. Baldaŭ ĉio blankiĝis. La trafiko haosiĝis, la homoj endomiĝis.

Kaj la infanoj prenis siajn glitveturilojn kaj eliris straten, kie tuj naskiĝis neĝaj homoj. Sed la suno venkis. Aperis koto, multe da nigra koto: granda ĝojo por la gepatroj.

Ljubomir TRIFONĈOVSKI





„HUNDA VIVO“

En la fino de marto 1987 mi ricevis belan printempan donacon el Lejpcigo — malgrandan orangkoloran libreton sub titolo „Hunda vivo kaj aliaj satiroj“, eldono de GDREA, aperinta en la komenco de la Jubilea jaro 1987.

Mi estis vere kortuŝita de la afableco de la aŭtoro sendi ĝin al mi kiel personan donacon kun speciala dediĉo okaze de IFER'87.

Mi tralegis unuspire la libreton, enhavantan 15 satirajn rakontojn sur 35 paĝoj. Ĉiu satiraĵo estas akompanita per trafa desegnaĵo de la lejpciga pentristo-esperantisto Achim Jordan, kio subtenas kaj plialtigas la bonhumoron de la leganto.

La aŭtoro estas samideano lejpcigano, kiu kaŝas sin malantaŭ la pseŭdonimo Le' Psiko. Sian decidon uzi pseŭdonimon li klarigas en la komenco de la libreto kaj en intervjuo de „Saksa Kuriero“ (5/1987) — bulteno de la Distrikta Estraro Lejpcigo, ĝi malkovras la veran modestecon de la aŭtoro: „Por mi ne gravas, kiu estas la aŭtoro, pli gravas la fakto, ke en Lejpcigo aperis malgranda satira libreto.“ Tamen, se la aŭtoro kaŝas sian nomon malantaŭ la pseŭdonimo, estas tute maleble al li kaŝi sian literaturan talenton.

Estas bone konata la vero, ke skribi mallonge estas pli malfacila afero ol skribi longe. Le' Psiko limigas la lon-

gecon de siaj rakontaj ĝis 2 paĝoj — teksto sufiĉa por eldiri la esencon per leĝera, sprita maniero. Lia nedifinebla, tre agrabla sereneco kaptas la leganton, kiu ekde la komenco de la legado konstatas la vastan spektron de la temoj, kiujn la aŭtoro prezentas en siaj abstraktaj, fantaziaj, strangaj rakontoj, ofte posedantaj neatenditan pinton.

Originalmaniere Le' Psiko traktas idversajn ĉiutagajn problemojn — la malbona izolaĵo de la novaj loĝejoj, la granda ekologia problemo — malpurigo de la natura medio, la moderna „skurgō“ por la nuntempa homaro — la streso, la eksterteruloj (la nekonataj flugobjektoj) ktp., ties troa seriozeco forprenas la pensojn kaj la sentimentojn de la leganto.

La libro komenciĝas neordinare per „Kafokantato“ („Anstataŭ antaŭparolo“), kiu konatigas la leganton kun la saksa karaktero, kies reprezentanto estas la aŭtoro, kaj la granda rolo de la kafo en la vivo de la saksoj. La unua rakonto „Hunda vivo“ donis la titolon al la libreto, kaj ĉiu sekvonta rakonto pravas la aŭtoran majstrecon evoluigi la „fadenon“ de la ago. Ĉi-rilate la satireto „Kiu detruis la murojn?“ estas vera pinto.

Belimpresaj estas la vortludoj, uzitaj de Le' Psiko, ekz. elefantulo, surstraten, grizbarbuliĝi ktp., kaj la dialogoj prezentas la riĉajn de

elipsoj „vivajn“ ĉiutagajn homajn interparolojn.

La humuro en ĉiuj satiretoj estas leginda, freŝa, sed... mordanta.

Finleginte la paĝojn, la leganto bedaŭras, ke la rakontoj estas tiom mallongaj kaj ke la libreto estas tiom malgranda.



Laŭ la aŭtoro deklaro en la postparolo „Hunda vivo“ estas la unua produkto de lia verkado kaj li „produktis“ ĝin nur post 3-jara periodo de sia esperantiĝo! Le' Psiko verkis tre interesajn, plezure legatajn satirrakontojn kaj vere meritas samideanajn gratulojn kaj bondezirojn.

La intereson al la libreto de Le' Psiko certigas la fakto, ke ĝi estis elĉerpita nur dum 3—4 semajnoj, kvankam la grandkvanta unua eldono. La bonaj reagoj de la legantoj rilate al la aŭtoraj elpensadoj, ilia klopodo kaj intereso rapidigis la duan plibonigitan eldonon de la originale verkita libro „Hunda vivo kaj aliaj satiroj“. Ĝi estas mendebla ĉe Literatura Servo, p. k. 713, Leipzig 1010, GDR. Prezo 7,50 M.

Antoaneta NIKOLAEVA





FALĈISTOJ

Elin PELIN

Ekestis mirinda somera nokto, malvarmeta kaj freŝiga. La senlima kampo de Trakio¹ dro-
nis en la mallumo, kvazaŭ ĝi malaperus, for-
donante sin al profunda ripozo sub la mono-
tona kvakado de la ranoj kaj la ĉirpado de gri-
loj.

La profunda stelplena ĉielo spiris kvietecon kaj freŝecon. La tero malfermis sian pasian
bruston kaj ekdormis en ĝuo.

Rivero Marica² plaŭdis per siaj malklaraj akvoj, plenaj de dronintoj, kaj kun malvigla trank-
vileco fluis larĝe inter la malhelaj bordoj, ĉirkaŭkreskitaj de salikoj kaj vimenoj. Malsekeco
kaj malvarmo blovis el ĝia mistera profundo.

El la apudaj herbejoj aŭdiĝis klara vira voĉo kaj malaperis en la silento.

— An-dre-o-o-o, An-dre-o-o-o!

— Mi venas, ve-naas! — respondis alia voĉo de malproksime.

Post kelkaj minutoj eklumis fajro. Leviĝis petolemaj flamoj. En ilia malforta lumo, kiun la
ĉirkaŭa mallumo englutis, vidiĝis homoj. Ili estis kvin kamparanoj el la transmonta regiono,³
venintaj kun falĉiloj sur la dorso, por serĉi laboron en malproksima Trakio, kie la herboj
maturiĝas pli frue.

Lazo, malgrasa kaj maldika viro, kaŭris ĉe la fajro kaj puŝetis la sekajn branĉojn. La ceteraj,
vestitaj en kapotoj, kuŝis ĉirkaŭ la fajro, lacigitaj rigardis la ludon de la flamoj kaj silentis.
La plej maljuna el ili, kvindekjara viro, estis apoginta la kapon sur la muskolriĉa nuda ĝis
la kubuto brako, malhele brila kiel fero, kaj fumis revante. Kontraŭ li kuŝis Blagolaĵ.⁴ Li
konstante moviĝis, penante kaŝi siajn piedojn sub la mallonga kapoto. Hirtaj blondaj lipharoj
okupis la duonon de lia vizaĝo. Sub liaj grandaj densaj brovoj petole brilis ruzaj kaj saĝaj
okuloj.

— Kial vi eksilentis, Blagolaĵ? — Daŭrigu do, — diris al li Lazo, kiu ĵus metis sekajn
branĉojn sur la fajron kaj kuŝiĝis.

Blagolaĵ karesis la blankan hundeton, kiu kuŝis antaŭ li bulforme, moviĝis ankoraŭfoje kaj
komencis:

— Iam, en iu lando, vivis reĝa filino... Ŝi estis bela, unike bela! Ŝia hararo treniĝis post
ŝi kiel silka torento kaj brilis kiel oro. Ŝiaj okuloj estis nigraj kiel la nuna nigra nokto, kaj
ĉiu, kiun ŝi ekrigardis, ege enamiĝis al ŝi.

— Eĥ — ekĝemis Lazo.

— Silentu! — aŭdigis sin la ceteraj.

— Li estas tre mensogema — diris Lazo.

Blagolaĵ rigardis lin rekte en la okulojn.

— Tio ja estas fabelo, vi, bubo!

— Absurdo... elpenaĵoj! — diris Lazo, iel malkuraĝe kaj timeme ĉirkaŭrigardis en la mal-
lumo, kie, kelkajn paŝojn for de ili, trankvile pinĉis la herbon en la salikaro nigra silueto de
azeno.

— Ĝi estas fabelo, ĉu vi komprenas, — akcentis Blagolaĵ, kaj daŭrigis: — Kial vi bezonas
la veron? Ĉu mi komencu ekzemple rakonti al vi pri la ĉifona pantalono de avo Todor, aŭ
pri la ĉifita bireto de la pastro? Aŭ mi rakontu al vi pri ni mizeruloj, kiuj tutan semajnon,
kun falĉiloj surŝultre kaj maiza pano en la sako, venis piede al Trakio por falĉadi? Ĉio ĉi,
amiko mia, estas vera. Tamen pro kio vi bezonas tiun ĉi malbenitan veron?

— Kaj ĉu mi bezonas tiujn strangajn aferojn, kiujn vi rakontas al mi? — respondis Lazo.

— Strangaj, sed belaj! Vi aŭskultas, aŭskultas, kaj vi forgesas pri la realaĵo... Kaj nerimar-
kite tiuj strangaĵoj iom post iom komencas ŝajni al vi realaj, ili kaptas vin kaj vi forgesas pri
la vivo. Pro tio ekzistas fabeloj, pro tio oni elpensas ilin. La kantoj ankaŭ estas pro tio... por
eltiri vin el la realeco, por ke vi komprenu, ke vi estas homo.



Grafikažo: Penka PETKOVA

Kaj Blagolaĵ daŭrigis:

— Tiu reĝa filino estis ardoplena, kiel la fajro mem! Trifoje ŝi edziniĝis al tri reĝaj filoj, kaj ili ĉiuj tri, jam en la unua nokto, mortis en ŝiaj brakoj, sufokataj de la ondoj de ŝia hararo... Per siaj feinaj kisoj ŝi kiel vipuro elsuĉis el iliaj buŝoj sangon, ruĝan sangon, kaj ĝin trinkis!...

La lastajn vortojn Blagolaĵ prononcis emfaze kaj per kunpremitaj makzeloj, kvazaŭ li enpikus tranĉilon. La aŭskultantoj reagis al tiu ĉi frapo per pasiaj ekkrioj. Longa kaj peza ĝemado nevole aŭdiĝis el la brustoj. Lazo frapis per pugno la teron kaj ĝemis:

— He, kia virinaĉo!

Kaptitaj de la fabelo, liaj kamaradoj signis al li silenti.

— Plue? — arde insistis Lazo.

— Kion plian vi volas? — trankvile rediris Blagolaĵ.

— Virinaĉo! — denove sopirĝemis Lazo. — He, Blagolaĵ, mi akceptus tian morton, mi diras al vi, mi akceptus.

— Vi — tian morton? Eĉ se mi vidus ĝin, mi ne kredus, — diris iu el liaj kamaradoj kaj, ekscitinte la fajron, komencis altvoĉe kaj krietante ridi. — Via edzino Penka ankaŭ havas orkoloran hararon, kaj tamen vi ankoraŭ vivas.

— Alia virino estas mia Penka... Ŝi...

— Ĉu pro tio vi lasis ŝin sola kaj venis ĉi tien!... Via koro ankaŭ estas malviva, amiko mia! Eĉ monato ne forpasis depost via geedziĝo, kaj vi satiĝis je ŝi kaj forlasis ŝin, — respondis Stamo, kiu ĝis nun silentis, meditante pri io.

Lia rigardo estis severa, li havis severan vizaĝon, sur kiu la lumo de la fajro ludis kvazaŭ sur ŝtono. Lia voĉo estis peza kaj raspa.

— Tio estas mia propra afero — respondis per surda voĉo Lazo kaj eksilentis.

— Kaj ankaŭ ŝia afero estos trovi por si alian viron, se ŝi ĝis nun ne trovis lin, — denove diris Stamo.

— Ne kredu tion, — iom timeme respondis Lazo, pikita de malklara konjekto.

Ekregis longa silento. La lastaj flamoj de la jam finbrulintaj ŝtipoj rapide kaj senforte flagretis ankaŭ ol estingiĝi. Ie malproksime aŭdiĝis alta krio, simila al vea ĝemo de animo frapita per kuglo, ĝi leviĝis alten, kaj kortremige kaj kvazaŭ puŝiĝinte kontraŭ la ĉiela kupolo, falis en la misteran akvon de Marica, dronis kaj mortis. La falĉistoj rigardis unu la alian timeme. Iliaj okuloj demandis sin reciproke. Blagolaĵ levis enigmoplene la fingron, aŭskultis atente kaj longe, kaj diris:

— Ĝi estas noktujo.

En la salikaro maltrankvile eksonis la obtuza tintilo de la timigita azeno. La hundeto eksaltis kaj komencis boji kontraŭ la mallumo. La mistera nokta silento ŝajnis antaŭsigni malbonon.

Lazo profunde sopirĝemis.

— Ĝemu, junulo, vi havas kaŭzon pri tio!... Vi lasis sola vian junan edzinon! — incite kaj ruze ekparolis Blagolaĵ, daŭrigante per la lingvo de la fabeloj:

— Malkvieta estas la junula sango, kamaradoj! Kaj ne miru pri tio, ke troviĝas perfidaj junaj edzinoj, forlasitaj de siaj edzoj!... Ĉu vi scias, kion diris monako Misail, kiam li fortondis la barbon kaj forĵetis la bireton? — „Tion, kio estas sur mia kapo, mi povas forĵeti, sed tion, kio estas en mia koro, mi ne povas eltiri“. Malbenita koro, el tia materialo ĝi estas farita.

— Por Penka tio estas facila, ŝi havas malnovajn amantojn, — diris Stamo kaj streĉis sian korpon kuŝante.

— Kaj ŝi ja estas bela, — aldonis ruze alia viro.

Lazo denove ekrigardis timeme al la mallumo. La paroloj de Stamo kiel ŝtonoj trafis lian koron.

La fajro estingiĝis. Ekregis mallumo. La kompanio eksilentis. Meteoro rapide falis kaj tranĉis la ĉielon per fajra linio.

— Iu kompatindulo mortis, — ekparolis Lazo.

— Aŭ iu juna edzino sin donis al alia viro, — aldiris senmove Blagolaĵ kaj demandis:

— Lazo, ĉu vi estas aŭdinta la kanton pri la malfidela edzino de Stojan? Ĝi ne estas fantazia kiel la fabelo. Ĉu vi deziras, ke mi kantu ĝin?

— Tute egale. Kion fari, se vi kondutas kiel azenoj! — diris Lazo.

Tuj en la mallumo komencis soni profunda, dolĉa kaj vibranta voĉo, kiu ekmodulis malgajan kaj emocian kanton. La vortoj, simile al buntaj kaj bonodoraj floroj, plektiĝis en kronon, viciĝis unu post alia kaj kun senfina doloro fluis kiel sontorento, rakontante la historion pri la malfidela edzino de Stojan.

La juna Stojan iris kiel rekruto al la kazerno kaj petis sian belan edzinon, al kiu li edziĝis la antaŭan tagon, se ŝi amas lin, ne iri al la fonteto de Gurgul por preni akvon. Sed tuj post kiam Stojan foriris, lia edzino rememoris pri la juna Gurgul, kun kiu ŝi antaŭe havis amrilatojn. Kaj ŝi sin vestis bele, metis ĉe la orelon floron, kaj kun blankaj kaldronoj en la manoj, iris al la malbenita fonteto.

... Tien venis juna Gurgul,

lia koro forte batis,

la okuloj arde brilis...

Blagolaĵ interrompis la kanton kaj, iom leviĝinte, diris:

— Ĉu plaĉas al vi tiu ĉi kanto, Lazo?

Lazo ne respondis.

— Li dormas, — daŭrigis Blagolaĵ, sin apogante sur la kubuton.

— Aŭ li dormas, aŭ li ploras, — diris Stamo.

— Se mi estus en lia situacio, mi tuj reirus hejmen, kredu al mi, — moke diris Blagolaĵ.

Lazo kuŝis kaj pensis. La moko de liaj kamaradoj pikis lian koron kiel akraj pingloj kaj la doloro ĉesigis lian spiradon. Tiuj ŝercaj aludoj por momento ŝajnis al li ne senbazaj. Efektive, Penka amas lin, sed okulojn, kiujn oni ne vidas, oni facile forgesas.

„Li antaŭnelonge edziĝis je mi kaj tuj forlasis min, por povi vagi, — ŝi dirus al si — kaj jen...” La malgaja historio, pri kiu la kanto rakontis, transportis lian penson al lia hejma vilaĝo. Tie ankaŭ estis fonteto. Ĝi estas kaŝita en la densejo apud la vilaĝo. Lia edzino Penka iras tien ĉiun matenon kaj ĉiun vesperon...

Dolorplena ĝemo ŝiriĝis el la brusto de Lazo.

La nokto progresis kaj profunde endormigis ĉion ĉirkaŭan. La obtuza sonorileto de la azeno ne plu aŭdiĝis. La blanka hundeto kunvolviĝinta kiel globo, trankvile dormis apud la forbrulinta fajro, super kiu apenaŭ rimarkeble ekflagris kaj estingiĝis senpovaj flametoj.

Marica kviete plaŭdis per siaj mallumaj akvoj inter la dormemaj bordoj kaj rakontis al la nokto malklarajn fabelojn.

La falĉistoj unu post la alia ekdormis. La fajro komencis estingiĝi.

Nur Lazo ne endormiĝis. La aludoj maltrankviligis lian junan animon, kaj lia imago komencis desegni bildojn pli kaj pli turmentajn. Lia penso forportis lin al Penka en la vilaĝo. Li vidas ŝin svelta, energia kaj blanka kiel neĝo. Ŝi sidas sur la sojlo de la domo kaj longe kaj sopire rigardas la polvoplenan vojon, kiu zigzagas tra la kamparo al la malproksimo. Laŭ tiu ĉi vojo foriris Lazo, lasante ŝin sola. Li forlasis ŝin por perlabori iom da mono... Venis jaroj de mizero, do, kion fari! Morgaŭ frumatene ŝi ellitiĝos kaj, elasta kiel kapreolino, ŝi iros al la fonteto por preni akvon...

Tie ŝi, eble, trovos... eĥ, oni scias kiun! Li multe flirtis kun ŝi ĉe la rondodancoj. Li estas frivola kaj sperta... Kio koncernas ŝin... ja virino ŝi estas — ĉu oni povus fidi al ŝi!

Jen. Mallumaj, folioriĉaj arbustoj kovras la fonteton. En ilia verdaĵo blankas la bela vizaĝo de Penka, karesata de vira mano... Fremda mano...

Lazo timvekiĝis kaj ekstaris.

— Kial mi restas ankoraŭ tie ĉi? — li ekpensis kaj demetis la kapoton.

La nokto silentis. Nur la griloj mallaŭte kaj unutone ĉirpis: Penka, Penka, Penka...

La sekvan matenon, frue, kiam la krepusko de la alproksimiĝanta tago vekis la falĉistojn, ili vidis, ke Lazo ne troviĝas inter ili.

1903

El la bulgara: Ivan KOVAĈEV

1. *Trakio* — tiel estas nomata Sudorienta Bulgario.

2. *Marica* — sudbulgara rivero, fontanta el Rila-montaro kaj enfluanta la Egean Maron.

3. *Transmonta regiono* — temas pri Norda Bulgario, kiu troviĝas trans la Balkan-montaro.

4. *Blagolaĵ* (elp. *Blagolaĵ*) — kromnomo, signifanta „ŝercemulo”.

Popolfabeloj en Esperanto

Ĉi foje anstataŭ recenzo pri la libro „Ruza Petro“, eldonita de BEA, ni proponas al vi la antaŭparolon verkitan de ĝia redaktoro — Nikola Uzunov. Tiamaniere niaj eksterlandaj legantoj konatiĝos kun la populara bulgara folkloro heroo.

„BE“

„RUZA PETRO“ (humura legolibro) de Sava Popov. Tradukis: Koljo Pančev. Redaktis: Nikola Uzunov. 116 p., ilustrita, 19,8×14 cm. Esperantlingva, Bulgara Esperantista Asocio, 1986.

„Ruza Petro“ estas gaja kaj amuza libro destinita kiel por infanoj, tiel ankaŭ por plenkreskuloj. En ĝi estas spritaj rakontoj pri Ruza Petro.

Kiu estas Ruza Petro? Ne ekzistas bulgaro, kiu jam de sia infanaĝo ne aŭdis almenaŭ kelkajn fabelojn pri tiu folkloro heroo. La fabeloj pri la fama popola ruzulo estas multaj. Eble vi demandus — ĉu vere ekzistis tia homo? Ni estas certaj, ke neniun infano leginta aŭ aŭskultinta pri la multnombraj travivaĵoj de Ruza Petro dubas pri tio. Kiam li vivis? Neniu povus respondi ĝuste al ĉi tiu demando. Oni povus diri nur, ke dum la multaj jaroj de peza fremda jugo, tia homo sendube vivis diversloke en la suferanta lando kaj vagadis tra ĝi por vigligi kaj gajigi per siaj sagacaj ŝercoj kaj ruzoj siajn malriĉajn gefratojn — la simplajn kaj senrajtigitajn laborhomojn, por helpi ilin kaj doni kuraĝon kaj eltenemon dum la malfacilaj sklavaj jaroj, por superuzi la malbonulojn, la parazitojn-ĉorbaĝiojn, la sklavigintojn kaj turmentantojn de la popolo.

Ĉiuj scias, ke la bulgara popolo estas ne nur laborema kaj kuraĝa, sed ankaŭ

gaja kaj sagaca. Ĝi amas la fabelojn kaj la ŝercojn, naskis multajn grandajn, fortajn kaj bravajn, saĝajn kaj gajajn filojn. Tial eĉ se Ruza Petro vere ne estus naskiĝinta kaj vivanta, li devus esti naskita kaj kreita de la popolo.

La simplaj homoj ŝatis aŭskulti Ruzan Petron kaj esti ĉirkaŭ li, ĉar ili ricevis de li la plej valoran — la senton de sekureco. El la multaj fabeloj pri Ruza Petro oni povus konstati, ke li timas nenion kaj nenion. Oni povus percepti ĉe li ununuran timon — la timon pro la stulteco.

Ruza Petro devenas de la popolo kaj per siaj ŝajne senofendaj ŝercoj kaj spritaĵoj servas al la popolo, helpas ĝian batalon kontraŭ la fremdajn subigantojn kaj la bulgarajn ĉorbaĝiojn. Malgraŭ la multaj favoraj okazoj Ruza Petro neniam fariĝas riĉulo, neniam perfidas al sia popolo, liaj fortaj ligoj kun ĝi ĉiam gardas lin de fieriĝo kaj orgojlo.

Dum liaj longaj vojaĝoj lia bona amiko kaj kundividanto de la malriĉa vivo estas lia azeno — la plej malmultekosta kaj senpretenda transportilo en tiu tempo. Vere, dividante lian libervolan malriĉecon la azeno, kiel ĉiuj



azenoj, ofte kaŭzis malagrablaĵojn, sen kiuj tamen oni ne povus fariĝi saĝa kaj pacienca. Samtempe la azeno estas transportilo de plej malalta rapido, kaj dum la veturado oni povus mediti trankvile kaj profunde.

Multaj estas la okazoj, kiam la bulgara ruzulo renkontiĝas kaj mezuras sian sagacon kun la muzulmana saĝulo Nasredin-Hoĝo. Tiu fabela heroo ĉeestas en la folkloro de multaj orientaj popoloj kaj tial li havas diversajn nomojn — mollao-Nasradin, muezino Nasredin, Nastradin-hoĝo kaj aliajn. Ĉar la heroo en la diversaj folkloroj havas diversajn trajtojn kaj karakteron, ni elektis la nomon Nasredin-hoĝo, kiu estas proksima al la nomoj en la bulgara folk-

loro kaj estas konforma al tiu mahometana saĝulo, kiu ĉeestas en la bulgaraj popolojaj fabeloj. Ni esperas, ke la eksterlanda leganto komprenos tiel pli bone la heroon, kiun ofte alfrontas Ruza Petro.

Primokante publike la riĉulojn kaj la potenculojn Ruza Petro anoncas kontraŭ ili verdikton. Mirinda estas la justeco de la popola ruzulo. Li nenie kunigis en unu loko riĉaĵon kaj ĝojon. Li ĉiam kontestas la riĉaĵon ĉe la riĉuloj por liveri al malriĉuloj kaj senrajtigitoj sagacon kaj ĝojan ridon. Tiamaniere sur la fono de diversaj okazintaĵoj kaj aventuroj en la tempo de la fremda jugo, ĉe sia kunpuŝiĝo kun la sociala kaj spirita sklaveco el senofenda ŝerculo la heroo transformiĝas en siaspecan batalanton.

Ne estis facile transdoni la spritan bonhumoron kaj la etoson de tiuj anekdotoj ensorbontaj la gajan popolan lingvaĵon de tiu epoko en la Internacian Lingvon. Ni strebis kaj konservis la spiriton de la epoko, kaj montris la esprimkapablon de Esperanto nesenalorigante similajn folklorizaĵojn tiel ke leganto el malproksima terangulo sentu kaj ĝuu tiun ĉi originalan popolhumoron rerakontitan de la aŭtoro de la libro Sava Popov. Tial multloke la lingvaĵo konservis iujn arkaikajn nociojn, kiujn ni klarigas ĉe la fino en la Glosaro pri nekonataj kaj malofte uzataj vortoj.

Ĉu ni sukcese plenumis nian taskon, diros vi, kara leganto, kaj per viaj proponoj kaj sugestoj vi grave helpus eventualan novan eldonon de la libro.

Nikola UZUNOV



La muta

Ruza Petro surdorsigis lignoŝarĝon kaj iris en la urbon ĝin vendi. La ligno estis maldika kaj longa, tial marŝante sur la stratoj Petro kriis al la homoj:

*— H-e, gardu vin! Liberigu la vojon, por ke mi pasu! ,
Iu fiera riĉulo vidis kaj aŭdis Petron, sed ne volis deiri la vojon. La ligno tuŝis lian veston kaj ŝiris ĝin.*

La riĉulo koleriĝis, riproĉegis Petron, kaptis lian ŝultron, ekpuŝis lin antaŭ si kaj kondukis lin al la juĝisto.

La koleriĝinta riĉulo montris al la juĝisto sian disŝiritan veston kaj plendis kontraŭ Petro.

— Nu, vi, sinjoro, kion vi diros por via senkulpigo? — la juĝisto sin turnis al Petro.

Ruza Petro rigardis jen al la riĉulo, jen al la juĝisto kaj mutis.

La juĝisto demandis duan fojon, sed Petro ĉiam silentis. Tiam la juĝisto demandis la riĉulon:

— Kial vi venigis ĉi tiun mutulon?

— Li nur ŝajnigas sin! — respondis la riĉulo. — Sur la strato li kriis plengorĝe: „Gardu vin! Liberigu al mi la vojon!...“

Estimo al la vestoj

Ruza Petro estis elokventulo. La homoj aŭskultadis lin kun atento, ĝojis kaj ridis tutkore. Tial neniam okazis nupto, baptito, festeno aŭ alia festo sen ties ĉeesto.

Foje amiko de Petro decidis edziĝi. Li prenis lignobotelon kun vino, ornamitan per staniolo buksbukedon kaj iris inviti lin.

— Se vi partoprenos la nuptofeston, mi sidigos vin ĉe la baptopatron! — la amiko diris al li.

— Dankon, mi klopodos veni! — Petro respondis.

Okazis granda nuptofesto. Ĉiuj gastoj estis vestitaj en siaj plej belaj vestoj. La longa manĝotablo, etendita de rando ĝis rando en la korto, estis aranĝita per diversspecaj manĝaĵoj, panoj kaj drinkaĵoj. Bruparolado, kantoj kaj muzikludado estis aŭdeblaj malproksimen.

Ruza Petro alvenis al la nupto en siaj malnovaj vestoj. Ĉiu mokis lin. Nek lia amiko, nek la aliaj svatantoj invitis lin sidiĝi ĉe la manĝotablon.

„Oni laŭ la vestoj renkontas kaj laŭ la menso adiaŭas!” — Ruza Petro diris al si.

Li restis iom staranta en la korto, rigardis, kapskuis, ridetis kaj revenis hejmen. Li surmetis la novajn vestojn kaj reiris al la festo. La novgeedzoj vidinte lin faris al li vojon. Leviĝis ankaŭ la bopatro, la nuptopatro, ili premis la manon de Petro, kuntiriĝis kaj li eksidis inter ili. Tuj oni alportis al li manĝaĵon, lignobotelon kun vino kaj invitis lin:

— Bonvolu, Petro, manĝu kaj drinku je la sano kaj la feliĉo de la junaj geedzoj!

— Dankon! Mi bondeziras, ke multiĝu ilia havaĵo, ĉiam estu tiel plena la domo kaj la manĝotablo de la novgeedzoj, ke ili vivu en paco, en amo kaj ĝojo! — Ruza Petro benis, suprenlevis la lignobotelon kaj komencis elverŝi vinon sur siajn vestojn.

La boparencoj rigardas unu la alian mirigite:

— Kion vi faras, Petro?

— Mi regalas miajn novajn vestojn — respondis Ruza Petro. — Ili drinku kaj manĝu, ĉar kiel videble, vi estimas ilin...

Por nia dormokovrilo

En iu venta kaj malvarma nokto sur la strato antaŭ la sojlo de la Petra domo kverelis kelkaj personoj. Ruza Petro kaj lia edzino vekiĝis.

— Pri kio do estas tiu ĉi kverelo antaŭ nia pordo? — lia edzino demandis.

— He, pri kio? De kie mi povas scii, kiuj kaj kial kverelas?! — Petro respondis, turniĝis aliflanken kaj envolvis sin en la dormokovrilon por dormi.

Sed la scivolemo de lia edzino estis granda. Ŝi ne povis dormi trankvile. Ŝi nepre volis kompreni kio okazis sur la strato kaj tial ŝi puŝetis la ŝultron de sia edzo.

— Petro, iru vidi kial kverelas tiuj ĉi homoj!

Petro tute ne emis ellitiĝi, ĉar estis froste, sed kion fari. Kaj ankoraŭ dormema li leviĝis, surmetis la dormokovrilon, per kiu ili ambaŭ estis kovritaj, kaj eliris sur la straton. Ekstere en la mallumo li rimarkis kelkajn personojn. Li apenaŭ malfermis la buŝon por demandi ilin kial ili kverelas, unu el ili impetis, forprenis la dormokovrilon desur lia dorso kaj eskapis. La aliaj ankaŭ perdiĝis en la mallumon...

Petro restis iom sen dormokovrilo, frostis ekstere nuda kaj sensŭa kaj revenis hejmen.

— Ĉu vi komprenis pri kio estis tiu parolbruo? — lia edzino demandis.

— Pri nia dormokovrilo! — Ruza Petro respondis kolere.

Ŝercemuloj

Oni invitis Petron al festeno. Sur la manĝotablo estis bakita ŝafido kaj vino. Ĉiuj manĝis, drinkis kaj ridis ĝis satiĝo.

Ĉe la finmanĝo la kunmanĝantoj decidis ŝerci al Petro. Iu el ili ekstaris malantaŭ lin kaj ekparolis al li ion ĉe la orelo, dum la ceteraj rapide kolektis ĉiujn ostojn kaj metis ilin antaŭ lin.

— He-e-e, — iu montris la ostojn kaj ridis — vidu kiom multe Petro manĝis! Komuna rido eksplodis.

— Atendu! — Ruza Petro levis la manon. — Vi primokas vin! Mi manĝis nur la viandon, dum vi formanĝis ankaŭ la ostojn!...

Li ludas violonon

Ruza Petro kaj lia edzino nokte preterpasis la vilaĝan vendejon. En la mallumo iu ŝtelisto fajlis la pendseruron de la pordo.

— Petro, kion faras tiu ĉi homo? — lia edzino demandis.

— Li ludas violon! — Petro respondis.

— Ja kia estas tiu violono? Oni ne aŭdas ĝian sonon! — lia edzino haltis kaj ekaŭskultis.


— Ĉi nun ludas, sed morgaŭ oni aŭdos ĝian voĉon! — Ruza Petro ridis.



Partoprenantoj en la ĉi-jara Konkurso-Recitalo „Penjo Penev” antaŭ la monumento de la poeto en Dimitrovgrad



Verda objektivo



En la nuna numero de „BE“ vi jam vidis fotojn de Georgi Stojkov. Ankaŭ li estis distingita per Unua premio en sekcio „Foto“ dum la Dua Internacia Kino-Foto Festivalo Esperantista en Vraca en oktobro 1988.

Li naskiĝis je la 1-a de marto 1947 en Burgas. Fotografion li ekamis en 1971 kaj tri jarojn poste — en 1974, esperantiĝis.

Georgi Stojkov estas membro de Foto-Klubo ĉe Sindikata Domo de NFK — Burgas, kaj prezidanto de Kino-Foto Klubo ĉe la tiea E-kulturdomo.


Enkadre de la Dua nacia dukara ekspozicio pri foto-arto en Burgas en 1988 Georgi Stojkov gajnis Unuan premion.

Krom gajninto de Unua premio pri foto li same bone sin prezentis en sekcio „Lumbildoj“, kie ricevis ankaŭ Unuan premion de la Dua Internacia Kino-Foto Festivalo Esperantista.

Krono de lia ĝisnuna esperantista foto-agado estis lia memstara ekspozicio, organizita decembre 1988 en Burgas.

Veneta BALEVA,
sakretario de ILEF





Medito

3. Bulgara Esperantisto br. 8/89



Ni ekludu!


NORVEGUJO

La poŝto alportis al la Turisma Sekcio ĉe BEA sufiĉe grandan kaj pezan pakadon. En ĝi ni trovis dek broŝurojn sub titolo „Norvegujo“. Tiu ĉi 52 paĝa libro publikigis kaj senpage distribuas ekster

Norvegujo la Reĝa Norvega Ministerio de Eksterlandaj Aferoj.

Legante la enhavon, kiu konsistas el 48 titoloj mi konstatis, ke la teksto enhavas ĉion gravan kio rilatas

pri Norvegujo. Abundas multkoloraj fotografaĵoj, geografiaj mapoj kaj desegnaĵoj (79). Ĉio ĉi sufiĉas por pretigo de prelego, kiun oni legu dum kunveno de Esperanto-societo aŭ klubo.



Fine de la tago

Se oni aldonos konvenan belartan programon formiĝos kompleta aranĝo pri tiu interesa montara skandinava lando kaj popolo. Ni pretas pruntedoni ekzempleron de la broŝuro al dezirantoj organizi tian aranĝon en Bulgario.


Estas bone, se la ricevintoj de la broŝuro konfirmos la ricevon kaj sciigos kiamaniere oni utiligos ĝin.

En la broŝuro estas sciigo, ke la Ministerio povas senpage sendi ankaŭ jenajn aliajn eldonaĵojn: Henrik Ibsen, La Laponoj, Jan-Maje-


no, Fostikirkoj.

Mi ne dubas, ke tiun ĉi pozicion ĉe la Reĝa Norvega Ministerio de Eksterlandaj Aferoj Esperanto akiris dank' al la kunlaboro de niaj norvegaj samideanoj. Imitinda kaj sekvinda ekzemplo.

Nikola NIKOLOV



Moskeo „XIV Ramadan“ en Bagdado



Monumento de Seĥerezada, kiu rakontas siajn fabelojn al reĝo Ŝaĥrijar. Skulptaĵo de Mohamedo Gani, 1975.

IRAKO

Irako estas lando en la Proksima Oriento kaj troviĝas en la nordorienta parto de la Araba Duoninsulo. Irako limas Sirion, Turkion, Iranon, Kuvajton, Saudi-Arabion kaj Jordanon. Sudorienta limo estas Persa (Araba) Golfo. Tra Irako fluas la du grandaj riveroj Tigriso kaj Eŭfrato. Fine ili formas tre grandan enfluejon kaj kunfluas en la Araban Maron. En Irako vegetas dornhavaj arbustoj, figujoj, daktilarboj k. a. En la apudriveraj regionoj kreskas ankaŭ salikoj kaj poploj. En la tuta lando troviĝas multaj palmoj, tial Irako okupas unuan lokon en la eksportado de daktiloj. La faŭno estas diversspeca — brunaj ursoj, aproj, ŝakaloj, hienoj, ardeoj, pelikanoj kaj multaj insektoj kaj rampuloj.

La loĝantaro de Irako estas tre bunta kaj konsistas el kvin gentoj. Oficiala lingvo estas la literatura araba lingvo. Estas uzataj ankaŭ dialektoj de araba lingvo kun fonetikaj kaj leksikaj apartaĵoj. En iraka Kurdio kiel dua lingvo estas uzata kurda lingvo.

En Irako ekzistas multaj antikvaj monumentoj. Iuj el ili devenas de asiria kaj babilona civilizacioj, kiuj estas konsiderataj kiel plej antikvaj en la mondo. La nuntempa nacia kulturo de Irako estas heredanto kaj daŭriganto de la riĉa kulturo de la antikvaj kaj de araba civilizacioj.

Bagdado estas ĉefurbo de Irako. Laŭ certaj informoj Bagdado fondiĝis en la jaro 763. Poste la urbo rapide disvolviĝis kaj fariĝis grava centro en la Proksima Oriento. Plej grandan evoluon Bagdado atingis dum la regado de Harun al Raŝido (766—809), fama kalifo kaj heroo de multaj fabeloj el „Mil kaj unu noktoj“. Rivero Tigriso trafluas kaj duonigas Bagdadon. La urbocentro troviĝas maldekstre de la rivero. La du riverbordoj estas ligitaj per kelkaj

pontoj. En Bagdado, samkiel en la aliaj urboj de Irako, paralele kun la modernaj magazenoj funkcias ankaŭ sennombraj butikoj. En ili estas aĉeteblaj belaj tapiŝoj, mane teksitaj ŝtofoj, diversaj metiproduktaĵoj, ornamaĵoj el arĝento kaj oro. Bagdado estas centro de la nuntempa iraka kulturo. En ĝi troviĝas multaj monumentoj, firme ligitaj kun la historio kaj kulturo de Irako.

Por la unua fojo mi vizitis Bagdado en 1969. Tiam la urbo ne estis tre granda kaj en ĝi dominis malnovaj orientstilaj konstruaĵoj. Kiam mi venis Bagdado en 1986, mi trovis ĝin nerekoneble ŝanĝiĝinta. Multaj novaj konstruaĵoj ornamas la urbon. Keklaj imponaj monumentoj kiel fungoj kreskis en ĝi. Modernaj aŭtovojoj tranĉas la urbon. Nun Bagdado havas pli ol kvar milionojn da loĝantoj. Iuj asertas, ke Irako ne estas turisma lando. Laŭ mi ili ne pravas. En ĉiu lando ekzistas io interesa, alloga. Irako estas vasta kaj ebena lando kaj nur en la norda landparto troviĝas montoj. Malgraŭ tio ĉiu turisto trovos ion interesan, ion plaĉan. Krom la muzeoj, monumentoj kaj belajaĵoj de la ĉefurbo estas vizitindaj ankaŭ multaj historie gravaj objektoj en la lando. Krome, oni povas sin bani en la lagoj Razaza, Habanija kaj aliloke. Neniu bedaŭros vizitante la turisman komplekson „Habanija“, kiu situas je 80 km okcidente de Bagdado, proksime al urbeto Faluja. Tie moderna hotelo kaj luksaj dometoj atendas vin.

Estante en Irako vi certe konvinkigos, ke ties popolo estas tre amikiĝema kaj gastama, ke tie abundas je antikvaj kaj nuntempaj vidindaĵoj.

*Irako,
en februaro 1989*

Georgi M. MIĤAJLOV




Arkeo de Noa



Diaramo „Kadisja“

La filatelo serve al monda paco



Suna kaj vigla Sofio por tria fojo gastigis la Mondan Filatelan Ekspozicion, kiu trapasis sub la devizo „La filatelo — por paca mondo”. Alta protektanto de la Ekspozicio estis Todor Jivkov, prezidanto de Ŝtata Konsilantaro de PR Bulgario, en sia saluto letero pritaksis la filatelon kiel „rimedon por reciproka interkonatiĝo kaj fruktodona spirita interŝanĝo inter la popoloj” kaj deklaris, ke la devizo de la Ekspozicio „koincidas kun la nova politika pensado — serĉi ĉiujn eblajn vojojn al racia solvo de la problemoj, kiuj maltrankviligas la nuntempan homaron”.

Do dek tagojn, de la 22-a ĝis la 31-a de majo k. j., Popola Kulturpalaco en Sofio estis loko de la Monda Filatela Ekspozicio „Bulgario'89”, kie sur 10 000 m² estis eksponitaj pli ol 1000 kolektoj de poŝtaj administracioj el 142 landoj, de 7 famaj poŝtmuzeoj kaj filatelitoj el 67 landoj. Inter la eksponaĵoj elstaris kolektoj de Ŝia Moŝto Elizabeto II, reĝino de Unuiĝinta Regno de Britio kaj Norda Irlando, Juan Antonio Samaranch, prezidanto de Internacia Olimpika Komitato, Rennie III, princo de Monako k. a. La atenton kaptis „perloj”, inter kiuj menciindas poŝtmarkoj „Blua” kaj „Ruga Maŭricio” je valoro ĉ. 2 milionoj da dolaroj — posedaĵo de Hermann Schnabel (FRG) kaj „nigra Penny” — el la kolekto de reĝino Elizabeto II.

En la programo de la Ekspozicio abundis intereskapaj aranĝoj kaj atrakcioj, inter kiuj elstaris Tago de Aero- kaj Astrofilatelo, balona, helikoptera kaj paraŝuta poŝtoj, speciale preparitaj aranĝoj por infanoj kaj gejunuloj, renkontiĝo kun elstaraj bulgaraj pentristoj-aŭtoroj de poŝtmarkoj k. a.

Sekcio de Kolektantoj ĉe BEA sin prezentis per bone aranĝita E-ekspozicio sub la devizo „100 jarojn Esperanto en la filatelo”. Ĝi troviĝis en la komerca sekcio sur la sesa etaĝo. La E-ekspozicio konsistis el tri ekspoziciaj tabuloj kaj du vitrinoj. Per siaj kolektoj kaj apartaj eksponaĵoj partoprenis Ivan Aleksiev, Georgi Litov, Maria Taŝeva kaj Draguŝko Petrov. Estis elmontritaj Esperantaj poŝtmarkoj el FRG, GDR, Hungario kaj Ĉinio, poŝtmarkoj de Universalaj Kongresoj, IFEF-kongresoj, ekslibrisoj (I tabulo), poŝtmarkoj kaj unuataĝaj kovertoj el Bulgario, Sovet-Unio, GDR, Portugalio, Pollando, Kubo (II tabulo) kaj oficialaj bulgaraj eldonoj de poŝtmarkoj kaj unuataĝaj kovertoj pri E-temo (III tabulo). En la vitrinoj oni eksponis bele afrankitajn kovertojn.

Por la organizo kaj altnivela okazigo de la E-ekspozicio grave kontribuis Ivan Ĉulev, Ivan Aleksiev kaj Svetla Stratieva, kiu regule deĵoris kun Veneta Baleva kaj Cvetanka Uzunova. Ili laŭnecese informis pri Esperanto kaj disdonis priesperantajn faldfoliojn „Esperanto — lingvo por ĉiuj”.

Apud la E-ekspozicio funkciis vendejo de esperantlingvaj libroj, gramofondiskoj, periodaĵoj („BE”, „Paco”) k. a. esperantaĵoj kun vendistino Margarita Atanasova. Estis vendataj ankaŭ porokaza unuataĝa koverto kaj bulgaraj E-poŝtmarkoj.

La Monda Filatela Ekspozicio „Bulgario'89” plensukcese efektivigis sian celon: kontribui al plua evoluigo de la internacia filatela movado sur ampleksa demokratia bazo kaj al plifirmigo de la amikaj interrilatoj, kaj interkonatiĝo de filatelitoj el ĉiuj partoj de nia planedo serve al paca kunlaboro kaj kompreniĝo. Dum „Bulgario'89” modele funkciis la E-ekspozicio kaj librovendejo, kiuj sendube altiris la atenton de la pli ol 150 000 vizitantoj, konatiĝintaj kun Esperantaj filatelo kaj eldonaĵoj.

E. VASILEV

22-a Konsultiĝo

Kiel kutime ĉiujare okazas konsultiĝoj de la E-asocioj el la socialismaj landoj, en kiuj partoprenas asociaj estraranoj kaj reprezentantoj de la junularo.


La ĉi-jara, jam 22-a Konsultiĝo, okazis en Moskvo de la 17-a ĝis la 23-a de aprilo. Tiun aranĝon por unua fojo partoprenis ankaŭ reprezentantoj de UEA — Yosimi Umeda — vicprezidanto, Simo Milojeviĉ — ĝenerala direktoro de la CO de UEA kaj Jan Košmaluk — prezidanto de TEJO. Partoprenis reprezentantoj de la E-asocioj el Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Kubo, Pollando, Vjetnamio kaj de kelkaj aliaj organizaĵoj. Flanke de Sovet-Unio partoprenis la estraranoj de la renaskiĝinta Sovetrespublikara Esperanto-Unuiĝo (SEU), la novkreita Fondaĵo pri Junularaj E-Aranĝoj, reprezentantoj de la Asocio de Sovetiaj Socioj por Amikeco (SSOD), kiu estis la afabla dommastro de la Konsultiĝo. La kunsidoj okazis en la fama belega domo de SSOD kaj estrarano de SSOD salutparolis en la malfermo.

Dum la Konsultiĝo estis pridiskutita la nuna organiza stato de la koncernaj asocioj, ankaŭ komunaj problemoj pri la interrilatoj en la kunlaboro de SLEA-j kun UEA kaj ĝia CO en Roterdamo. La partoprenantoj sukcesis bone informiĝi pri diversaj gravaj demandoj, kio certe multe helpus en ilia estonta bona kunlaboro.

La sekvonta 23-a Konsultiĝo devas okazi venontjare en Pollando.

Kiel kutime estis proponitaj rekomendoj por la plibonigo de la estonta socia agado de SLEA-j. Jen la plej gravaj el ili:

- la E-organizaĵoj subtenu morale kaj finance la novkonstruatan de la Zamenhof-monumenton, unua en la mondo en Františkovy Lazné, ĈSSR.
- la reprezentantoj de HEA, kunlabore kun la aliaj SLEA-j, traktu la mildigon de transpagaj problemoj kun la respondeculoj de UEA-Estraro kaj tiu de Centra Oficejo;
- intense okupiĝu pri la regula kunlaboro kun la kooperativaj organizaĵoj;
- la esperantistoj, laborantaj en kooperativoj, publikigu siajn adresojn en „Budapeŝta Informilo“ por fondi bazon por rektaj



Domo de amikeco kun la popoloj de fremdaj landoj en Moskvo — loko de a 22-a Konsultiĝo

ekonomiaj kaj sociaj kontaktoj por oficiala uzado de Esperanto;

- la esperantistoj pli atente traktu ekologiajn problemojn laŭ la iniciatoj de UEA-komitato kaj kunlaboru pere de fondotaj ekosekcioj kun neesperantistoj en la naturprotektaj agadoj, k. a.;

- la Esperanto-organizaĵoj en la socialismaj landoj subtenu la eldonadon de „Budapeŝta Informilo“ dusemajne per varbado de abonantoj;

- SLEA-j analizu la agadon de MEM, ellaboru proponojn por renovigo kaj pliefikiĝo de la agado de MEM. Prezidanto de MEM klopodu pritrakti la sumigitan projekton kun la respondeculoj dum la venonta renkontiĝo en Pardubice;

- fondula Internacia Kunordiganta Komitato de Interlingvistoj (IKKI) cele servi al la reciproka informado de interlingvistoj pri esploroj, ellabori komunan planon de tiaj esploroj k. a.

● subtenu la ideon aperigi ĉiumonatan varianton de „Moskvaj Novaĵoj” en Esperanto en la asociaj periodaĵoj ktp;

● la landaj asocioj aparte traktu kun Kuba E-Asocio kaj LKK la eblecojn por partopreno de siaj membroj en la 75-a UK kaj 46-a IJK kaj pri eventualaj kontribuoj al la programo;

● SLEA-j laŭ sia ebleco aranĝu jubileon de Ho Chi Minh kaj sendu artikolojn,

librojn k. a. pere de VPEA al la Muzeo pri Ho Chi Minh en Hanojo;

● SLEA-j kontaktu siajn ŝtatajn entreprenojn pri eksporto de presaĵoj eksterlanden kaj proponu siajn Esperanto-periodaĵojn al la abonkatalogo por 1990 en la apartaj landoj.

Cvetka MITEVA,
sekretario de la Komisiono pri
Internacia Agado ĉe BEA



Partoprenatoj en la Konsultiĝo.

KIEL MI IĜIS ESPERANTISTO

Mi devenas de malriĉa familio kaj ne havis eblecon lerni en gimnazio antaŭ la 9-a de septembro 1944. Mi fariĝis laboristo en gastejo en urbo Burgas, al kiu somere venis multe da vilaĝanoj el la regiono.

Iun tagon al ni venis kelkaj laboristoj el vilaĝo Lovni dol, Sevlievo-regiono. Mi vidis, ke ili foliumas kaj legas fremdlandan legolibron. Ĉar

mi emas lerni lingvojn, mi konatiĝis kun tiuj bonanimaj homoj. Ili volonte donis al mi lernolibron de Esperanto de Atanas D. Atanasov (ADA) kun dudek du lecionoj. Al mi plaĉis la lernolibro. Tage mi laboris kaj nokte lernis la lingvon.

Ĉio ĉi donis al mi eblecon poste kontaktiĝi kun progresemaj homoj

en Britio, kaj ankaŭ en Ĉeĥoslovakio.

Kaj mi opinias ĉu mi, ordinara laboristo, povis lerni aliajn lingvojn kaj kontaktiĝi kun fremdlandanoj, se mi ne lernus Esperanton. Ĝi estiĝis por mi fonto de progreso kaj kulturo.

Stojan RALEV,
Burgas

MIA SORTO

Tia estas mia devizo ekde pli ol kvin jaroj. Tio estas la tempo post mia pensiigo. La unuaj paŝoj en vasta Esperantujo mi faris en la komenco de mia laborstaĝo en urbo Petriĉ. Iu koresponda kurso de Esperanto altiris mian atenton. En 1957 mi sukcese finis ĝin. Poste la oficdevoj englutis min. La tempo ne sufiĉis. Pasis jaroj kaj en 1982 mi devis emeritiĝi. Alvenis la tempo de tiel nomata granda ŝanĝo en la homa vivo. Kiel mi elportos ĝin?

La fajrero pri Esperanto en mia animo ne estis estingiĝinta. Hazarda renkonto kun mia samurbanino instruistino de rusa lingvo kaj Esperanto Cvetana Zareva donis novan direkton al miaj pensoj kaj revoj. Miaj konoj en la kampo de Internacia Lingvo renoviĝis. Baldaŭ oni akceptis min kiel membron de la societo „Nova Vojo” — Pernik. Fakte mi ekpaŝis la novan vojon de mia vivo, kiu denove ekhavis sencon. Eĉ plue oni elektis min kiel sekretarion de la societo. Mi devis pravigi la esprimitan konfidon. La kurso por dua grado ĉe juna, tamen ekhavinta jam bonan sperton Veneta Baleva entuziasmigis min. Agrablajn momentojn mi travivis ankaŭ dum la parolanta rondo gvidata de ŝi. Grandan emon kaj deziron ŝi vekis en mia koro. Mi kore dankas ankaŭ al miaj kursgvidantoj Fani Miĥajlova el Plovdiv kaj Nikola Uzunov el Ĥaskovo, kiuj profundigis tiun „agrablan malsanon” en mia animo.

La Internacia Somera E-Universitato en Veliko Târnovo estis provo pri la praktika apliko de Esperanto. La altnivelaj prelegoj de d-ro Blanke kaj d-ro Kraŭse el GDR eludis rolon kiel puŝo antaŭen. Ĉu mi jam povus forgesi la neforgeseblajn tagojn en la Internacia E-Kursejo en Pisanica? Mi firme respondas: Neniam! Ankaŭ mi ne forgesos la unuan, fakte ĝis nun nuran, gvidatan de mi kurson por komencantoj. Kiom multe da zorgoj kaj streĉo kaj eĉ iam malagrablaĵojn ĝi kostis al mi! Tamen la kontentigo ĉe la fino de la kurso estis pli valora ol ĉio.

Nerimarkate komenciĝis mia E-korespondado. Jen mi partoprenis Someran E-Tendaron en Lanĉov, Ĉeĥoslovakio — en densa jarcenta arbaro, en la sino de naturo mem, mi kunligis utilon kun agrablo. La

konversacia kurso, gvidata de elstara jam ege maljuna ĉeĥa tradikisto s-ro Jozef Vondroušek pliriĉigis miajn E-konojn. Mia emo al korespondado ankoraŭ plivastiĝis. „Kiu estos mia centa korespondanto?” — estis la titolo de mia anonceto, kiun nia ŝatata revuo „Bulgara Esperantisto” publikigis. Mi povus konfesi, ke la ĝisnuna bilanco estas jena: Mi skribis al preskaŭ 200 eksterlandaj esperantistoj el 65 landoj. Venis respondoj nur de 99 personoj el 40 landoj. Notinde, ke krom en „BE”, mia korespondanonceto aperis en „Budapeŝta informilo”, adresaro de IPTEA 1988 kaj en „Heroldo”. Dank’ al mia sindona kaj fidela franca amiko s-ro Dumoulin, kiu havis afablecon pagi mian kotizon, mi fariĝis Individua Membro de UEA.

Se oni demandus min kiu estas unu el la ceteraj plej feliĉaj momentoj en mia vivo (krom la aniĝo al Universala Esperanto-Asocio), mi senhezite kaj tute sincerplene respondus: La momento, kiam mi sukcesis kapti E-parolon en la radio. Nun mi ĝuas la plezuron aŭskulti la elsendojn el Berno, Pekino, Vatikano, Vieno kaj Zagrebo. Bedaŭrinde, la plej oftajn kaj ĉiutagajn disaŭdigojn el Varsovio mi ne tiel sukcese kaptas, ĉar ili estas malbone aŭskulteblaj en nia lando. Alia ege grava kaj ĝojiga momento estis la ekposedo de la Plena Ilustrita Vortaro (PIV), kiu nun estas mia nedisigebla amiko kaj helpanto, kaj konsulilo. Eble iu dubeme aŭ eĉ moke ridetos, se mi sincere konfesus, ke eĉ nokte ĝi kuŝas apud mia kuseno...

Plena je plezuro kaj kontentigo estis la semajno de la 73-a Universala E-Kongreso en Roterdamo, dum kiu mi havis la feliĉan eblecon persone konatiĝi kun ses miaj gekorespondantoj — po unu el Hungario, Jugoslavio, Italio, Centrafrika Respubliko kaj du el Nederlando.

Lastajn tagojn mi ricevis du leterojn de du novaj gekorespondantoj el Svedio. Fakte, tiel mi akiris entute centunu korespondantojn.

Do evidentiĝas, ke Esperanto vere fariĝis mia sorto.

Cveta POPOVA,
Pernik

Esperanto en Afriko

● AGADJARO 1988

La preskaŭ dekjara agado por enkonduki Esperanton en Afrikon estas klare dividebla en epokojn kun malsamaj emfazoj.

Ekde 1980 la varbado de novaj esperantistoj, kaj la perkoresponda instruado al ili, estis neeviteble la unua paŝo. Apenaŭ estis jam spertaj esperantistoj en Afriko mem; la tuta agado devis esti „importita“.

Ekde 1984 jam la nombro da progresintaj lernantoj estis tiel granda, ke plia varbado ne havis sencon. Anstataŭ tio, la utiligado de la lingvo prenis unuan lokon en la agado, kaj krome la instruado restis grava. Same kiel en ĉiuj lokoj, ankaŭ en Afriko lernintoj demandis sin kaj nin: „Kion fari per la nova lingvo? Por kio ĝi nun utilas?“ La respondo estis: korespondi tutmonde. Ja alian uzon de Esperanto afrikanoj ne povis havi, ne havante — monon por kongresi, aĉeti librojn kaj abonojn, kaj ne povante kunvenadi pro la distancoj inter ili. Eĉ nura korespondado por multaj jam estis tro multekosta; tial UEA faris unikan servon al ili, repagante la afrankojn (ĝis fiksa maksimumo) en la fino de ĉiu jaro, kontraŭ atestilo pri senditaj leteroj.

La „utiligado“ do postulis la varbadon de korespondantoj por afrikanoj, kio rezultis en la t. n. ĝemela sistemo. Tiu ĝemelado, kvankam ne tiel abunda kaj profunda kiel ni esperis, nun fariĝis funkcia, konstanta fenomeno, kaj plektas pli kaj pli da afrikaj esperantistoj en la tutmondan movadon. En la komenco mi povis superrigardi la nodigantan reton de kontaktoj kaj sendi dufoje jare al ĉiuj eksterafrikaj korespondantoj bultenon kun sugestoj, spertoj, diskutoj. Jam nun la reto fariĝis tiel vasta, ke mi perdis la superrigardon, kaj ne plu klopodas pligrandigi la eldonnombron kaj la adresaron por la bulteno. Ĝi plenumis sian funkcion kaj povis ĉesi en 1988. Pluraj korespondantoj skribis, ke ili bedaŭris tion. La bulteno dum sia ekzistado enhavis viglajn diskutojn, i. a. pri la petado de malriĉaj afrikanoj al „riĉaj“ blankuloj, la fenomeno de korespondantoj, kiuj reciproke akuzas la alian pro nerespondado, la problemoj ligitaj al invito, ktp.

La tria epoko komenciĝis en 1988. La unua epoko kreskigis la nombrojn de esperantistoj kaj lernantoj, la dua epoko enplektis ilin en la movadon, kaj la nuna epoko celas memstarigi la afrikan movadon. La nombro de lernantoj ne kreskas (intence ni bremsis la lernadon: jam de kvin jaroj ni rifuzas akcepti novajn lernantojn, kvankam preskaŭ ĉiutage alvenas petoj por eklerni la lingvon), kaj krome la ĝemelado jam stabiligis. Nun ni devas iom post iom transdoni la taskon evoluigi la afrikan movadon al la afrikanoj, jam ligitaj al la movado, jam hejmiĝintaj en ĝi.

Tiu epoko denove prenos plurajn jarojn. Unue ni devos kunlabori kun tiuj asocioj, kiuj plej progresis. Dume aliaj maturiĝos. Ne en ĉiuj landoj de Afriko la situacio jam estas matura por memstariĝo. Fakte en nur malmultaj; en multaj aliaj ni devos pli flegi kaj helpi instruadon kaj utiligadon. Kaj en multaj aliaj ankoraŭ nenio okazis: en pluraj landoj ne estas eĉ unu esperantisto.

DU KONDIĈOJ POR MEMSTARECO

Neniu afrika lando havas ekonomion, kiu permesas, ke esperantistoj pagu mem sian movadon. Verdire, la situacio ŝajnas pligraviĝi anstataŭ pliboniĝi ĉiujare. La mizero profundigas anstataŭ kuraciĝi, kaj oni devas sin demandi, al kio tio kondukos? Ĉu la riĉaj ŝtatoj entute ne plu investos en Afriko, kiam ĝi estos tiel bankrota, ke la afrikanoj komencos morti pro malsato kaj malsano? Kiu interesiĝos pri pliaj helpoj kaj pruntoj, se estas neniu perspektivo pri repago aŭ reciproka servo?

Tamen, fideleco al novaj amikoj, kaj solidareco kun homoj al kiuj la sorto donis malmultajn ŝancojn, diktas al UEA daŭrigi subtenadon sur du terenoj: per mono kaj per organiza helpo.

MONO

Neniam ĝis nun la mono estis vere problemo. La esperantistoj kontribuis malavare, ĉu al la centra fonduso Azio-Afriko, nun nur „Afriko“, ĉu private, rekte al siaj korespondantoj. Memstarigo de asocioj ta-

men kondukos al alispeca financado: ne plu la bonvola donacado, dependa de hazardaj ondoj en la monda konjunkturo, de donacemo, de la aktiveco de iu aŭ alia monvarbantoj, de financa farto de UEA en tiu aŭ alia jaro povas determini la subvenci-tarifon. Asocioj en Afriko devos esti certaj pri solida kaj konstanta bazo de subvenciado. Tion povas solvi nur kapitalaj fondusoj kaj/aŭ impostsistemo, kiu morale devigas pli riĉajn esperantistojn kontribui seninterrompe. La problemo ne estas tiom la ŝveliĝo de la enspezoj, sed la certigo de ili.

En Nederlando ni faris eksperimenton: alvokis esperantistojn akcepti sistemon de kontribuado ligita al la impostado. Estas tro frue diri ion pri ĝia sukceso, sed montriĝis jam ke „simpla donacado“ estas pli kutima kaj pli komprenebla por homoj ol iom komplikaj sistemoj, kiuj entenas garantiigan elementon.

ORGANIZO

En Afriko, lokaj kluboj estas la plej grava nivelo de la organiza piramido. Tie la homoj trovas unu la alian kaj la materialojn en biblioteko. UEA prefere ne donas librojn ktp. al unuopuloj, sed al kluboj: tie ili servas al multaj uzantoj anstataŭ al unu. Landa asocio ekzistu nur por helpi la klubojn kaj la izolajn individuojn, ne inverse. Tial ankaŭ la ĝusta kanalo por UEA estas: helpi la landan asocion, evitante tamen burokratigon, rivalecojn por ambicio, ktp. Bedaŭrinde, la esperantistoj tutmonde, do ankaŭ en Afriko, ŝajnas suferi pro endemia ĵaluzo, kaj jam okazis en pluraj landoj maldignaj konfliktoj inter afrikaj esperantistoj.

KONKLUDO

La agado restis stabila. Ni povus ĝin kreskigi, sed ne volis. Kvalito pli gravas ol kvanto. Grava ekzemplo pri kvalitatplibonigo estis la seminario, kiun la togolanda asocio UTE organizis dum 10 tagoj en aŭgusto kun 23 partoprenantoj.

UEA subtenadis la asociojn per materialoj (lerniloj, klubajoj, ekspoziciaĵoj) membrecoj, abonoj de „Kontakto“ kaj „Esperanto en Afriko“. Tiun bultenon ĉiam redaktas (parte esperante, parte france) sino Lucy Leroy en Belgujo. La kompostadon, presadon kaj dissendadon en eldonkvanto de 500 ekz. transprenis en 1988

Hungara Esperanto-Asocio. La frateto por eks-britaj kolonioj estas „Irland-afrika Esperantisto“, daŭre modele redaktata, eldonata kaj dissendata de Christopher Fettes (Niĝerio), Anita Lindblom helpate de Jan Sestréus (Tanzanio), kaj de s-ro K. Braet (Zairio). Tiu lasta bedaŭrinde ekŝiĝis jarfine, post 25 jaroj da kompetenta kaj dankinda helpado al la zairia Esperanto-movado.

Iom nova fenomeno estas la „prelegvojaĝantoj“. Komence de 1988 ni alvokis en la gazetaro, kaj multaj sin anoncis, miskomprenante, ke UEA pagas vojaĝojn kaj restadojn por tiuj, kiuj havas tempon kaj kapablon instrui en Afriko. Bedaŭrinde, UEA nur povas aldoni iometan sumon al vojaĝbuĝeto de tiu, kiu jam vojaĝas pro profesio aŭ ferioj. Tamen tiumaniere estis jam surprize granda nombro de vizitantoj en Afriko: en Niĝerio, Togolando, Ebura Bordo, Egiptio, Nigerlando. Foje iliaj kontaktoj estis tre kuraĝigaj.

Tre multajn unuopajn personojn ni povus menci, kiuj donis al la Afrika agado lokon en siaj vivo kaj koro. Pro kaj kun ili la agado daŭras kaj donas feliĉon al afrikanoj, kiuj sen Esperanto ne ekkonus tiun vastan mondon de amikeco. Inter tiuj estas fidelaj korespondantoj, sed ankaŭ tiuj, kiuj gastigis, foje dum pluraj monatoj, afrikajn gastojn en sia hejmo. Tio estis ebla, ĉar venis denove afrikanoj al Eŭropo: 5 partoprenis kvarsemajnan perfektigan kurson en Pisania, gastame aĉceptitaj de Bulgara Esperanto-Asocio. Poste ili vojaĝis al Zagreb, invitive al la 44-a IJK. Dume en Belgujo unu zairiano kaj unu tanzaniano, stipendiite de Unesko, ĝuis longan edukan kaj gastigan programon, kaj partoprenis la Konferencon de ILEI kaj la Cseh-seminaron. Fine, ili ĉiuj, kun 6 aliaj kunvenis en Rotterdam en la 74-a UK, kie ili denove donis la impreson al la kongresanaro, ke Esperanto prosperas en Afriko. Same kiel en 1987, tiu publika apero vekis simpatian kaj atenton ĉe kongresanoj, en gazetoj ktp., sed ĝi estas nur eta, eĉ ne plej grava faceto, de la agado. Espereble tiuj ĉi informoj donis kompletan superrigardon pri la tuta afrika movado, kiu multloke, multmaniere evoluas ne nur en Afriko, sed en intima rilato kun esperantistoj en la tuta mondo.

H. BAKKER

(El „Heraldo de Esperanto“, n-ro 4—5/1989)

DIALOGO KUN LA LEGANTOJ

La Unuigita Redakcio ĉe BEA daŭre fle-
gas la tradicion renkontiĝi kun siaj legantoj
el diversaj urboj. La 14-an de junio j. k. tri
redakcianoj — ĉefredaktoro Maria Jankova
kaj la redaktoroj Evgeni Georgiev kaj Ma-
riana Evlogieva — gastis en Plovdivo laŭ
invito de la tiea E-Kulturdomo.

Estis pridiskutataj problemoj kaj pers-
pektivoj de „Bulgara Esperantisto“. La gas-
tigantoj esprimis sian kontenton pri la no-
vaj aspekto kaj enhavo de la revuo. Oni
starigis interesajn demandojn pri la ilustra-
ĵoj kaj fotoj, pri organizitaj en „BE“ konkur-
soj, pri la junularaj paĝoj k. a.

Similaj renkontiĝoj estas tre utilaj por la
redakcia teamo kaj — ni esperas — ankaŭ
por la legantoj. Tiel la Redakcio povas po-
pularigi siajn eldonaĵojn — la asocian or-
ganon „Bulgara Esperantisto“, la bulgar-
lingvan periodaĵojn „Panorama-Esperanto“
kaj la librojn; ĝi ricevas interesajn ideojn kaj
instigojn pri ilia pliperfektigo. Aliflanke, la
legantoj detale informiĝas pri la laboro de
la Redakcio kaj povas trovi plej taŭgan ma-
nieron kunlabori.

„BE“

Seminario pri internacia agado

De la 13-a ĝis la 14-a de majo
1989 en Bjala Slatina okazis Semi-
nario por la aktivuloj de la Komisio-
no pri Internacia Agado ĉe BEA. Partoprenis pli ol 50 delegitoj de
UEA kaj reprezentantoj de la Komisio-
no ĉe sekcioj, societoj kaj E-kul-
turdomoj en la lando.

Oni aŭskultis tri raportojn: „Viena
Renkontiĝo de la eŭropaj landoj,
Usono kaj Kanado — ĝiaj konkludaj
dokumentoj kaj ilia influo al la inter-
nacia agado de nia lando“ de Nikola
Nikolov, „La planado de la interna-
cia agado de BEA“ kaj „La delegita
reto de BEA“ — ambaŭ ĉe la sekre-
tariino de Komisiono pri Internacia
Agado Cvetka Miteva. La fundaj ra-
portoj enhavis informojn pri ĉefaj
demandoj de la agado de la Komisio-
no kaj de la aliaj unuoj ĉe BEA,
okupiĝantaj pri internacia agado.

En la diskutado post la faritaj ra-
portoj partoprenis 39 delegitoj de
UEA. Multaj el ili esprimis kritikajn
rimarkojn pri iuj malperfektaĵoj en la
ĝisnuna laboro de la Komisiono pri
Internacia Agado kaj faris valorajn
proponojn pri la estonta laboro. Es-
tis interŝanĝita sperto pri nia komu-
na laboro kun iuj landoj. Al la de-
mandoj la raportintoj respondis.

La seminario ludis pozitivan rolon
por plibonigo de nia estonta inter-
nacia agado kaj estis nova paŝo al
la reorganizo de nia laboro.



Draguŝko PETROV

Rido en Gabrovo

Internacia Festivalo de Humuro kaj Satiro por dekkvina fojo (de la 20-a ĝis la 28-a de majo j. k.) sub la devizo „La mondo ĝisvivis, ĉar, ĝi ridis” venigis en Gabrovo n elstarajn kreantojn de humuraj kaj satiraj verkoj. Karikaturistoj, skulptistoj, grafikistoj, verkistoj, filmistoj — entute 3460 aŭtoroj el 101 landoj el ĉiuj kontinentoj, sin prezentis per 9345 diversĝenraj konkursaĵoj! En apartaj sekcioj de tiu granda internacia artkonkurado kreantoj de bonhumoro noble „batalis” por la Grandpremioj „Ora Ezopo”, „Ruza Petro” kaj „Charlie Chaplin” kaj por aliaj diversgradaj premioj. Ili estis aljuĝataj al plej valoraj verkoj fare de specialaj internaciaj ĵurioj en la nomo de la Ministerio de la Kulturo, Scienco kaj Klerigo, de la Nacia Komisiono pri UNESKO, de la Unuiĝo de Bulgara Pentristoj, de la Domo de Humuro kaj Satiro en Gabrovo kaj de aliaj sociokulturaj institucioj en Bulgario.


Jam de jaroj la pitoreska urbo Gabrovo, situanta ĉe la piedoj de Balkan-montaro en meznorda Bulgario, famiĝis kiel centro de la monda humuro kaj satiro.

Gabrovo estas lulilo de la bulgara renesanca kulturkleriga kaj revoluci-liberiga agado. Dank’ al sia rapida ekonomia kaj industria disvolviĝo, la urbo estis nomita „Bulgará Manchester”. Pri la laboremaj, iniciatemaj kaj ŝparemaj loĝantoj de Gabrovo ekzistas sennombraj anekdotoj, kiuj kelkiam moke prezentas ilin kiel avaru-

lojn. Jen nur du el ili — kiel ilustraĵo:

● **gabrovanoj tranĉas la vostojn de la katoj, por ke la ĉambroj ne malvarmiĝu post ilia eliro;**

● **antaŭ ol enlitiĝi, gabrovanoj ligas per ŝnureto la montrilojn de la vek-horloĝoj, por ke ili ne eluziĝu dumnokte...**



Sed la fama bulgara poeto-satiristo Radoj Ralin skribis defende al gabrovanoj: „Malgraŭ la granda produktado de ŝtofoj kaj ŝuoj, gabrovanoj ne sukcesos vesti kaj piedvesti la tutan homaron, sed la gabrovaj anekdotoj kapablas ridigi ĝin!... „La granda intereso de la tuta mondo al gabrovaj humuraĵoj estas senduba pruvo pri ilia originaleco, memironiigo kaj humaneco, pri ilia pozitiva rilato al la evoluo de vivprincipoj.

La kapricoj de la ŝanĝiĝa vetero ne malsukcesigis la buntan multifacetan programon de la Festivalo. Gabrovanoj denove ŝercis: „Ĉu pluvas, ĉu sunas — Gabrovo ĉiam ridas!...” Gvidate de la urbestro Ivan Petrov, sekva de sia buntkolora helpantaro, la 20-an de majo k. j., je la 18 h., laŭ la ĉefbulvardo de Gabrovo, ekfluis la karnavala defilado. En ĝi partoprenis ne nur la demonstraciantoj sed la tuta

loĝantaro, okupinta ambaŭ trotuarojn de la bulvardo, la fenestrojn, balkonojn kaj eĉ la tagmentojn de la apudaj domoj. Kalejdoskopoj de originalaj, buntaj, entuziasmitaj, gaje kiantaj, dancantaj grupoj kaj unuopuloj, sprite aranĝitaj kaj preparitaj kostumoj, maskoj, ĉaretoj, ornamitaj per girlandoj, ŝercaj sloganoj kaj tekstoj!...

La Festivalo atingis sian apogeon. En unu mem tago — po kelkaj aranĝoj: sur la ĉefaj urboplacoj — komunaj amuzfestoj; en proksima de Gabrovo Arkitektura-Etnografia Rezervejo „Etâr” — gaja renkontiĝo de folklorhumuristoj; en Eksperimenta Satira Varietea Teatro — prezentado de komediaj verkoj; infanifesto „Ĝojo kaj rido”; subĉielaj folkloraj dancoj kaj kantoj; en kinejo „Aleko Konstantinov” — filmoj el la konkursa programo de la V Filmfestivalo, honore al la 100-jariĝo de la granda Charlie Chaplin... Oni estis vere embarasitaj: kien iri unuavice, kion vidi?! Feste kaj buntkolora ornamita, la urbo zumis kiel abelujo, la stratoj — plenplenaj de tumultoj!...

Sur tiu ĉi eksterordinara festivala fono reliefigis ankaŭ la modesta aranĝo de la esperantistoj el societo „Verda Torĉo”, organizintaj kun entuziasmo kaj ambicio sian mikrofeston sub la titolo „Rido en Gabrovo”. Por dua fojo (post 1982) ili okazigas festivaleton de la humuro kadre de la Internacia Festivalo — ĉi-foje per plenumoj de la plej junaj esperantistoj el GABROVO: La 20-an de majo matene, en la plenple-

na salonego de la urba pup-teatro artkolektivoj el lernejoj „Canko Djustabanov“, „Jonko Kolev“, „Georgi Dimitrov“, „V. I. Lenin“, „Nikola Vojnovski“, el VI kaj VII bazaj lernejoj, el kvartalo Aprilovo kaj el Aprilov-gimnazio prezentis riĉan programon el humuraj-satiraj kaj muzikaj plenumoj.

Per sprita kaj bonanima enkonduka parolo Rumjana Janeva salutis la ĉeestantojn el Gabrovo kaj el diversaj loĝlokoj de la lando, rakontis pri la historio de Gabrovo kaj pri deveno de gabrovaj anekdotoj, esprimis esperon, ke la sekventa esperantista festivalo estos jam internacia.

Kantgrupo el lernejo „Canko Djustabanov“ kun gvidantino Maria Boškova, Gajninta I premion en la Nacia Revuo de E-Kanto kaj Parolo en Stara Zagora ĉijare, plenumis tri belegajn

kantojn, montris veran artismon. Infangrupeto el lernejo „Jonko Kolev“, gvidata de Nadeŝda Kânĉeva, gajninta I premion en la urba konkurso, kaj infanoj el baza lernejo „Nikola Vojnovski“ prezentis mallongajn humurskeĉojn. Bone sin manifestis la infangrupo el lernejo „V. I. - Lenin“ kun gvidanto Kosjo Ilev, akompanita de Radka Dimitrova. Humuraĵojn kaj anekdotojn prezentis ankaŭ etuloj el bazaj lernejoj. Finaĵo de la festivala programo estis la bufosinkrona skeĉo titolita „NIFO“, altnivele — lingve kaj arte — prezentita de knabina artgrupo el Aprilov-gimnazio, gajninta I premion en la urba esperantista konkurso.

La ĉeestantoj en la salonego spontane eĥis al la plenumoj kaj arde ilin aplaudis.

— Ni havas talentajn plenumantojn de ŝercaj kantoj kaj de humuraĵoj — diris al

mi la prezidantino de societo „Verda Torĉo“ Maria Avramova. — Ni bezonas monan kaj metodikan helpon de la Centra Estraro de BEA, por ke ni povu sukcese organizi esperantistan festivalon kun internacia partopreno enkadre de la estonta XVI Festivalo en Gabrovo. Tiun ĉi aranĝon ni okazigis nur dank’ al la arda entuziasmo de niaj societanoj, kiuj vere ne ŝparis fortojn kaj tempon — spite al anekdotoj pri „avaraj“ gabrovanoj!...

Mi ĉentute apogas la vortojn de M. Avramova, des pli, ke la lokaj gazeto „Balkansko Zname“ kaj Radio-centro reagis al tiu nia aranĝo per tujaj informoj. Ili esprimis kontentigon, ke ankaŭ la esperantistoj el Gabrovo aliĝis per propra programo al la Internacia Festivalo de la Humuro kaj Satiro.

Donĉo ĤITROV



Momento el la karnavala manifestacio

Foto: la aŭtoro

Vigla kaj vasta aktivado



Ĉeestantoj en kunveno de E-societo „St. Kalpazanov”

E-societo „Stoju Kalpazanov” — Velingrad, fondita en 1925, jam multajn jarojn disvolvas viglan agadon. Malgraŭ la atingitaj sukcesoj en la stabiligo de la societo lastatempe, ni strebas al novaj suproj en la plua evoluigo de nia E-laboro sur la kampoj instrua, kultura, organiza kaj internacia. Ĉi-sube mi provos skizi la nunan staton kaj pli gravajn erojn de nia ĉi-jara aktivado.

En Velingrad funkcias civitanaj E-kursoj por I kaj II gradoj sub la gvido de inĝ. B. Marinov. Dufoje monate en la Junpionira Domo okazas perfektiga kurso „Parolanta Rondo”, kiun alterne gvidas inĝ. B. Gaĝanov, inĝ. B. Marinov, N. Godev, El. Janĉeva, Hr. Terzieva, V. Langova, Zdr. Angelova, Vel. Vodeničarova. Funkcias ankaŭ lernantaj E-kursoj: en 3-a lernejo (kv. „Kamenica”) — instruistinoj El. Janĉeva kaj Vel. Vodeničarova kaj en 2-a lernejo „Kiril i Metodij” — instruistino Ant. Drankova.

Ni intencas estonte varbi pli multajn kursanojn, certigi novajn instrurajtajn E-kursgvidantojn kaj fari koncernajn paŝojn al pli vasta fakultativa instruado de Esperanto en Velingrad.

Sur la kultura kampo la iniciatoj de nia societo estas ligitaj grandparte kun la amatora artaktivado. El niaj amatoraj plenumantoj elstaras Virina Kantkvarteto kun gvidantino Marg. Ŝalamanova kaj recitantino Vel. Vodeničarova. Ili sukcese prezentis sin en la Regiona kaj Nacia Revuoj de E-Parolo kaj Kanto en Plovdiv kaj Stara Zagora. Nia celo estas plivastigi la kunlaboron de E-societo „Stoju Kalpazanov” kun loka Sindikata Kulturdomo, interkonsenti kunajn iniciatojn kaj organizi en ĝi E-kurson.

E-societo „Stoju Kalpazanov” peris gastadon de Urba Miksa Ĥoro — Velingrad, en Třebič (Ĉeĥoslovakio) en junio k. j. Reciproke Instruista Ĥoro — Třebič gastos en nia urbo en julio ĉi-somere. Per tiu perado ni plivastigas nian kunlaboron kun aliaj kulturaj organizaĵoj en Velingrad.

Multajn klopodojn ĉiujare ni dediĉas al la tradicia Internacia Esperantista Seminario-Feriado en septembro en Velingrad. Ĉi-jare en la kadroj de la Seminario, de la 29-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro, oni festos la 70-jariĝon de revuo „Bulgara Esperantisto”. Ni fervore laboras por altnivela okazigo de tiu aranĝo.

Por plibonigi la organizan laboron de nia societo kaj altiri la membrojn al aktiva partopreno en la diversaj aranĝoj, ni elektis grupajn respondeculojn, kiuj kontaktas 5—10 societanojn. Estis fondita junulara klubo ĉe la societo kun prezidanto Vel. Vodeničarova. Pri tio al ni helpis Urba Komitato de Komsomolo. Sub ties protekto ni subtenas bonegajn rilatojn kun la estraro de Junpionira Domo, kies ejojn ni uzas senpage por nia aktivado.

El la internacia agado de E-societo „Stoju Kalpazanov” krom la okazigo de la 10-taga Internacia Esperantista Seminario-Feriado menciindas partopreno de nia lernanta E-grupo en Somera E-Tendaro en Lanĉov (Ĉeĥoslovakio) ĉi-somere, gastado de ĉefaj esperantistoj el Třebič, ĉeesto de nia grupo en Internacia Esperantista Renkontiĝo en Droĝobiĉ (Ukrainio, USSR). Grava parto de nia internacia aktivado estas korespondado. Multaj niaj societanoj havas vastan kaj viglan korespondadon kun amikoj el tuta mondo. Ofte en kunveno de E-societo „St. Kalpazanov” oni priparolas la korespondajn ligojn, kaj dediĉe al ili ni organizas Vesperon de E-korespondado.


Niaj vastiĝantaj aktivaĵoj postulas koncernajn labor-kondiĉojn. Tiucele en la centro de Velingrad estas konstruata esperantista klubejo, en kiu ni sukcese povos organizi diversspecajn E-aranĝojn kaj dece bonvenigi niajn gastojn.

Boris GAĜANOV,
prezidanto de E-societo „Stoju Kalpazanov” —
Velingrad

Unu el la doĵenoj

Antaŭnelonge nia samurbano Boris Golemanov estiĝis 75-jara. Fakte li ne estas burgasano. En 1947 nigrahara 35-jara viro alvenas en nian havenurbon kaj lia unua laboro estas serĉi kontakton kun la lokaj esperantistoj. La juna pedagogo kaj direktoro de la instruista instituto en Burgas rapide gajnas la konfidon de la membroj de la loka esperantista societo „Nigra Maro” kaj ili elektas lin sia prezidanto.

Mi konversaciis kun la jam blankhara, sed vigla homo, kompreneble, ke li estas komencinta lerni la lingvon kiel 18-jaraĝa gimnaziano en tiama plej granda vilaĝo en Bulgario — nun urbo Kneĵa. Li komencas vigan korespondadon kun eksterlandaj kaj precipe kun la sovetiaj samideanoj. Tiutempe lia korespondantino estas la edzino de fama sovetia diplomato Litvinov. La juna esperantisto trovas tempon por legi revuon „Informilo”, kunlaboras al revuo „Internacia Lingvo”, preparas



esperantistajn paĝojn en la bulgara gazetaro, eldonas ĵurnalon „Fenestro al la Mondo”, partoprenas la naciajn kongresojn en Orjaĥovo, Veliko Târnovo, Pazarĝik, Sevlievo, membras en Bulgara Fiŝista Esperantista Asocio, estas sekretario de ĉefurba esperantista societo „Maksim Gorkij”, realigas kunan laboron

kun Nikola Aleksiev, Asen Grigorov, Radoslav Triĉkov, Stefan Ganĉev, Atanas D. Atanasov — ADA, Iv. Keremidĉiev-Esperov, Ivan Sarafov kaj la olda esperantistino Smaragda Noĵarova, donacinta sian apartamenton ĉe str. „Alabin” N 50 al la sofiaj esperantistoj. Bedaŭrinde dum la bombado de Sofio la domo estas detruita.

En Burgas kune kun Ilija Miĥalkov (patro de la esperantista verkisto Georgi Miĥalkov), Kaljo Bjandov k. a., B. Golemanov komencas viglajn rondajn okupojn por disvastigo de la lingvo en tiama Burgasa distrikto. Por tio la urbo ne hazarde estas elektita kongresa ĉefurbo en 1962. Estinte prezidanto de LKK Boris Golemanov brile plenumas sian taskon.

Nun Boris Golemanov estas unu el la doĵenoj de nia movado en Burgas-regiono.

Nikola STRANĜANSKI

„Siringa vespero — Loveĉ’89” en fotoj



Parto de la partoprenantoj en la E-renkontiĝo

PRI SPORTO KAJ ESPERANTO

Ĉiuj scias, ke sporto kaj Esperanto ekzistas paralele jam multajn jarojn. Tamen ili estas amikoj, kiuj ne konas unu la alian, kvankam ili funkcias en internacia skalo. Pro tio, ĉu la sporto interesas ankaŭ la esperantistojn?

Al tiu demando Dimităr Dimitrov, prezidanto de la Junulara Sekcio ĉe BEA (BEJ), dividas, ke la junaj esperantistoj, kiel ĉiuj junuloj havas grandan intereson pri la sporto. Tial en la Sekcio estas tri estraranoj, kiuj multe interesiĝas pri ŝako, japana militarto k. a. Tio jam povas esti bona premiso por sporta aktivado de la esperantistoj. La komenco estas kuraĝiga. En du kunsidoj la junaj estraranoj pridiskutis jam konkrete iujn demandojn ligitajn kun la disvolviĝo

de la sporto inter la junaj bulgaraj esperantistoj. Pasintjare ili helpis al la organizado de ŝak-turniro en urbo Ĥaskovo. En 1989 en la sama urbo estas planata granda turniro de ludo „GO“. BEJ preparas sin por amasa partopreno en la tradicia aŭtuna kurado en Vitoŝa-montaro sub la aŭspicio de „Bulgara Esperantisto“. Dum la du naĉiaj aranĝoj — Junulara Printempa Renkontiĝo en Sofio kaj Internacia Junulara Seminario en Pisanica (6—10.09.1989) oni antaŭvidas ankaŭ surprizojn por la ŝatantoj de la sporto.

Dimităr Dimitrov opinias, ke nia Sekcio havas eblecon helpi finance kaj organize ĉian prudentan sportan iniciaton.

Dimităr MUTUŜEV



Nikola Pilev recitas sian premiitan verkon



Mirena Denizova enmanigas I premion pri traduka E-poezio al Nikola Uzunov (Ĥaskovo)
Fotoj: Kiril KALĈEV



Enlanda movado

KULTURA FESTO EN RAZGRAD



Kutime la printempo abundas je multe da Esperantaj aranĝoj — de enuaj kaj rapide forgesataj ĝis emociaj festoj de nia movado. Veturinte al Razgrad, similaj pensoj trakuris mian kapon. Kiel vizitinto de du aranĝoj en tiu urbo mi scivolemis ĉu en Razgrad la esperantistoj daŭrigas la tradicion organizi interesajn renkontojn. Ĉu la Tagoj de la Esperanta Kulturo inkluzivos ion novan kaj interesan?

Ĉefa programero de la ĉijaraj kulturaj tagoj en Razgrad estis kvizo je temo „Rolo de la Internacia Lingvo en la turisma vivo de la lando“, organizita kune kun Bulgara Asocio pri Turismo kaj Ripozo. La kvizo kaj la tuta aranĝo okazis en la junulara klubejo.

La kvizon partoprenis teamoj el Ŝumen (studentinoj), Târgoviște (lernantinoj), Omurtag (ĝelernantoj) kaj du teamoj el Razgrad (lernantinoj kaj oficistinoj). La unua rimarko de mia vidpunkto estas, ke en la kvizo konkursis partoprenantoj el tute divesaj aĝoj. Ĝenerale la kvizo pasis kiel bone konata dialogo — la instruisto demandas kaj la bona lernanto respondas. La plimulto de la demandoj estis tute simplaj.

La unuan premion gajnis la teamo de la dommastroj (oficistoj), la duan — la teamo el Târgoviște kaj la trian — la teamo el Ŝumen. La ĵurio aljuĝis ankoraŭ du premiojn — por plej bona E-prononcado de Daniela Georgieva (Razgrad) kaj plej ĉarma teamo (knabinoj el Târgoviște). Por la konciza komentario pri la forpasinta kvizo mi turnis min al d-ro Ivan Kirĉev, prezidanto de la Domo pri Esperanta Kulturo.

— La kvizo jam estas Esperanta tradicio en Razgrad. Bone helpas al ni la filio de Bulgara Asocio pri Ripozo kaj Turismo en nia urbo. En la pasintaj kvizoj partoprenis eksterlandanoj. La ĉefa celo estas popularigi la bulgaran kulturon kaj turismon. Por tio la demandoj estas elementaj por bulgaroj. Por la sekva jaro ni planas organizi la kvizon sur la ferdeko de ŝipo laŭ Danubo.

La Tagoj de la Esperanta Kulturo en Razgrad altiris ankaŭ kolektantojn. La Sekcio de Kolektantoj ĉe BEA

prezentis sin per ekspozicio el poŝtmarkoj, insignoj, kalendaroj kaj etikedoj. Rimarkinda estis la kolekto de filatelisto Ivan Aleksiev — „Bulgara klasiko“, aranĝita kun enkonduko kaj klarigoj en Esperanto. Aktive partoprenis en la ekspozicio la novefondita klubo de kolektantoj ĉe E-societo en Gabrovo.

Malgraŭ ke la kvizo kaj la ekspozicio kaptis la atenton de la gastoj, ĉu oni devis fanfarone kunigi ilin sub la titolo „Tagoj de la Esperanta Kulturo“. Ne estas simple organizi varian kaj taŭgan kulturprogramon, kiam la problemo tuŝas monon. Nuna komuna buĝeto de la E-societo „L. L. Zamenhof“ kaj E-Domo pri Kulturo ne estas egala al buĝeto de la eksa distrikta estraro...

La partoprenantoj ekskursis la lastan tagon al vilaĝoj Topĉij kaj Pobit Kamâk, kiuj impresas pro beleco kaj bone konservita renesanca arkitekturo. En tiu etoso lernantinoj el Razgrad prezentis popolan printempan kutimon, parolante kaj kantante en Esperanto. Tiamaniere la dommastroj adiaŭis la gastojn.

At. BORISLAVOV

HELPE AL LA INSTRUANTOJ

La 28-an de majo k. j. en la klubejo de E-societo „Eterna Amikeco“ — Pleven, okazis seminario. Ĉeestis instruantoj de Esperanto de la urbo kaj departemento.

Grupo de lernantinoj-esperantistinoj de Baza Lernejo „D-ro Petâr Beron“ — Pleven, prezentis mallongan literaturan-muzikan programon.

Raporton pri temo „La loko kaj rolo de la didaktikaj ludoj ĉe la instruado de Esperanto“ faris Nadejda Ivanova, prezidanto de la Instruista Klubo ĉe la loka societo.

Al la ĉeestantoj estis instruitaj kelkaj kantoj sub la lerta gvido de Genoveva Filipova — muzika pedagogo de la vokala grupo „Eternaj kantoj“ ĉe la societo „Eterna Amikeco“.

N. IVANOVA

EN SERVO DE FAKORGANIZOJ

Ĉiam pli kaj pli ofte neesperantistaj organizacioj kaj institucioj uzas Esperanton en sia faka laboro. Kompreneble tiurilate estas grava la aktivado de esperantistoj mem, kiuj devas montri al la aliaj la eblecojn de Esperanto.

Jen, la bulgaraj IADEM-anoj (Internacia Asocio de Esperantistoj Matematikistoj), aktivuloj de matematikista sekcio ĉe BEA, anoj de E-societo „Radio“ en Pazarĝik helpis la fakan pazarĝikan matematikistan organizaĵon kontakti kaj kunlabori kun faka matematikista organizaĵo en urbo Eger, Hungario.

Tradicie en Pazarĝik oni aranĝas „Matematikajn festojn“ unumonatajn — en aprilo kaj majo. Ĉi-jare la festoj komenciĝis per renkonto kun hungaraj gastoj — docento ĉe matematika katedro en Pedagogia Altlernejo en Eger, Viktoria Balogh kaj adjunkto d-ro Eva Ŝaŝalmine. Ili prelegis en Esperanto pri matematikaj problemoj. La renkonto okazis en la pazarĝika E-domo.

Do, ne estas hazardo, ke en Pazarĝik kaj ankaŭ en Eger estas po pli ol 10 matematikistoj esperantistoj.

Petko ARNAUDOV

LITERATURA ARANĜO

La 16-an de majo j. k. „Arta Klubo” ĉe E-societo „Asen Zlatarov” en Ĥaskovo, Unuiĝo de la Verkistoj kaj Klubo de la Literaturaj Agantoj en la urbo venigis esperantistojn-verkemulojn el la tuta lando. La celo estis konatigi la gastojn kun la antaŭnelonge aperinta antologio „Nesto de birdoj” — faro de la aŭtoroj kaj tradukintoj el Ĥaskovo-regiono. Estis plenumitaj verkoj el la antologio, kio ĝuigis la ĉeestantojn.

Esperantistoj el Ĥaskovo delonge havas tradiciojn en originala kaj traduka E-verkado. Ĉi-jare ili disponigis al la esperantistaro la literaturan antologion „Nesto de birdoj”. Ĝi konsistas el tri partoj: tradukita poezio kaj prozo de verkistoj el distrikto Ĥaskovo, originala poezio kaj prozo de membroj de la loka „Arta Klubo” kaj „Vojo tra la jaroj” — historia skizo pri la E-movado en la Ĥaskovo-regiono.

Klubo de la Literaturaj Agantoj, celebrante sian 40-jariĝon, enskribis en sian historion gravan eventon — por unua fojo kuniĝis kunlaborante literaturistoj en bulgara lingvo kaj Esperanto.

Cvetanka UZUNOVA



INFORMOJ RICEVEBLAJ

Se Vi interesiĝis pri la bulgara Esperanto-movado, pri ĝia historio, literaturo, agantoj, pri Via loka societo, skribu al: E-muzeo 6140 v. Krân, Ĥaskovo-departemento. En la muzeo troviĝas bone ordigita kartoteko.

NOVAJ SOCIETAJ MEMBROJ

La 13-an de aprilo en v. Vinarsko, Burgas-departemento, okazis solena kunveno okaze de la akcepto de novaj societaj membroj (el v. Vinarsko kaj u. Kameno, lernantaj Esperanton dum la lernojaro 1988/1989 j.), kompletigo de la societa estraro kaj disdono de la atestiloj. Gastoj de la kunveno estis: generalo Polifirov, Nikola Petrov, Dimităr Gerĉev, multjaraj esperantistoj kaj Elena Stojkova — organizanto de BEA en Burgas-departemento.

N. Petrov disdonis la atestilojn al la civitanoj kaj gelernantoj, kiuj sukcese finis E-kursojn por unua kaj dua grado.

Fine grupo da geesperantistoj, gelernantoj el Baza Lernejo „Otec Paisij” — v. Vinarsko, plenumis literaturan-muzikan programon, per kiu salutis novajn kaj diplomitajn membrojn.

Ruska PANTOVA
v. Vinarsko

EN VILAĜO VLADIMIR



En romantika v. Vladimir, Sofio-departemento — kaŝita inter grandaj juglandujoj, verdaĵo kaj disflorintaj fruktarboj — okazis la 2-an de majo k. j. mitingo omaĝe al partizanoj antifaŝistoj. La fervoraj dommastroj akceptis senpacience siajn gastojn, inter kiuj estis ankaŭ esperantista grupo de societo „Nova Vojo” — Pernik.

En la vilaĝcentro troviĝas majesta blanka monumento omaĝe al la pereintaj partizanoj antifaŝistoj. Parencoj kaj proksimuloj de la partizanoj rakontis rememorojn konekse al la partizana agado. Parolis Ivan Agajn, frato de la mortpafita partizano Evlogi Agajn, pri sia frato kaj ankaŭ pri lia kamarado Aleksandăr Maĝarski — ambaŭ esperantistoj. La domo de Maĝarski estis iam esperantista kursejo. Tiam sur la muro de la konstruaĵo Agajn kaj Maĝarski pendigis la ŝildon „La frata domo”.

Estis celebrata la 45-a datreveno de la pereado de la antifaŝistoj el la v. Vladimir.

La entuziasmigita oratoro Kosta Dimitrov, per forte argumentita parolo, sekvis la revolucionan vojon de la popolbatalantoj. Rimarkinda estis la kultur-kleriga agado de Agajn kaj Maĝarski direktita al la klerigado de la aliaj kamaradoj rilate la Internacian Lingvon en la menciita domo.

La parolanto substrekiis la multampleksan politikan kaj ekonomian agadon fare de Agajn en Sofio. Tie li organizis la politikan kampanjon por kontrakto pri amikeco kun USSR, helpe al la soveta diplomato Sobolev. Li ankaŭ organizis popolkooptativojn en Sofio. Dum sia trijara senlaca laboro li vizitis la regionajn vilaĝojn, organizante junulojn por partopreno en la armilbatalo: Panĉo Dokolenkov (1925—1944), Stoil Dokolenkov (1924—1944), Asen Agajn (1923—1944).

Post la popolmitingo sekvis kulturprogramo kaj distraĵoj.

La esperantista grupo el Pernik direktiĝis al la domo de la partizano Al. Maĝarski. Enirante la korton, nian rigardon kaptis la ŝildo „La frata domo” sur la muro de la domo. Jes, tio ege emociis la esperantistan kordon. Tiam la frato de Maĝarski rakontis rememorojn pri la revolucia agado de sia frato. Antaŭ la sama domo ni fotiĝis.

Nikola MITEV

PLOVDIV. Laŭ iniciato de Arta klubo-84 en la E-kulturdomo la 20-an de majo j. k. plovdivaj esperantistoj solene festis la tagon de la unuaj slavaj klerigantoj Kiril kaj Metodij. Pri la historia verko de la du fratoj parolis instruistino-pensiulino Maria Dimitrova. Membroj de la Arta klubo-84 kaj de societo „Kulturo“ prezentis riĉan belartan programon. La prezidanto de la klubo donacis al la ĉeestantaj instruistoj okaze de ilia festo salutbildkartojn kaj florojn.

Gastoj de la solenaĵo estis esperantistoj el u. Niŝ (Jugoslavio). Ivan Jankoviĉ, instruisto-pensiulo salutis la dommastrojn okaze de la festo.

Post la solenaĵo okazis agrabla amika parolado.

● La E-kulturdomo en Plovdiv organizis la 10-an de majo en la domo jubilean vesperon de la nevidanta poeto-esperantisto Todor Ŝoŝev okaze de lia 70-jariĝo.

Pri la vivo kaj vekado de T. Ŝoŝev inspire parolis Kunĉo Vălev — prezidanto de la Komisiono pri Kultura Agado ĉe BEA. Membroj de E-societoj „Kulturo“ kaj „Lumo“ plenumis riĉan belartan programon, en kiu estis verkoj de T. Ŝoŝev. La jubileanto recitis ankaŭ siajn verkojn. Fine de la solenaĵo T. Ŝoŝev estis kore salutita kaj ricevis multajn florojn de la E-kulturdomo, de societoj „Kulturo“ kaj „Lumo“, de Arta klubo-84, kaj de organizaĵoj de nevidantoj en Plovdiv.

Vladimir JELEV

VARNA. La 2-an de marto j. k. la E-klubo de la veteranoj-esperantistoj „Mois Levi“ — Varna, aranĝis „Vesperon pri lingvaj demandoj“. Violin Oljanov — membro de la Akademio de Esperanto, prelegis pri la interlingvistiko. Sciante, ke li estas kunmetinto de la 250-paĝa scienca verko „Interlingvistiko, Esperantologio“, eldonita de BEA, Sofio 1985, ni kun granda intereso direktis nian atenton al la prelego.

V. Oljanov skizis la historion de tiu relative nova lingva scienco kaj emfazis, ke parto de la interlingvistiko estas la esperantologio, kiu fakte estas filologio de Esperanto. Konklude la lektoro por helpi la plialtigon de la lingva kulturo de la esperantistoj disponigis al ili koncizan bibliografion.

● Okaze de la 85-jara datreveno de la fondiĝo de E-societo „Albatroso“ en Varna oni organizis en marto k. j. grandan ekspozicion de manlaboraĵoj, ellaboritaj de virinoj-esperantistinoj. Ĝi estis aranĝita en la granda salono de Patrolanda Fronto. En la ekspozicio partoprenis 11 virinoj: Penka Apostolova, Sijka Ivanova, Sonja Bogoslovova, d-ino V. Skorĉeva, Artemis Rafaeljan, Zografia Dimova, Maria kaj Virginia Kirĉevi, Vesela Peneva, Asja kaj Markrid Karajan. Oni eksponis bulgaran brodaĵon, trikaĵojn, gobelinojn kaj artefari-tajn florojn.

Granda arta afiŝo invitis la geurbanojn al la ekspozicio, kiu estis malfermita unu semajnon. La ekspozicio vekis grandan intereson. Ĝin vizitis pli ol mil personoj, multe de kiuj skribis kuraĝigajn impresojn en la gastlibro. La loka ĵurnalo „Narodno Delo“ raportis pri la ekspozicio.

En la organizado de la iniciato pleje kontribuis Markrid Karajan, membro de la estraro de „Albatroso“ kaj respondeculino pri kulturaj iniciatoj. Similaj aranĝoj estas vere efika propagando de Esperanto.

Doc. Georgi DIMOV

La 30-an de aprilo ĉ. j. en la preĝejo „Sankta Dipatrino“ en u. Gabrovo, okazis solena Paska Diservo. Evangelio estis legita en diversaj lingvoj. Unuafoje ĝi eksonis en Esperanto. Tio kaŭzis dankemon de la ĉeestantaj geesperantistoj al la plenumanto — juna kaj entuziasma ortodoksa pastro Ĥristo Cankov.

Stefka TOTEVA

SOLENAĴO EN ŜUMEN

La 29-an de majo j. k. en la klubejo de ŝumena E-societo „Vekiĝo“ okazis solena fermo de la lernojaro esperantista. Gastoj estis membroj de E-societo „Madarara“ el najbara urbo Kaspica.

Grava atingiĝo ĉi-jare estis la enkonduko de regula studado de Esperanto en Ŝumenan Pedagogian Instituton „Konstantin Preslavski“. Sukcese ekzameniĝis pri lingvokono kaj historio de la E-movado 12 studentinoj. Sekvontan jaron ili trapasos kurson de tria grado kaj havigos al si instrurajton „Instruistoj de Esperanto“, kiel dua fako. Tiu granda sukceso estiĝis dank’ al speciala lernoseminario dum la vintra ferio en IEK-Pisanica apud Smoljan. La ŝumenaj esperantistoj multe kalkulas je tiuj morgaŭaj semantoj de Esperanta parolo en la lokoj, kie ili komencos sian instruistan agadon.

Krome, ankaŭ sukcese finis du lernejanaj grupoj, kvin civitanaj kursoj — unu el kiuj intensa trimonata kaj unu duagrada kurso.

Ĉi-somere ŝumenaj esperantistoj partoprenos la interesan bulgaran E-aranĝon, nome ISEU en Veliko Târnovo, kaj gastos ĉe siaj geamikoj en ĈSSR, GDR, Pollando, FRG k. a.

Estis premiitaj la plej bonaj kursanoj: d-rino Antoa-neta Bojkova, Slavka Slavĉeva — rentgenlaborantino en malsanulejo kaj Andrej Jankov — lernanto en Poŝta Tehnikumo (Meza faklernejo pri komunikado).

Fine de la solenaĵo la esperantistoj aŭskultis multe de leteroj-invitoj, senditaj al ili el Pollando, GDR kaj aliaj landoj.

Ĥristo TONEV

KUNLABORO SERĈATA

La gevira Koruso de Sofia Esperantistoj deziras kontaktojn kun korusoj el la lando kaj el eksterlando cele al korespondado, interŝanĝo de repertuaro kaj reciproka gastado. Adreso: Esperanto-koruso, P. K. 66, BG—1090 Sofio, Bulgario.

Por variigi la programojn de Esperanto-societoj, kluboj en diversaj aranĝoj estas bezonataj skeĉoj, gaĝoj, teatraĵetoj, kantoj, spritaĵoj k. a. Por plenigi la mankon Centra Esperanto-Kulturdomo, P. K. 45, BG—1090 Sofio, Bulgario pretas ĉiujare eldoni kel-kajn broŝurojn „Esperanta Estrado“. Danke ni akceptas originalajn aŭ tradukitajn kontribuojn.

XI ESPERANTO- PRINTEMPO

En la kultura domo „Relaks“ en urbo Šrem (Pollando) de la 7—10 aprilo k. j. okazis renkontiĝo „XI Esperanto-printempo“. Partoprenis esperantistoj el tuta Pollando, du personoj el Japanio kaj 8 geesperantistoj el Bulgario, reprezentantoj de nia junulara klubo „Amikeco“.

Dum kvar tagoj la dommastroj prezentis al ni tre interesajn muzikprogramojn kaj recitalojn, bonajn operajn plenumojn. Ankaŭ ĉi tie renkontiĝis filatelistoj, pentristoj kaj fotistoj.

Tre plaĉis al ni ekspozicio de Miroslav Viluk — „La vivo de L. L. Zamenhof“. Al la partoprenantoj de „XI E-printempo“ Šrem prezentis sin per plenumo de siaj bonaj kantoj kaj recitaloj en Esperanto. Tre atentokapta estis recitalo de Eljbieta Gvalinska — ŝi plenumis kelkajn operajn ariojn en akompano de M. Paluskieviĉ. Interesa estis la prelego de S. Swistak pri temo „La vivo de L. L. Zamenhof“. S. Swistak parolis ankaŭ pri E-turismo. Sed pli interesa estis la denova renkonto kun Janzli Hanzlik — poeto, komponisto kaj kantisto. Esperantina Mirska parolis pri temo „La infano en la Esperanta familio“. Estis aŭskultita recitalo de M. Pavlikovska „Ni kantas por amo“.

La dommastroj organizis tre interesan ekskurson per aŭtobuso al interesaj kasteloj en Rogalin kaj Kopnin.


La bulgara partopreno estis rimarkebla. Tre aktivaj el nia grupo estis Ivan Zarev, Ani Futekova, Rina Pavlova, kiuj aktivis en ĉiuj aranĝoj. Ni prezentis nin tre bone en „Bulgara vespero“ per bonege preparita muzikprogramo de Ani Futekova. Ni kantis du turistajn kantojn, kaj poste kvin knabinoj (Ani, Rina, Emilia, Elizabet, Asja) kantis kelkajn bulgarajn kantojn. Rangel Dimĉev prelegis pri temo „Bulgara E-poezio en la Esperanta literatura mondo“.

Jurnalistino de gazeto „Tigodnik Ludovi“ intervjuis nin. Ni rakontis pri la bulgara junulara E-movado, pri nia junulara klubo „Amikeco“, pri nia turista klubo „Gajaj Vojaĝantoj“.

Ni restis kun bonegaj impresoj pri la renkontiĝo „XI Esperanto-Printempo“ pro la originalaj muzikprogramoj, recitaloj, pentraĵoj kaj agrabla etoso.

Rangel DIMĈEV

IN MEMORIAM



Estas triste adiaŭi amikon, kun kiu ni kune laboris por disvastigado de Esperanto en Gabrovo, dividis sukcesojn kaj malfacilaĵojn kaj je kiu ni esperis labori aktive en tiu direkto.

Je la 25-a de aprilo k. j. la gabrovaj geesperantistoj adiaŭis sian elstaran samideanon Petko Totev Petkov. Ne estis iniciataĵo de loka kaj nacia skalo, kiun li ne partoprenis konscie.

Petko Totev komencis sian Esperantan agadon kiel lernanto en la lasta klaso de Aprilov-gimnazio dum la lernojaro 1945—1946, gvidata de Bojana Prodanova. Poste il vizitis kursojn de dua, tria kaj kvara gradoj en la E-kursejo „Meden rudnik“, en Burgas. Samtempe li aktive laboris en la gabrova esperantista societo „Verda Torĉo“. Lia aktiveco kaj amo al Esperanto estis alte priaksataj. Multajn jarojn li estis prezidanto de la urba kaj poste de la distrikta esperantista estraro. Dum la lastaj jaroj li estis prezidanto de la urba societo de esperantistoj en Gabrovo kaj partoprenis en la grupo de la

veteranoj-esperantistoj ĝis sia grava malsaniĝo.

Bonkora, ridetanta, li scipovis allogi la homojn kaj per sia laboremo li estis imitinda ekzemplo por la plej junaj esperantistoj.

Kelkajn jarojn li gvidis kursojn de Esperanto (unua kaj dua grado) en la Domo de Kulturo kaj ankaŭ en uzino „Kapitan djado Nikola“, kie li laboris. Oni aprezis lin kiel kapablan majstron en ripar-instrumenta fako de la uzino, kie li pensiigis.

Petko Totev ricevadis multajn Esperantajn revuojn kaj gazetojn kaj kontribuis per korespondadoj. Malgraŭ sia okupateco li regule korespondadis kun esperantistoj el multaj landoj. En sia skribotablo li havis por ĉiu korespondanto apartan paperujon kun kopioj de siaj leteroj.


Petko Totev vizitis kelkajn naciajn kaj universallajn kongresojn. Li gastigis esperantistojn-korespondantojn de kalkaj landoj. Petko estis numismato kaj havis kolekton de valoraj moneroj. Li ankaŭ posedis riĉan bibliotekon kun Esperantaj kaj bulgaraj libroj.

Petko Totev naskiĝis la 12-an de septembro 1928 en vilaĝo Vranilovci, regiono de Gabrovo. Li forlasis nin juna, sed laŭ la vortoj de la saĝulo „ne gravas kiom oni vivis, sed kiel oni vivis“. Petko postlasis helajn spuron kaj memoron de fidela aganto por disvastigo de Esperanto.

Bojana PRODANOVA



ROZETA VORTENIGMO



Laŭ la direkto de la movo de la horloĝa montrilo.

1. Malpeza veturil', destinita por transporti fervojan personaron aŭ fervojan materialon. 2. Kruelega.
3. Portugala insularo en Atlantiko. 4. Trajektorio de korpo, animata de perioda movo. 5. Reguloj de la eksteraj rilatoj en mondomo (radiko). 6. Insekt', vivanta socie kiel la formikoj kaj konstruanta tre altajn fortikajn loĝejojn. 7. Longa, maldika, pli-malpli larĝa leda bendo, uzata por ligi, fiksi aŭ transmisii movon de rado al alia rado. 8. Mara herb', kiun oni uzas sekigitan por remburi matracojn. 9. Centro, ĉefa punkto. 10. Ligna aŭ metala peco, uzata por fendi (en akuzativo). 11. Nekultivata, ripozanta plugtero.
12. Kolekto de sanktaj libroj de malnova irana religio. 13. Fundamenta regular' de asocio, societo aŭ organizaĵo. 14. Unumasta velŝipet' kun busprito. 15. Armiloj ktp de venkita malamiko, amasigitaj sur la bataalkampo aŭ en templo por memori pri la venko. 16. Konfuza kolektiva voĉbruo. 17. Adverbo pri kvanto. 18. Forig'. 19. Mamul' el la ordo de insektomanĝuloj, familio de talpedoj. 20. Rilata al hungarmaniera raguo el bovaĵo. 21. Ort'. 22. Fenol', ekstraktata el naftaleno, kaj uzata kiel intesta desinfektaĵo.
23. Intenca erarigo. 24. Lingvo propra al nacio aŭ provinco. 25. Homo tute senigita je intelektaj, afekciaj kapabloj kaj vivanta je pure vegeta vivo. 26. Altranga ekleziulo, komisiita por reprezenti la papon en difinita okazo. 27. En la maniero de meto de la reĝo aŭ la damo de la kontraŭulo en ŝakon. 28. Remaĉanta mamulo el la subordo de parhufuloj.

LA PREMIOJ

E-societo „Septembra gloro” — Miĥajlovgrad dankas al ĉiuj partoprenintoj en la enigmokonkurso, anoncita en n-ro 3/89 de „BE”. Venis kelkdek leteroj el diversaj landoj. Nur du solvopropoj estis eraraj. Jen la ĝusta solvo de la „Diagonaloj”:

A: 1. PEKINO 2. PALATO 3. LOTUSO 4. KANINO 5. SINO 6. MEM 7. ROTO
B: 2. PER 3. LAKO 4. KOLITO 5. SATANO 6. MINUTO 7. TENISO 9. MONO

Post lotumado libropremiojn gajnas: Jordanka Bojkova el Bulgario (u. Burgas), Geoffrey D. Hammerton el Britujo kaj Antero Harju el Finnlando.

Ĝojiga estas la fakto, ke multaj legantoj sendas ne nur la solvojn de la enigmo, sed ankaŭ siajn opiniojn pri tiu iniciato. Jen kion skribas s-ano G. D. Hammerton: „Plaĉas al mi multe ke mi, anglo, povas solvi vortenigmon verkitan de bulgaro, dank’ al Esperanto.”

La leteroj venigas nin al kelkaj konkludoj:

1. Ni eble devas disponigi al la partoprenantoj en similaj konkursoj iom pli da tempo, ĉar multaj leteroj venas post la limdato.

2. Eblas organizi seriojn de enigmoj, kaj la solvintoj de ĉiuj enigmoj ricevos pli grandajn premiojn.

3. Ni petas vin sendi estonte la solvojn sur poŝtkartoj — tiumaniere ili estas pli facile kaj pli rapide prilaborblaj.

La Redakcio dankas al societo „Septembra gloro”, kiu iniciatis la konkurson en n-ro 3/89. Ni bonvenigas kontribuaĵojn, ideojn kaj instigojn pri estontaj enigmokonkursoj.

Multajn leterojn la Redakcio ricevis ankaŭ pri la malkovritaj diferencoj inter la du desegnaĵoj en n-ro 4/89 de: Ĥristo Tonev, Marijka Taneva, d-ro Ljubomila Kacova, Cvetan Manojlov, Slavĉo Ŝijakov (Bulga-

rio), Svetlana Pogorelaja kaj Gregoro Finkelŝtejn el Kiev (USSR) kaj de Otto Kaczinski el GDR.

Ni lotumis gramofondiskon „Bulgara rozo” kun plenumci de la kantistino esperantistino Jana Cikaĵova al Marijka Taneva el u. Karnobat.

Rezulte de lotumado premion pro solvo de la enigmo, publikigita en n-ro 5/89, ricevas Cvetan Manojlov el Miĥajlovgrad — la libron „Tango” de G. Karaslavov. La premion ricevas ankaŭ la kontribuanto de la enigmo „transglitaĵoj” — inĝ. Ivan Slavik el Nova Dubnica, Ĉeĥoslovakio. Ni sendas al li la libron „Mia verda pado” de Ĥr. Gorov.

Jen la solvoj de la „transglitaĵoj”: Slovacio, esperantisto, organizo, akuzativo, paradizo, junularo, redaktoro, administracio, literaturo, verkisto, kamarado, vagonaro, Esperanto, limonado, metaforo, kalendaro, pordisto.

Al ĉiuj gajnintoj niajn gratulojn! „BE”



— Pardonu, ĉarmulino, ĉu vi ne estas hazarde delegito por tiu ĉi insulo. Se jes, en tiu kazo mi havus peton al vi... tre personan, vi komprenu.



— Terure! Nur maldecaĵojn ĝi scias diri.
 — Maldecaĵoj ili certe ne estas. Ĉiun ĝian vorton mi trovis en Plena Ilustrita Vortaro.

TESTO

ĈU VI ESTAS BONINTENCA?

1. Laŭ vi la fremda sekreto:

— oni povas konfidi ĝin al plej proksima amiko, kondiĉe ke li ne diskonigos ĝin — A

— la sekreto povas esti diskonigita, se ĝi ne rilatas al via proksima homo — B

— neniam devas esti diskonigata — C

2. Kiam vi donas promeson pri io serioza:

— vi esperas, ke povos ĝin plenumi — A

— vi scias, ke dumtempe multaj aferoj aliiĝos kaj esperas, ke verŝajne ne devas plenumi ĝin — B

— vi faros ĉion eblan por ĝin plenumi — C

3. Via rido:

— ofte kaŝas vian elreviĝon — A

— sukcese kovras vian malbonan rilaton — B

— ĝi estas ĉiam nur rido — C

4. Kiam vi devas ion dispartigi inter kelkaj personoj kaj mankas ebleco ne doni al ili la pli grandan parton, vi faras tion:

— per la sento „mi nun tion oferas“ — A

— per kaŝita malplaĉo — B

— sen ĝeni vin — C

5. Kiam vi kritikas iun:

— vi kritikas surbaze de konkreta okazo, — sen strebo maldignigi la homon kiel personecon — A

— ofte profitas la okazon por venĝi kaj pro aliaj aferoj — B

— neniam vi forgesas substreki ankaŭ la pozitivajn ecojn de la homo — C

6. Kiam oni vin kritikas, vi opinias:

— ke vere iuj faras tion pro nervoziĝo — A

— ke oni vin malamas — B

— ke vere en la plimulto de la okazoj oni deziras helpi vin — C

7. Kiam via kunagado kun iu homo por solvi definitan taskon ne atingis la atendatan sukceson, vi plej ofte decidis:

— ke li ne alportas ŝancon — A

— li estas kulpa — B

— ke tio okazis hazarde — C

8. Se vi kun grupo da homoj devas

multe labori, vi klopodos okupi la plej facilan pozicion:

— se ĉiuj ceteraj estas pli fortaj — A

— ĉar ĉiam tiel vi ordigas la aferojn — B

— pro tio, ke tiel okazis — C

9. Kiam vi devas eniri en novan grupon aŭ kolektivon, komence la homoj en ĝi estas rilate al vi:

— indiferentaj — A

— malagrablaj — B

— simpatiaj — C

10. Post feriado ĉe maro vi promesas al la homoj, kun kiuj tie vi interkonatiĝis, ke vi nepre plu renkontiĝos:

— vi supozas, ke tio povas efektiviĝi — A

— vi scias, ke tiuj interkonatiĝoj rapide ĉesas — B

— certe vi plenumos la promeson — C

RESPONDOJ DE LA TESTO

Se vi havas ses aŭ pli da respondoj „A“, tio signifas, ke vi scipovas prizorgi la ceterajn, tamen vi ankaŭ ne forgesas viajn interesojn. Vi estas senigita je senutilaj iluzioj, sed malgraŭ ĉio vi esperas ankaŭ al la bonaj okazoj kaj flanke de la sorto kaj ankaŭ flanke de la homoj.

Se vi havas ses kaj pli da „B“, estas dubinde, ke vi havas multe da amikoj, krom se via komuna malbonintenco unuigas vin kontraŭ triaj, — aŭ se vi bonege scipovas kaŝi viajn verajn sentojn. Ĉu ne estas almenaŭ unu homo rilate al kiu viaj respondoj estas aliaj?

Se vi havas ses aŭ pli da „C“, via bonintenco al la homoj ĝislimas naivecon. Se vi estas preta doni pli ol kiom ricevi, tio signifas, ke vi posedas tute konsciitan bonecon, kiu al vi liveras plezuron. Kiel viaj amikoj utiligos tion, tio dependas de iliaj karakteroj.

Esperantigis: Nikola NIKOLOV

Noto de la redakcio: Se tiu ĉi testo plaĉas al vi kaj vi deziras, ke ni aperigu ankaŭ aliajn testojn, bonvolu komuniki tion al ni. Ni estas pretaj aperigi ankaŭ aliajn similajn testojn, inkluzive tiujn senditajn de vi.

ANEKDOTOJ

Inter kuracistoj:

— Ni ŝuldas la duonon de niaj pacientoj al la malbona kuirarto...

— Jes, estas vere, kolego, kaj la ceteran duonon ni ŝuldas al la bona kuirarto.

* * *

— Aha, kara mia, ni pasigis kun vi mirindan tagon meze de la naturo. Pro memoraĵo mi elĉizos niajn inicialojn sur la ŝelo de tiu ĉi arbo.

— Mirinde!

— Sed por tio vi devas diri kiu estas via nomo...

* * *

— Bedaŭrinde, vi estas riĉa — li diris, sopirĝemante.

— Nu, mi estas posedanto de unu miliono.

— Ĉu vi deziras edziniĝi al mi?

— Ne.

— Mi tion sciis...

— Kial, do, vi demandas min?

— Por ke mi sciu kion sentas homo, kiu perdas tutan milionon.

* * *

— Kiel progresas la edukado de via filo?

— Ho, mi jam obeas lin.

* * *

La juĝisto: — Diru, juĝato, ke vi efektivigis la ŝtelon ekzakte laŭ tiu maniero, pri kiu vi jam rakontis nun.

— Ne tute ekzakte, s-ro juĝisto, ne tute. Sed mi kredigas vin, ke sekvontfoje mi efektivigos ĝin ekzakte tiel, kiel vi diris al mi.

* * *

— Paĉjo, ĉu multe da mono estas mil levoj?

— Dependas por kio vi planas ilin: per labori ilin aŭ elspezi...

* * *

— Ĉu vi amas min, kara?

— Treege!

— Sed ĉu vi oferus vian vivon por mi?

— Tamen kiu amos vin tiukaze?

— Kiom vi pezas?

— kun la okulvitroj sepdek du kilogramojn.

— Sed kial kun la okulvitroj?

— Sen ili mi ne vidas la indikilojn de la pesilo.

Esperantigis: Dimităr HAĜIEV



Malkovru la ok diferencojn.



KIAL PAPAGOJ NUR RIPETAS HOMAJN PAROLOJN

TAJLANDA FABELO

Antaŭ multaj jarcentoj, la birdo kiu loĝis ĉe homoj, kaj lernis paroli, estis ne la papago, sed la lori¹, kiu estis tiel inteligenta, ke ĝi vere konversaciis, dirante siajn proprajn opiniojn...

... ĝis venis tago, kiam terkultivisto² vidis bubalon sur sia rizkampo. Kvankam li sciis, ke la bubalo apartenas al la najbaro, la kultivisto kaptis ĝin, mortigis kaj distranĉis ĝin, rostis parton de la viando kaj manĝis tion; kaj kaŝis la ceteron duone sur la tegmento de la rizejo, duone en la granda rizujo.

Kiam la najbaro demandis pri sia bubalo, la kultivisto respondis: „Mi tute ne vidis ĝin“. Sed la lori¹ diris: „La mastro kaptis, kuiris, kaŝis. Li manĝis parton kaj flankenmetis parton. Li kaŝis parton sur la rizejo kaj parton en la rizujo.“

La kultivisto diris: „Jes ja, vi vidis vian donon sur la rizejo kaj en la rizujo; sed estas mia propra viandostoko“.

„Li kaŝis parton sur la rizejo kaj parton en la rizujo“, insistis la lori¹.

Ĉar la kazo estis duba, la najbaro aranĝis, ke ili prezentu sin antaŭ la juĝisto morgaŭ.

La kultivisto decidis trompi la birdon. Kiam la lori¹ dormis, li prenis ĝin el la kaĝo³ kaj metis ĝin en grandan kuirpoton, kiun li kovris per tuko. Li batadis, unue laŭte, poste mallaŭte, sur la poton, por fari bruon similan al tondro. Li ŝutis akvon multfoje sur la poton per kulerego, por fari bruon similan al pluvo. Frumatene, li remetis la dormantan lori¹ en la kaĝon; kaj kiam li devis iri al la juĝejo, li kunportis la birdon.

La najbaro plendis pri la perdo de sia bubalo, kaj citis la atestaĵon de la birdo. La juĝisto petis la lori¹on, ripeti sian atestaĵon.

„Li mortigis la bubalon, manĝis parton, kaŝis parton sur la rizejo kaj parton en la rizujo.“

Sin defendis la terkultivisto: „Estas ja viando en mia domo, sed ne de la bubalo de mia najbaro. Ĉu vi kredos stultan birdon, pli facile, ol vi kredos homon?“

La juĝisto hezitis.

„Tiu birdo diras multajn sensencaĵojn. Nu, juĝista moŝto, demandu ĝin pri io alia; demandu, kia estis la nokta vetero.“

La juĝisto demandis la lori¹on pri tiu temo.

La lori¹o respondis: „Estis mallume; pluvegis; multe tondris.“

„Aŭdu,“ diris la terkultivisto, „la stulta birdo tute ne komprenas ordinarajn aferojn. Ni ĉiuj scias, ke nokte la luno bele brilis, tute ne estis tondroŝtormo, kaj eĉ unu pluvguto ne falis. Ĉu la atestaĵo de tia birdo estas utila?“

La argumento ŝajnis bona, kaj konvinkis la juĝiston kaj ĉiujn ĉeestantojn. La juĝisto deklaris la terkultiviston senkulpa, kaj ordonis, ke la homoj ne plu gastigu la mensogemajn lori¹ojn en la hejmoj.

Do la lori¹o refluĝis en la arbaron, kaj vivis laŭ sia unua vivostilo, sen homa helpo.

Venis mateno, kiam la loriĉeto ekvidis sur arbo birdon grandan, belan, kun plumoj verdaj kaj ruĝaj.

„Kiu vi estas?”

„Mi estas la papago. Mi venis el la suda lando, kaj nun mi intencas loĝi en via lando. Mi parolas la homan lingvon.”

„Bonvenon! Estu feliĉa! Sed aŭskultu averton, ĉar havis mi sperton. Kiam mi mem loĝis inter la homoj, mi diris miajn proprajn opiniojn, sed la homoj forsendis min. Do, mi konsilas al vi, neniam sincere diru vian propran opinion. Nur ripetu tion, kion homoj diras. Ne diru la veron. La Homo dezi-

ras nur reaŭdi siajn proprajn pensojn; li ne serĉas veron. Li ne deziras ricevi scion aŭ saĝon el ekstere.”

La papago dankis la loriĉeton kaj sekvis ĝian konsilon. La homoj bone nutris kaj prizorgis la papagon: sed ĝi ĉiam kaŝas la proprajn opiniojn, kaj nur ripetas frazojn, kiujn homoj diras.

Tial la papagoj ankoraŭ restas dorlotitaj⁵ en homaj hejmoj.

Esperantigis: Marjorie BOULTON

(El „Faktoj kaj fantazioj”, UEA, 1984)

1. aŭstralia birdeto, griza kun diversaj aliaj koloroj.
2. tiu, kies metio estas kreskigo de plantoj kaj prilaboro de la tero.
3. portebla metalfadena aŭ ligna loĝejo por birdoj aŭ malgrandaj bestoj.
4. antaŭsciigo aŭ atentigo pri minacanta danĝero aŭ malbono.
5. tro kareseme kaj indulge traktita.



Ron Calder (malantaŭ la tablo), prezidanto de la E-societo en Edinburgo, Britio kaj la urbestro de Edinburgo dum la urba pacfestivalo fine de februaro k. j., kiam Edinburga E-Societo havis standon por propagandi Esperanton.


BULGARAJ FONTANOJ

Baza kondiĉo por la ekzisto de la homoj, de ĉiuj vegetaĵoj kaj bestaj specioj estas la akvo. Ja, la vivo komenciĝis de la akvo! Dum jarcentoj, antaŭ nia erao oni adoris kaj glorigis ĝin, kredis je dioj de akvo. La antikvaj popoloj konsciis la problemon pri la konservado de tiu natura riĉaĵo, de kiu dependas la vivnivelo, la sanstato. En la historio de ĉiu generacio ĉeestas la kreo de hidroteknikaj konstruaĵoj. Tra nia bulgara tero restis ankaŭ multaj postsignoj de konstruaĵoj, ligitaj kun la uzado kaj utiligo de la akvo. La bulgaroj ŝatas ĝin! Riĉa estas nia lingvo rilate la nomigon de la nocio „fontoŝtono“. Oni uzas apud ĝi epitetojn „bunta“, „mirinda“, „nova“, „blankŝtona“, „blanka“ k. a. La akvofontoj estas menciitaj en popolaj kantoj, fabeloj, legendoj.

Estas jenaj tipoj de trinkakvaj konstruaĵoj: starantaj — kun aŭ sen tegmentoj; fontanoj-pavilonoj; murfontanoj.

Al la unua tipo apartenas kortaj fontanoj — blankaj, bokalsimilaj siluetoj el marmoro. Ili antaŭmuroj estas ornamitaj per elĉizitaj figuroj, medalionoj, florantaj branĉoj, vinberaj grapoloj, folioj. Tre ofte la tegmentoj estas multangulaj.

La fontanoj-pavilonoj estas belega prezento de la fontanoj kiel arkitekta konstruaĵo. Mirindaj ek-



Ĉadur-fontano en Samokov

zemploj estas la t. n. „Ajazmoto“ (ĉe preĝejo „Beljova“ en Samokov), la t. n. „Sadakova fontano“ en Elena, la fontano en la korto de la episkopa preĝejo en Samokov k. a. Ili ĉiuj estas formitaj kiel laŭboj kun multangulaj fundamentoj kaj lignaj tegmentoj sur maldikaj graciaj kolonoj, kun elstarantaj tegmentvizieroj. La proporcioj kaj la harmonio inter la apartaj konstruaj elementoj estas interesa arta fakto — pruvo pri la konstruaj kapabloj de la bulgaraj majstroj. Valoraj monumentoj el tiu grupo, faritaj el ŝtono troviĝas en la kortoj de la monaĥejoj Lopusanski, Sokolski, Strupecki — kvar — aŭ multan-

gulaj konstruaĵoj kun ŝirmtegmentoj.

Plu multnombraj estas la murfontanoj — libere starantaj ĉe aŭ konstruitaj en muroj de horloĝturoj, preĝejoj, domoj. Ĉiam riĉe ornamitaj kun stiligitaj birdoj, bestoj aŭ homaj figuroj, ornamantoj de folioj, floroj, eĉ memportreto de la respektiva majstro-aŭtoro. Oni povas vidi tiujn fontanojn en multaj urboj kaj vilaĝoj.

Ĉe la fontanoj de la 18-a kaj 19-a jc. estas realigita kaj klare prezentita unika sintezo inter arkitekturo kaj plastika dekoracia arto. Ili respegulas la memfidon de la bulgaroj dum tiu epoko, ilian

strebon al unu nova arto, plena je fantazio kaj beleco!...

Kio estas pli vivpova en tiu mondo ol la eterne fluanta akvo?... Kaptita de la riverejoj, pura kaj klara ĝi ŝprucas el la fontantuboj, lignaj aŭ metalaj. Ĝi murmuras, plaŭdas!... Estiĝas gaje al la animo!

Dekoj da fontoŝtonoj apud ŝoseoj, montaraj vojoj aŭ meze je vilaĝaj placoj. Eĉ ne unu similas la alian. Mirinda varieco de formoj kaj krea uzado de konstrumaterialoj — diverskolora ŝtono, ligno, metalo. Malfacile oni povas imagi tiun belecon sen vidi ĝin. Ne eblas rezisti la tenton gluti ĝis satigo malvarman kaj bongustan akvon!

Dankemaj estas ne nur la homoj, sed ankaŭ birdoj, bestoj, eĉ la naturo mem, ĉar sekaj, dezertaj lokoj akiras verdajn vestojn, transformiĝas en regionojn, revivigitajn

de birdkantoj kaj gaja homa parolo.

Laŭ malnova bulgara kutimo, intima esprimo de donacemo estas la konstruo de fontoŝtonoj, por ke la homoj memoru la donacanton kaj benu lin post kvietigo de la soifo. Modesta donaco por la homoj de iu loĝloko, por ĝia bono kaj prospero kun elĉizita dediĉo de la majstro. Mallonga priskribo de la vilaĝa historio aŭ verso en la spirito de la popola verkaro, sen rimoj, sed sonanta profunde, kiel konfeso!... La paŝinteco estas revivigita! Ĉe la fontanoj ariĝas virinoj kaj junulinoj por preni freŝan trinkakvon. Venas junuloj por elekti siajn estontajn edzinojn. Apud la fontano komencas vigla, gaja rondodanco!...

Gloron al la majstroj de la fontanoj! Homoj amindaj, saĝaj, kun riĉa animo kaj okuloj de birdo. Kiam ni kliniĝas kisi la akvon kaj trinki de ĝi, ni kisas la nevideblan

majstran manon! La majstro sciis kio kaj kia estas la akvo, kia estas la vivo. Li komencis la konstruon de fontoŝtono kaj kantis kanton:

„Kie gutis la larmoj
tie fonto ekfluos!“.....

Oni ne povas haltigi tion, kio fluas! Nek la vivon, nek la akvon! La majstro, kun sento de plenumita devo donas al ili direkton kaj liberan vojon. Li scias, ke la generacioj benos lin! Matene kaj vespere la vojetoj iras al la fontoj! Iras homoj, birdoj, bestoj. Ĉio estas verda, paradiza! Animo animon serĉas, fonto koron volas!...

Ni kliniĝu antaŭ la majstro-saĝulo! Li donis forton kaj voĉon al la konstanta eterneco, voĉon al sia koro!

La fontanoj! La malnovaj fontanoj! Fluu! Kantu birdoj apud ili! Venu kapreoloj kaj cervoj! Ludu infanoj! Batu homkoroj!

Lilija KOLEVA

Petro Lilkov, vetereno-esperantisto el Sofio, antaŭ aranĝita de li fotoekspozicio pri la internacia E-Kursejo — Pisanica, dum la 40-a IFEF-Kongreso en Perpignan, Francio.





„STRAŽNICE'89”

Kolektanta Sekcio de ĈEA, kunlabore kun loka E-klubo en Stražnice, Ĉeĥoslovakio, organizis aranĝon por E-kolektantoj en Stražnice, kiu okazis inter la 7-a kaj 9-a de aprilo 1989. Partoprenis ankaŭ oficialaj reprezentantoj de E-asocioj el socialismaj landoj kaj aliaj eksterlandaj gastoj.

Ĉefaj punktoj de la programo estis: renovigo de la laboro de Kolektanta Sekcio de ĈEA, kunlaboro kun sekcioj de kolektantoj ĉe la E-asocioj de socialismaj landoj, interŝanĝo de esperantaĵoj, kultura programo k. a.

La aranĝon partoprenis ankaŭ Svetla Stratieva kaj Kiril Ĥlebarov, reprezentantoj de Sekcio de Kolektantoj ĉe BEA. Ili proponis planon pri diversspeca interŝanĝo. Estis subskribita Interkonsento pri kunlaboro inter Kolektanta Sekcio de ĈEA kaj Sekcio de Kolektantoj de BEA fare de ties prezidantoj Vlada Hasala kaj Svetla Stratieva.

S. S.

NOVAĴOJ EL SOVETUNIO

Ekde la nova lernojaro en estonaj lernejoj Esperanto estos instruata kiel elektelebla lingvo apud la aliaj fremdlingvoj.

En Estonio nun oni instruis Esperanton fakultative — laŭ deziro de lernantoj. En 32 lernejoj estis Elecionoj dum la nuna lernojaro. Nun la 22-an de aprilo okazis en Tallinn la oka lingva konkurso por Esperanto-lernantoj, partoprenis 22 pli bonaj lernantoj el la tuta Estonio. Oni havis taskojn pri aŭdoteksto, pri manka teksto — necesis kompletigi la mankantajn vortojn, kaj pri konversacio pri lernitaj temoj. La sukceso estis tre bona, la unuajn premiojn gajnis tri lernantoj! Tio montras la plialtiĝon de la instru-nivelo en Estonio.

Johannes PALU

● Radio Vilnius-Litovio sendas aŭskultantojn proksimume en 50 landoj. Verŝajne, ili estos ankoraŭ pli multaj. Kiam ekde printempo 1989 dufoje ĉiusemajne el Vilnius eksonis elsendo „240 sekundoj en Esperanto el Litovio”. Lunde la disaŭdigojn sur mallongaj ondoj eblas aŭskulti praktike en la tuta mondo. Jaŭde la samo estos ripetata en pli oportuna por aŭskultantoj en Eŭropo tempo.

Jen la tagoj, horoj kaj frekvencoj de la E-elsendo: Lunde je la 22.00 — 22.30 GMT (UTC) laŭ Univerŝala (Grenviĉa Meza) tempo. Ondolongoj — 31, 19, 16 m.; 9765, 9860, 15 455, 15 240, 17 665 kHz.

Jaŭde je la 21.30 — 22.00 GMT (UTC) laŭ Univerŝala (Grenviĉa Meza) tempo. Ondolongoj — 666, 6100 kHz.

Kvar minutoj en Esperanto estos elsendataj enkadre de anglalingva duonhora disaŭdigo.


Vi aŭdos pri aktualiaĵoj en Litovio el la kultura, socia, politika vivo. En ĉiu disaŭdigo estos minimume unu sciigo pri E-movado en Litovio. Ni respondos viajn demandojn. La enhavo de elsendoj plene dependas de aŭskultantoj, tial bonvolu skribu al Radio Vilnius, sugestu temojn, faru demandojn, proponojn.

Se la elsendoj estos popularaj, estonte eblos plilongigi ilian daŭron. Skribu laŭ adreso: 232 674 Vilnius, Radio, Esperanto, Litova SSR, Sovet-Unio.

La unua elsendo „240 sekundoj en Esperanto el Litovio” okazis la 3-an de aprilo, 1989. Agrablan aŭskultadon!

Litova Esperanto-Asocio

● Laŭ iniciato de lokaj E-aktivuloj en Samarkando fondiĝis publika Muzeo de Paco kaj Solidareco. En la muzeo, situanta en la urbocentro, estas eksponataj diversspecaj pacpropagandiloj el pli ol 50 landoj de ĉiuj kontinentoj. La organizantoj de la unika Muzeo kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn afiŝojn, sloganojn, pentraĵojn, infandesegnaĵojn, fotojn, insignojn, gluetikadojn, librojn, revuojn, lumbildojn, T-ĉemizojn, balonojn kaj ĉiujn ceterajn materialojn pri batalo de la popoloj kontraŭ militarismo, faŝismo, rasismo, novkoloniismo, por paco, socia justeco kaj progreso. La muzeo ankaŭ tre volonte akceptas dokumentojn kaj rememorojn de veteranoj-kontraŭfaŝistoj, leterojn de diverslandaj pacbatalantoj. Tiuteme oni korespondas en la lingvoj Esperanto, angla, rusa, uzbeka kaj laŭbezone ankaŭ en aliaj lingvoj.



Bonvolu direkti ĉiujn kontribuojn al:
Museum of Peace and Solidarity,
c/o International Friendship Club „Esperanto”,
P. P. Box 76,
703 000 Samarkand, Uzbekistan, USSR.

Ĉiulandaj E-aktivuloj estas petataj subteni la iniciaton de samarkandaj esperantistoj, disvastigi la tekston pri la muzeo en la landaj porpacaj medioj kaj laŭeble aperigi ĝin en nacilingvaj periodaĵoj.

Anticipajn dankojn al ĉiuj helpontoj!

● La 12-an de marto en 1989 je la 10.30 h. en la Sovetia Televido aperis kelkminuta reklamo por lerni Esperanton, en kiu la anoncisto koncize klarigis, ke tiuj, kiuj ŝatus havi amikojn en aliaj landoj, aliĝu al koresponda kurso, kostanta 35 rublojn por unu stud-jaro laŭ la jena adreso:

Kooperativ ESPERO,
SU—191 011 Leningrad,
ul. Fontanka 21,
Dom družbi.

La elsendo estis videbla en la Unua — (Tutlanda) programo je la 10.30 h. laŭ Mez-Eŭropa tempo.

ESPERANTO KAJ ARTO

En Sovet-Unio jam multe da homoj scias pri Esperanto. En multaj urboj de la lando funkcias Esperanto-kluboj. En Kievo, kie mi loĝas, jam kelkajn jarojn funkcias du Esperantaj kluboj: „Ora pordego“ (Kieva Urba Esperanto-Klubo de Internacia Amikeco) kaj „KARE“ (Kieva Esperanto-Klubo de Amatoroj de Arto). Grandan kaj diversspecan laboron faras la geklubanoj.

La 15-an de januaro ĉi-jare en klubo „KARE“ oni pritraktis verkadon de Ukraina pentristo Sergej Kononĉuk. Bofratino de pentristo Neonila Filipovna Franceva (Kononĉuk) rakontis pri la vivo kaj laboro de tiu tre mallonge vivanta kaj tiom multe laborinta Ukraina grafikisto. Nur 29 jarojn vivis kaj verkis Sergej Kononĉuk. Sed pli ol 50 librojn li sukcesis ilustrati, pli ol 300 verkoj estas en lia katalogo. Dum la unuaj tagoj de la Dua Mondmilito li partoprenis la batalon kaj li pereis jam en septembro de 1941. Restis de la soldato-pentristo nur la memoro pri li en la koroj de parencoj kaj amikoj kaj ankaŭ 5 albumoj kun liaj verkoj, kiujn li, antaŭ ol iri al la fronto, lasis ĉe sia bofratino. Multe da fortoj ŝi elspezis por diskonigi la nomon de grafikisto Sergej Kononĉuk al la vasta publiko en Sovet-Unio.

Ekde 1980 oni organizis kelkajn ekspozicion de verkoj de la pentristo en Kievo, en aliaj urboj de Ukrainio kaj en Moskvo. Liaj verkoj oni uzis en eldonaĵoj de libroj en Ukrainio, en Uzbekio, en RSFSR.

Membroj de la Esperanto-klubo atente trarigardis multajn pentraĵojn, skizojn, katalogojn, kiujn alportis Neonila Filipovna el sia propra arkivo. Kun intereso oni rigardis malnovajn distriktojn, stratojn, placojn de malnova Kievo, figurojn de homoj kaj animaloj de antikva Samarkando. Kaj multaj floroj... Floroj kaj poezio okupis apartan lokon en kreado de la pentristo. Per versaĵoj kaj pentraĵoj de floroj li plenigis tiujn malmultajn leterojn el la fronto. Kelkaj el ili N. Filipovna voĉlegis dum la kunveno. Kaj kvankam la laborlingvo de la klubo estas Esperanto, ĉi-vespere oni povis aŭdi rusan kaj ukrainan paroladon. Certe Neonila Filipovna ne povis konatigi membrojn de la klubo kun ĉiuj materialoj, dediĉitaj al kreado de Sergej Kononĉuk.

Ŝi invitis ĉiujn ĉeestantojn viziti la hejman muzeon, kiu troviĝas en ŝia propra loĝejo. Kun granda plezuro la klubo akceptis donacon de Neonila Filipovna — skizon, faritan de Sergej Kononĉuk. Membroj de la klubo donacis al la pentrista parenco kluban insignon kaj konatigis ŝin kun la klubo agado.

Mi kredis, ke tiu kunveno estis tre interesa kaj utila por niaj esperantistoj.

V. TOKAREV

DENOVE PREMIO DE RADIO PEKINO

En la komenco de februaro pasintjare — la jaro de la Drako, Radio Pekino kaj la Turisma servo de Pekino, kun celo profundigi la amikecon inter Ĉinio kaj la eksteraj landoj, okazigis la aktivadon „Artikolpeto por la Draka jaro“, kies ĝenerala temo estis „Ĉinio en miaj okuloj“. Oni povis verki artikolon, vojaĝnotojn, eseon kaj poemon pri jenaj temoj: „Mi kaj Ĉinio“, „Miaj ĉinaj amikoj“, „En la hejmlando de Drako“, „Posteuloj de Drako“ kaj „Vizito al Pekino en la Draka Jaro“.

Antoaneta Nikolaeva el u. Opaka, Razgrad-departemento, ricevis de la E-sekcio de Radio Pekino informleteron pri la konkurso kun propono partopreni ĝin. Ŝi preparis bele ornamitan mapon, enhavantan 9 tajpitajn paĝojn — artikolon sub titolo „Miaj ĉinaj amikoj“ kaj 3 kolorajn aplikaĵojn „Drako“, „Saluton el Bulgario“ kaj „Amikeco“. La aŭtorino kortuŝe rakontis pri siaj impresoj pri la vizito en Ĉinio dum la 71-a UK, pri siaj ĉinaj geamikoj kaj pri la pasintjara feliĉa renkontiĝo en Bulgario kun sia „kongresa“ amiko — la ĉina pentristo Tian Wei (vidu „BE“, 5/1988).

Fine de novembro '88 alvenis de Radio Pekino gratuleto kun sciigo pri gajnita tria premio. La letero finis per gratulvortoj: „Ni kore gratulas Vin, ĉar en tiu ĉi konkurso Radio Pekino ricevis entute 12 907 kontribuojn el 87 landoj kaj regionoj, tamen nur 214 aŭtoroj gajnis premion.“

Post du monatoj nia samideanino ricevis sendaĵon, enhavantan honoran premi-atestilon, gratulkarton, prospekton de E-sekcio de Radio Pekino, ĉinstile stampitan tuketon kaj belan silkotukon kun emblemo de Radio Pekino.

Nedjalka STANEVA

VJETNAMA INVITO

Hanoja E-Klubo, en kunlaboro kun Hanoja Turisma Unio, povas akcepti turistojn el ĉiuj landoj kontraŭ modesta prezo. Kiuj volas viziti Hanojon kun ties periferioj povos konatigi kun la urbaj vidindaĵoj, kulturo kaj artoj, historiaj monumentoj, pagodoj ktp.

Por via konkreta programo, bonvolu turni vin al:

— Hanoja Turisma Unio: 23 Nguyễn Đình Chiểu, Hanojo. Tel. 52175, telex. 4272 TCDL — V. T.

— Hanoja E-Klubo: 46 Trần Hưng Đạo str., Hanojo. Tel. 53841

— VPEA: 105 A Quan Thánh str., Hanojo. Tel. 54518.


Gastamaj hanojaj esperantistoj bonvenigas vin!

Hông HAC,
klubestro de Hanoja E-Klubo

ANONCETOJ

● E-klubo en Břeclav preparas en decembro k. j. letervesperon. Kvin lotumotaj salutoj ricevos premion. Skribu al: Zdenek Hirt, Záměstekého 4, CS—690 02 Břeclav.

● Johannes Palu, E-klubisto — Sölme 21, Su—200 016 Tallinn, serĉas ankludojn por la lerneja E-klubo — vortludoj, kludoj, enigmoj, krucvortoj ktp. Rekompenco el la klubo.



Deziras korespondi

BULGARIO

MARGARITA DIKOVA (19-jara) — 3200 Bjala Slatina, bl. „Garant“, vñ. G, ap. 11 — kun ĉl pri politiko kaj futbalo.

ALEKSANDRA ĈERNEVA (29-jara konstruĝenie-ro) — 2500 Kjustendil, ul. „Kresna“ 3 — kun ĉl pri muziko, literaturo, fremdaj lingvoj, vojaĝoj, turismo, ekologio.

VALERI VIDANOV (26-jara studento) — Sofio, ĵ. k. „Haĝi Dimitar“, bl. 142, vñ. 3, ap. 68 — kun ĉl pri Jeet Kune Do, Kung-fu.

NEDJALKA BEGOVA (49-jara flegistino) kaj ELKA PETROVA (23-jara flegistino) — 5100 G. Orjaĥovi-ca, ul. „D. Blagoev“ 7 — kun ĉl pri ĉt.

JIVKA GEORGIEVA (21-jara poŝt-teknikistino) — 5100 G. Orjaĥovi-ca, ul. „Aprilsko vāstanie“ 6 — kun ĉl pri ĉt.

IVAN BUDINOV (17-jara lernanto) — 1309 Sofio, bul. „Konstantin Veliĉkov“ 165, bl. 6, vñ. II, ap. 39 — kun ĉl pri fotografio, sporto kaj muziko.

KATERINA GEORGIEVA (38-jara inĝeniero) — 8600 Jambol, ĵ. k. „Hale“, bl. 8, vñ. K, ap. 203 — kun ĉl pri literaturo, modo, muziko.

VASJA ANGELOVA (40-jara inĝeniero) — 8600 Jambol, ul. „Graf Ignatiev“ 68, vñ. A, ap. 10 — kun ĉl pri literaturo, kino, turismo.

MARIA VASILEVA (22-jara pentristino) — 8600 Jambol, ĵ. k. „Lenin“, bl. 15, vñ. G, ap. 82 — kun ĉl pri muziko, pentroarto, modo.

TODOR KUMBIEV (30-jara trajnestro) — 5100 G. Orjaĥovi-ca, ul. „Slavjanska“, bl. 13, vñ. A, et. IV — kun ĉl pri ĉt.

BRAZILIO

REMO V. CREMASCHI (28-jara) — SP—BR—18130, São Roque, r. Marechal Deodoro 219 — kun ĉl pri ĉt.

POLLANDO

WIKTOR LEBIEDŹ (32-jara teknikisto) — PL—58—506 Jelenia Góra, ul. Rózyckiego 23/128 — kun ĉl pri muziko, literaturo, teatro, turismo.

RYSZARD SZLYKIEWIEZ (33-jara) — PI—58—260 Bielawa, XXV—Lecia PRL 9/32 — kun korespondan-toj loĝantaj ĉe Nigra Maro pri ĉt.

BARBARA RADLAK (34-jara laboristino) — PL—59—615 Nowogrodziec, ul. Stralecka 1/15, woj. Je-lenia Góra — kun ĉl pri ĉt., kolektas pm, bk.

JAN SALIŃSKI (39-jara laboristo) — PL—97—500 Radomsko, L. Czarnego 13/33 — kun ĉl pri turismo, literaturo, kaj folkloro.

MALGORZATA KRZYŹANOWSKA (18-jara) — PL—85—667 Bydgoszcz, ul. Chodkiewicza 37/2/5 — pri turismo, arkeologio, geografio.

LESZEK WOLAŃSKI (35-jara kuracisto) — PI—85—791 Bydgoszcz 32, ul. Nieduszyńskiego 20 m. 12 — kun bulgaraj esperantistoj, prefere kirurgoj.

LIDIA ZUREK (22-jara) — PL—34—330 woj. bielskie, Zywiec 3, ul. Ĥernika 108 — kun ĉl pri floroj, kolektas bk.

ZIAJA KAZIMIERZ (36-jara inĝeniero) — PL—32—300 Olkusz, ul. Skalska 14/2 — pri turismo, aŭtomobiloj, kolektas bk.

LESZEK KLUZA (21-jara poŝt-ficisto) — PL—88—140 Gniewkowo, ul. Toruńska 17a — kun ĉl pri ĉt.

GEKOMENCANTOJ (15—35-jaraj) — PL—08—110 Siedlce, Zabokliki 62 A, Klub Polnika — kun ĉl pri ĉt.

ALINA CHRUSCIŃSKA (28-jara inĝenierino) — PL—22—400 Zamość, Aleja Lenina 40/37 — kun ĉl pri fremdaj lingvoj, scienco.

JOSEF LECHOWICZ (28-jara instruisto) — PL—56—100 Wolów, ul. Z. Chrzanowskiej 6 — kun ĉl pri vojaĝoj, fotografio, sporto.

IRENA KUSMIEREK (26-jara instruistino) — PL—62—513 Krzymow, Woj. Konin — kun ĉl pri ĉt, kolek-tas bk kaj pm.

ANNA FRICZE (19-jara) — PL—64—225 Kopanica, ul. Winnice 135 — kun ĉl pri ĉt.

KATARZYNA KASZEWIAK (30-jara instruistino) — PL—05—660 Warka, skr. Pocz. 32 — kun ĉl pri ĉt.

TERESA WRODYCKA (34-jara) — PL—26—600 Ra-dom, ul. Wodna 18 m. 1 — kun ĉl pri literaturo, turis-mo, fremdaj lingvoj.

IZABELA SAWOYKA (32-jara bibliotekistino) — PL—93—248 Łódź, ul. Makuszyńskiego 3 m 41 — kun bulgaraj esperantistoj pri ĉt.

RUMANIO

NIKOLAE MACOVEI (27-jara instruisto) — R—5967 Brodina de Sus, Jud. Suceava — kun ĉl pri ĉt, kolek-tas bk, revuojn.

SOVETUNIO

HARDI HÕIMOJA (14-jara lernanto, premiito en konkursoj) — SU—200026 Tallinn, Ehitajte 25 A—16 — kun ĉl pri ĉt.

GEEDZOJ MAIRE (26-jara) kaj TOIVO (30-jara) OTSMANN — SU—200016 Tallinn, Harku 30—1 — kun ĉl pri ĉt.

NATAŖA POROŖINA (40-jara edukistino) — SU—246028 Belorusio, Gomel, ul. Kojara 1—118 — kun ĉl pri literaturo, vojaĝoj, modo, kuirarto, antikva muziko.

VOLODIMIR HLUŖIK (30-jara komercisto) — SU—290022 Ukrainio, Lvov, ul. Signivka 3—98 — kun ĉl pri ĉt.

HENRIKA MARCINKENAJTE (13-jara lernantino) — SU—232010 Litovio, Vilnius, ul. Paberŝes 30—21 — kolektas bk, pm, glumarkojn, kalendaretojn.

MARINA SAFRONOVA (23-jara) — SU—614080 Perm, st. de Repin 25—11 — kun ĉl pri ĉt, kolektas pk, pm.

SAULIUS MILIUNAS (29-jara) — SU—235000 Lito-vio, Jonava, Chemiku 49—14 — kun ĉl pri sporto, muziko, lingvoj.

LIDA KLIMAITE (22-jara flegistino) — SU—235720 Litovio, Palanga—2, Kirŝiu takas 1—119 — kun ĉl pri ĉt.

ALDONA MUIŖENIKAITE (42-jara) — SU—235720 Litovio, Palanga—2, Kirŝiu takas 1—174 — kun ĉl pri ĉt.


DAIVA JOKUŖITE (20-jara) — SU—235822 Litovio, Klaipeda, Laukininku 29—53 — kun ĉl pri floroj kaj libroj.

SONATA VENSUTE (17-jara lernantino) — SU—235700 Litovio, Kretinga, Kretingsodŝio km. — kun ĉl pri ĉt.

NE FORGESU!

Estimataj legantoj,

Pasis preskaŭ jaro de kiam „Bulgara Esperantisto” havas „novan vestaĵon”. Dum la pasinta tempo vi ankaŭ ĝuis (laŭ viaj leteroj) la pli varian enhavon, pli bonkvalitajn grafikaĵojn kaj fotojn. Plimultiĝis la nombro de niaj legantoj eksterlandaj. Jam pri la revuo interesiĝas esperantistoj el 47 landoj.



Se vi deziras ankaŭ ricevadi „BE” dum 1990, vi povus aboni ĝin. En Bulgario tio eblas dum la abonkampanjo pere de la poŝto kontraŭ 4,80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — pere de la koncerna poŝto. Por ĉiuj aliaj landoj — pere de UEA aŭ niaj perantoj kontraŭ 32 neder-

landaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj, pagita en Bulgario estas 7.32 lv., por la aliaj landoj — 7.80 lv. Tiamaniere bulgaraj esperantistoj havos eblecon aboni nian revuon ankaŭ por siaj eksterlandaj amikoj.

Sekvontjare la Redakcio proponos al sia legantaro:

- *interesajn legaĵojn por ĉiu aĝo;*
- *E-novaĵojn el Bulgario kaj la mondo;*
- *artikolojn sur diversaj aspektoj de la E-movado;*
- *altkvalitajn publikaĵojn sub la rubrikoj: „Lingvaj demandoj”, „Esperanto en profesioj”, „Originala verkaro”, „Leteroj de korespondamiko”, „Juna esperantisto”, „Distraj paĝoj”, „Verdaj steleteoj”, „Deziras korespondi” k. a.*

VI ĜUOS DENOVE BELASPEKTAN KAJ LUKSAN ELDONAĴON.

Niaj perantoj:

Britio

S-ro Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby Grimsby, South Humberside DN 365 RT

Francio

Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris

Svislando

Esperanto-Perantejo Bern, Weingartstr. 21, CH—3014 Bern

Japanio

S-ro Yoshiaki Mizuno, Hanazono 1—2418—18 Tokorozawa 359

Ĉiu deziranto estiĝi peranto de „BE” eksterlande povus turni sin al la Redakcio. La rabato por la perantoj estas 25% el la kolektita abonsumo.

JAM ALVENAS ABONTEMPO. NE FORGESU ABONI VIAN JAM 70-JARAN REVUON „BULGARA ESPERANTISTO”!

815

EN LA SEKVA NUMERO LEGU PRI

La mondfama fenomeno Vanga

Jam 50-jarojn Vanga pruvas sian eksterordinaran talenton de aŭguristino kaj popola kuracistino. Ŝia populareco delonge trapasis la limojn de Bulgario. En la mondo oni konas ŝin kiel „Kasandro-n de XX jarcento“ (Bulgara Verkisto) Baldaŭ Eldonejo „Vanga“, verkitan de ŝia nevino Krasimira Stojanova (kiu afable disponigis al nia Redakcio interese-aperigos la libron „Vanga“, verkitan de ŝia nevino Krasimira Stojanova) En kelkaj numeroj de „BE“ vi havos eblecon legi pri la aŭguraj kapabloj de Vanga kaj ekscii ŝiajn konsilojn al la nuna homaro — kiel gardi la naturon, kiel vivi laŭ ĝiaj leĝoj.

„BE“